

Giacomino Martinez

Esperantismo en Sicilio



Fervojista Postlaboro - Udine
Nova Espero Friuli
2019

MALLONGIGOJ

adv.	Advokato
ark.	Arkitekto
bibl.	Bibliotekist/ino
D.L.F.	Fervojista Postlaboro
d.rino	Doktorino
d.ro	Doktoro
E.	Esperanto
E.sta	Esperantista
ELF-AREK	Esperanto Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
f.ino	Fraŭlino
Gen.	Generalo
geo.	Geometro
Hon.	Honorinda (deputito)
I.A.B.E.	Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj
I.E.F.	Itala Esperanto-Federacio
I.E.I.	Itala Esperanto-Instituto
I.E.J.	Itala Esperanto-Junularo
I.F.E.F.	Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
I.J.F.	Internacia Junulara Festivalo
I.L.E.I.	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
inĝ.	Inĝeniero
instr.	Instruant/isto
Kap.	Kapitano
kard.	Kardinalo
kas.	Kasisto
kav.	Kavaliro
Kol.	Kolonelo
kom.	Komandoro
libr.	Librotenisto
L.K.K.	Loka Kongresa Komitato
mons.	Monsinjoro
nda	Aŭtoroto
N.E.F.	Nova Espero Friuli
n.ro	Numero
prez.	Prezidant/ino
prof.	Profesoro
prof.ino	Profesorino
sen.	Senatano
sekr.	Sekretario
s.rino	Sinjorino
s.ro	Sinjoro
Sub-kol.	Subkolonelo
T.E.A.	Triesta Esperanto-Asocio
T.E.J.O.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
T.E.Ĵ.A.	Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio
U.E.A.	Universala Esperanto-Asocio
U.E.C.I.	Itala Katolika Unuiĝo Esperantista
U.K.	Universala Kongreso

ANTAŬPAROLO

Ĉi tiu laboro celas rekonstrui la historion de Esperantismo en Sicilio kaj memori tiujn, kiuj tre klopodis por la disvastigo de la Internacia Lingvo en ĉi tiu regiono.

Kiel rezulto de ĉi tiu serĉado estas eble kapti, je iliaj esencaj trajtoj, profilojn kaj aktivecon de tiuj, kiuj estis aŭtoritataj protagonistoj en la loka Esperanto-mondo.

Oni ŝuldas la sciigojn kaj la dokumentojn cititajn al kelkaj siciliaj geesperantistoj, kiuj disponigis sian materialon. Kaj ankaŭ estis efike helpa la malnovaj jarkolektoj de esperantaj revuoj, fonto de multaj kaj utilaj sciigoj.

La jena laboro estas nur ŝtoneto enmetenda en tiun riĉan mozaikon pri analogaj laboroj, kiuj, kune, kontribuas al la kompleta redakto de la historio pri Esperantismo en Italio.


Plie, estas mia devo danki Jean Amouroux (Perpignan), Aldo Chiaruttini (Udine), d.ron Antono De Salvo (Roma), Vito La Colla (Palermo), Anĝela Mangano Virgillito (Catania), prof.on Karlo Minnaja (Padovo), ark.on Johanbaptisto Nicastro (Caltagirone), prof.on Nunzio Giovanni Parisi (Trapani), familion Paulet (San Vito al Taljamento), Karlo Sarandrea (Roma), prof.on Jozefo Zappulla (Catania), pro la gravaj sciigoj kaj materialo metita je dispono por realigi ĉi tiun laboron.

Jakobeto Martinez

ORIGINOJ DE LA LINGVO ESPERANTO

Antaŭ ol ekzameni okazaĵojn kaj personojn pri Esperantismo en Sicilio, estas necese skizi la originojn de la lingvo, kiu, naskita en la menso de Zamenhof knabo, estis de li eltrovita kiam li estis plenkreskulo, kiel ilo por superi la lingvajn barojn.

Ludovik Lejzer Zamenhof naskiĝis en Bialystok, nuntempe Pollando, regiono de la malnova pola respubliko, kiun la rusa imperio aneksis al si. En ĉi tiu regiono ĉeestis diversaj popoloj: Poloj, Rusoj, Germanoj, Hebreoj. Al la lingva diverseco respondis profunda malsameco de kutimoj, religioj, moroj, pensmanieroj.



D.ro Ludovik Lejzer Zamenhof
Bialystok, 15.12.1859 - Varsovio, 14.4.1917

La ideo pri komuna lingvo, kiel vehiklo de kono, de kompreno kaj de toleremo, naskita ekde la plej frua infanaĝo antaŭ la hororoj de masakroj, neniam lasis lin.

Dum la unuaj jaroj de gimnazio, ĉerpinte materialon el diversaj lingvoj, kiujn li scipovis, kaj el multaj vortaroj de la patro, Zamenhof eklaboris pri nova lingvo, kiun oni povis facile lerni, iu ajn estu la gepatra lingvo.

Ekde la komenco antaŭ liaj okuloj aperis riĉa gramatiko kaj granda vortaro kaj tio lin turmentis senĉese ĝis kiam li vidis la skribaĵon svejcarskaja (drinkejo) kaj konditorskaja (sukeraĵejo). Tiu -skaja ekinteresis lin ĉar la sufikso donis la eblecon fari, el unu vortradiko, aliajn vortojn, kiujn ne estas necese lerni aparte.

Ekde tiam li ekpristudis la sistemon pri afiksoj kaj la granda vortaro malpliiĝis tre multe. Tiel, dum jaroj kaj jaroj de kompara studado, serĉado, provoj, tradukoj, sendormaj noktoj, en 1878 ekestis la nova lingvo¹.

Ĝis tiam la patro, Markus, profesoro pri lingvoj, ne malaprobis lian verkon ĉar la knabo sukcesis en ĉiuj ekzamenoj. Post la gimnazio oni devis decidi pri la profesio kaj tiu de kuracisto estis tiam unu el tiuj permesitaj al hebreoj en la rusa imperio. Sed ofte amikoj kaj kolegoj de Markus Zamenhof lin admonis pri lia filo. "Unu fiksa ideo en la kapo de la knabo certe minacas frenezon. Estus domaĝe lasi tiun talenton por konstrui ĥimerkastelon. Baldaŭ li malsaniĝos, se li daŭrigas ankoraŭ!". Pro tio Ludovik promesis forlasi sian projekton, almenaŭ provizore.

Kiam Ludovik revenis el Moskvo, kie li studis medicinon, al la patrino (Klara Zilbernik) li rakontis la promeson farita al la patro kaj, el ŝi, li sciigis ke la patro bruligis liajn kajerojn. Sed Ludovik memoris parkere ĉion kaj denove li refaris sian verkon.


Sur la kajeroj de aŭgusto 1881 reaperis preskaŭ la sama lingvo kiel en 1878. Dum ses jaroj Zamenhof laboradis ĉiutage perfektigante kaj plibonigante sian lingvon.

De longe Zamenhof serĉis eldoniston sed neniu volis riski monon. Tamen estis necese eldonigi lian lingvon ĉar, dum lia silenkto, ekfloris Volapük de la germana abato Johann Martin Schleyer (Oberland, 18 Julio 1831 - Konstanz, 16 Aŭgusto 1912)². Pri ĉi tiu lingvo Zamenhof sciis nenion kaj post kiam li sciigis pri ĝi, li konstatis ke la solvo ne estis celkonforma. Estis necese montri al la mondo ke la celo estas valida kaj estas malbona nur la sistemo.

Noto 1 "...oni gardis la legendon pri la juna kuracisto, kiu konsumis ĉiusemajne tri funtojn de vaksaj kandeloj, laborinte nokte por eltrovi la internacian lingvon". (Roman Dobrzyński, *Strato Zamenhof, eltrovinto de Esperanto*, paĝo 121a, Eldonejo Giuntina (Ĝuntina), Florenco, 2009. Origina titolo: *La Zamenhof-strato*).

Noto 2 La aŭtoro ne akceptis konsilojn por plibonigi la lingvon, fakte Zamenhof diris: "Bastono plantita teren ne fruktas". Post la eldono de la Esperanto-gramatiko, volapükistoj pasis al la lingvo de d.ro Esperanto.

Fine, la 14an de Julio 1887 aperis la unua eldono, en la rusa lingvo. Ĝi titoliĝis: *Международный язык. Предисловие и полный учебник* - Doktoro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro. La verko enhavis gramatikon pri 16 reguloj kaj dulingvan vortareton pri 900 vortradikoj. Per deklaro en la dua paĝo, la aŭtoro rezignis ĉiujn rajtojn, ĉar "internacia lingvo, kiel iu alia lingvo, estas socia propraĵo". Laŭ la ĝenerala uzado, la lingvo de doktoro Esperanto baldaŭ nomiĝis simple *Esperanto*.



La unua Esperanto-gramatiko

GRAVAJ AKTIVECOJ FARITAJ EN SICILIO



Antaŭ ol en Italio oni ekparolu pri efektiva Esperantismo, en Sicilio jam en novembro 1903 la semo de Esperanto estis semita de d.ro Vitanĝelo Nalli, en Palermo. Li ekdisvastigis la Internacian Lingvon gvidante kursojn ankaŭ en la universitatoj. Tamen, temis pri esperantistoj disaj en la insulo ankoraŭ ne organizitaj kiel asocioj sed ne kun malpli da entuziasmo kompare kun tiuj de aliaj italaj regionoj.

Post la 1a Mondmilito, libr. Kaloĝero Palermo (strato Sankta Rozalia n.ro 27, Canicatti), magistriĝinta pri Ekonomio kaj Komerco ĉe la Universitato de Palermo, reprenis senĉesan propagandon per broŝuretoj, prelegoj, kursoj kaj per gazetaro¹. Dank'al li ne estis grava urbo aŭ urbeto en Sicilio, kiu ne havis iun esperantiston. Mankis la organizado kaj la Movado suferis malfavore pro la malproksimo de la regaj centroj, sed per la fondo de la Palerma Esperantista- Grupo, estrita de prof. Stefano La Colla kaj de pastro Gaetano Abratozzato, naskiĝis kaj floris multe da aliaj grupoj.

Libr. Kaloĝero Palermo, Federacia Komisararo por Sicilio, estris la tutan Sicilian Esperantismen helpita de Federico Caico el Palermo.

Post la 2a Mondmilito, Esperantismo, neniigita de la militaj okazintaĵoj, renaskiĝis dank'al la pretervivantaj pioniroj, kiuj tre klopodis por diri sian komprenan kaj malstreĉigan vorton, por porti sian ŝtonon al la rekonstruo. En Sicilio la situacio estis tre malbona ĉar la insulo restis, dum longa tempo ankoraŭ, disigita de Italio: la poŝto ne funkciis bone, leteroj alvenis tre malfrue aŭ tute ne alvenis. Tiam adv. Jozefo Stanislao Boscarino, malnova esperantisto sicila, proponis al la I.E.F. krei en Sicilio Delegacion, kiu, je dependo de la I.E.F. kaj sekvante ĝiajn direktivojn, propagandu, trovu la siciliajn esperantistojn, gvidu ilin por pliigi la Movadon. La propono estis akceptita kaj la 10an de novembro 1945 oni fondis la Sicilian Delegacion de la I.E.F., enhavante provizoran sidejon en Ragusa (korso Vittorio Veneto n.ro 92) atendante transloĝiĝi al alia urbo pli reprezenta, eble en la apudeco de la Regionaj Aŭtoritatoj por esti en kontakto kun ili kaj havi ilian apogon².



10a datreveno de la Sicilia Delegacio: memoriga folio

Oni elektis Ragusa kiel sidejon de la Delegacio ĉar ĝi havis longan esperantan tradicion kaj kie, dum pli ol tridekjara periodo, pastro Johano Di Giacomo, reprezentanto de U.E.C.I., disvastigis Esperanton per kursoj kaj prelegoj.

La laboro de la Delegacio ne estis facila, la I.E.F. ne plu havis regulan sliparon ĉar multe da arkiva materialo estis detruita dum bombadoj de Milano de la 16a de aŭgusto 1943, pro tio oni devis trovi nomojn de siciliaj esperantistoj per malnovaj Jarlibroj, Adresaroj, listoj de koresponda asocioj, listoj de filatelistoj, k.t.p.. Oni sendis centoj kaj centoj da leteroj al ĉiuj siciliaj urboj sed multaj venis returne kun la notoj: "nekonata" aŭ "translokiĝinta". Oni devis ĉion refari: la sicilia gazetaro, kaj ĉiutaga kaj semajna aŭ monata, donis la apogon por la propaganda ago kaj ankaŭ la sicilia radio kontribuis, oni faris prelegojn, tiele oni ekparolis denove pri "Esperantismo en Sicilio".


Noto 1 La revuo "L'Universo" (Korso Viktorio Emanuelo n.ro 4, Salerno), organo de la Komitato por la propagando de la nacia arto, en ĝia dua numero ekeldonis rubrikon fare de libr. Kaloĝero Palermo. Esperantista kroniko, ĉiam fare de libr. Palermo, estis ankaŭ en "L'Iride" - Ĉielarko (strato S. Sebastiano n.ro 39, Gravina de Apulio), monata revuo kritika-arta-literatura estrita de la esperantisto Saverio Pineo. La unuaj artikoloj aperis en la n.ro 9 de la revuo.

Noto 2 La propagandfolio, presita sur dika kartoneto, estis eldonita okaze de la 10a fonda datreveno de la Delegacio. Ĝi havas la n.ron 455 de la Katalogo ELF-AREK. Koloro de la skribaĵo: blua; koloro de la folieto: verda.

La laboro de la Delegacio disvastiĝis, pere de persista laboro, al ĉiuj provincoj: estis tiel ke, la 26an kaj la 27an de majo 1951, oni faris en Catania (Katanio) la 1an Sicilian Esperanto-Kunvenon³.



1a Kunveno de la siciliaj esperantistoj: folieto de la kunveno



1a Kunveno de la siciliaj esperantistoj: poŝtkarto de la kunveno

La manifestiĝo okazis en la Aŭlo de la Universitato de Catania, dank'al la universitata Rektoro prof. Cesare Sanfilippo, kaj fermiĝis post ekskurso al Acitrezza (Aĉitreca), la fama plaĝo de ciklopoj. Krom siciliaj esperantistoj, ĉeestis prof. Georgo Canuto kaj d.ro Karlo Borione, respektive Prezidanto kaj Sekretario de la I.E.F.. Prof. Bruno Monterosso, Vic-Rektoro, akceptis korege esperantistojn kaj diris belajn prezentvortojn al prof. Canuto, aldonante ankaŭ ke "la scienco atendas universalan lingvon, unikan, kiu plifaciligu la disvastigon de la rezultoj pri internaciaj studadoj kaj eltrovoj".



1a kunveno de la siciliaj esperantistoj: centre: prof. Georgo Canuto

Noto 3 La propagandfolio havas la n.ron 407 a) kaj 407 b) de la Katalogo ELF-AREK respektive por la blua kaj la verda koloro.

Prof. Canuto altiris la atenton de la ĉeestantoj preskaŭ du horojn prelegante pri la filozofiaj aspiroj por universala lingvo, skizante la sennombrajn provojn ĝis Esperanto; li parolis poste pri: deveno de la radikoj, mekanismo pri vortfarado, gramatiko, praktika apliko en arto, scienco, literaturo, komerco, turismo, k.t.p..

Ĉi tiu Kunveno vekis la publikan intereson por la Lingvo kaj por la Movado. Oni ekfondis grupojn. Catania, fare de prof. Francisko Geraci kaj libr. Rosario Sgroi, estis proksima inaŭguri sian grupon; tiu grupo, kiu, antaŭe, estis fondita ankaŭ laŭ la iniciato de Petro Rizzo.

En Palermo faris intensan aktivecon kav. Francisko Geluardi kaj d.ro Lucio Sinagra. En Messina prof. Jozefo Zappulla kaj libr. Julio Viti kunlaboris aktive por la disvastigo.

La aktiveco de la Sicilia Delegacio reliefigis en la kolumnoj de la loka gazetaro: Catania "La Sicilia", "Corriere di Sicilia" (Kuriero de Sicilio), "Corriere di Catania" (Kuriero de Catania), "Giornale dell'isola" (Ĵurnalo de la insulo), "Il Domani" (La Morgaŭo); Palermo, "Giornale di Sicilia" (Ĵurnalo de Sicilio), "L'ora del popolo" (La Horo de la popolo); Messina, "Giornale del Sud" (Ĵurnalo de Sudo); Vittoria, "La Lucerna" (La Lucerno); "La voce di Modica" (La Voĉo de Modjka); "Scioli" (Ŝikli).

La Sicilia Esperantismo ekpruvigis sian maturecon, sian kapablon, sian alligitecon al la ideo kaj al la Centra Organizado. Estis la grupo de Palermo, estrita de prezidanto adv. Rosario Abate, kiu proponis duan Kunvenon en la urbo de la Ora Valo. Prof. Canuto, kiu ĉiam montris apartan ŝaton al nia insulo, akceptis la proponon veni Sicilion por prezidi la Kunvenon. Oni faris intensan propagandon per radio, gazetaro kaj per invitiloj senditaj al Aŭtoritatoj, Institucioj kaj privatuloj.

La 2a Sicilia Esperanto-Kunveno okazis en Palermo la 6an kaj la 7an de Aprilo 1957⁴.



2a kunveno de la siciliaj esperantistoj
Poŝtkarto kun la aŭtografo de prof. Gorgo Canuto kaj de adv. Jozefo Stanislaw Boscarino



2a kunveno de la siciliaj esperantistoj: poŝtkarto kaj folieto de la kunveno

Noto 4 La poŝtstampo de la kunveno havas la n.ron 10 kaj la folieto la n.ron 498 de la Katalogo ELF-AREK.


En la ejoj de la Gazetara Klubo (ĉe la Teatro Massimo, en Placo Verdi), disponigitaj de prezidanto d.ro Johano Zanasi, okazis la "interkona vespero"⁵ dum la Kunveno okazis en granda ĉambro de la Universitato, disponigita dank'al la universitata Rektoro prof. Laŭro Chiazzese⁶.

Prof. Georgo Canuto, Prezidanto de la U.E.A., dankante pro la varma akcepto, gratulis pro la rezultoj obtenitaj en Sicilio aldonante ke tiu renaskiĝo okazas hodiaŭ en la tuta mondo. La 7an de aprilo, ĉe la Aŭlo de la Universitato, prof. Canuto faris prelegon pri: "Esperanto en la nuna momento".

Sekvis ekskurso al Monreale kie la esperantistino Maria Rizzo el Palermo ilustris la senprezajn trezorojn de la Katedralo kaj la sorĉaĵo de la Klostro.

En la Kunveno partoprenis ĉirkaŭ 250 geesperantistoj el ĉiu parto de Sicilio; d.ro Karlo Borione de la I.E.F. kaj ankaŭ grupo da esperantistoj el Bolonjo kaj Torino. La Kunveno fermiĝis en la Gazetara Klubo per dancofesto bondezirante ke Palermo povu gastigi baldaŭ Nacian Kongreson.

Kaj estis tiel. La 29a Itala Esperanto-Kongreso okazis en Palermo de la 23a ĝis la 27a de Aŭgusto 1958⁷.



29a Itala Kongreso de Esperanto: poŝtkarto kun la speciala poŝtstampo

Intensan organizan kaj disvastigan laboron oni faris por ke la kongreso sukcesu bone. Prof. Antoneto Gebbia, unu el la plej malnovaj esperantistoj, propagandis ankaŭ en Mezzoiuso, urbeto najbare Palermo, kie li gvidis kurson vizitita de dudeko da lernantoj. La malfermo de la Kongreso, la unua en Sicilio, okazis en la Memorŝtonaj Salono de la Komunumo.

Noto 5 Interkona vespero. Temas pri la unua vespero de la E.-kongresoj, tradicie dediĉita al la persona interkono.

Noto 6 Laŭro Chiazzese (Mazzarino, Caltanissetta, 6 aŭgusto 1903 - Palermo, 14 decembro 1957), juristo. Post la transloĝiĝo de la familio al Palermo, li finis la duagradajn studojn kaj li doktoriĝis pri Juro. En 1930 li havis la taskon pri Historio de la roma juro en la Universitato de Ĝenovo. Post tri jaroj li revenis Sicilion kiel provperioda profesoro en la Universitato de Messina kaj en 1936 li estis vokita al la katedro pri Roma juro en la Palermo-a Fakultato, la sama kie li sin registris en 1919. En 1948 oni lin elektis fakultatestro de la Fakultato pri Juro kaj post du jaroj Rektoro de la universitato, ofico, kiun li tenis ĝis la forpaso. Al li oni ŝuldas la aĉeton de la tereno de Aleo de la Sciencoj, la starigon de la Fakultato pri Pedagogio, pri Arkitekturo kaj multe aliaj katedroj, krom la potencigon de la sciencaj ekipaĵoj, de la klinikoj kaj de la laboratorioj, kiujn la milito detruis. Ankaŭ li estis Prezidanto de la Centro Studoj Filologiaj kaj Lingvaj Sicilaj fondita en 1951. Ĉambro en la Fakultato pri Juro de la Universitato de Palermo estas dediĉita al li.


Noto 7 La poŝtstampo havas la n.ron 12-2 kaj la folieto la n.ron 550 a) kaj 550 b) de la Katalogo ELF-AREK, respektive por la helbruna kaj la verda koloro.




Insigno de la kongreso



Folieto de la kongreso



La aliĝkarto en la kongreso



29a Itala Kongreso de Esperanto: poŝtkarto eldonita de la Sicilia Delegacio



La enirejo de la kongreso.

De maldekstre: prof. Franko Telone, adv. Rosario Abate, d.rino Maria Rizzo, s.ro Germano Gimelli
(Foto el: L'Esperanto n.ro 54 nova serio, septembro - oktobro 1958, paĝo 70)



La Sekretarieca tablo por akcepti geesperantistojn

De maldekstre: s.ro Riotta, prof.ino Dazzini, kav. Zacconi, s.rino Zacconi, libr. Rosario Inzerillo,
adv. Rosario Abate, f.ino Anna Curatola, d.rino Maria Rizzo
(Foto el: L'Esperanto n.ro 54 nova serio, septembro - oktobro 1958, paĝo 69)

La Organiza Komitato konsistis el:

- Prezidanto: adv. Rosario Abate, Prezidanto de la Palermo Esperantista-Grupo;
- Vic-prezidanto: adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino, Delegito de la I.E.F. por Sicilio;
- Sekretario: s.ro Jozefo Riotta, Sekretario de la Palermo Esperantista-Grupo;
- Membroj:
 - . prof. kav. Johano Alonzo;
 - . prof. kav. Ignazo Amedeo Arnao;
 - . prof.ino Anna Di Giovanni;
 - . s.ro Amerigo Garaffa;
 - . prof. Francisko Geraci, Prezidanto de la Catania Esperantista-Grupo;
 - . d.ro Johano Gravagna, Prezidanto de la Klubo "Filatelitoj Konstruaj" de Palermo;
 - . d.ro Alfonso Iacono;
 - . s.ro Rosario Inzerillo;
 - . d.ro Emilio La Fisca, Provinca Direktoro Turisma Entrepreno de Palermo;
 - . prof. Elio Maddalena;
 - . d.ro Gasparo Maltese, Inspektoro de la Aŭtonoma Turisma Entrepreno de Palermo kaj de Monreale;
 - . prof. kom. Giuseppe Nicosia;
 - . d.ro Antoneto Occhipinti;
 - . kav. Francisko Pantaleone;

- . prof. d.rino Jozefino De Vita;
- . d.ro Piero Pirri Ardizzone, Administra Direktoro de "Giornale di Sicilia" (Ĵurnalo de Sicilio);
- . d.rino Maria Rizzo;
- . d.ro Franko Romano;
- . adv. Antoneto Sammartano, Prezidanto de la "Italaj Konstruaj Filatelistoj";
- . prof. Franko Tulone, prezidanto de la Ŝaka Esperantista-Grupo.

Ĉeestis Vic-Urbestro prof. Anselmo Diliberto, mons. Francisko Di Salvo kiel reprezentanto de Ĉefepiskopo de Palermo mons. Ernesto Ruffini (San Benedetto Po, Mantova, 19 januaro 1888 - Palermo, 11 junio 1967)⁸, Kolonelo kuracisto Pecorella, Direktoro pri Sano, kiel reprezentanto de Gen. Lodoviko Donati, Militestro de Sicilio, kom. adv. Mikaelo D'Armata, prof. Simone Lo Sciuto kaj prof. Jakobo Murana, respektive Prezidanto de Blindaj Instituto kaj Regiona Sekretario de la Nacia Asocio ties kategorio, kiu havas multajn grupojn de esperantistoj.



La regalado en la Komunumo

De maldekstre: adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino, prof. Georgo Canuto,
mons. Francisko Di Salvo, Kol. Pecorella

(Foto el: L'Esperanto n.ro 54 nova serio, septembro - oktobro 1958, paĝo 71)

El la kongresanoj, krom prof. Canuto, ĉeestis prof. Eduardo Zumbo, I.E.F.-Sekretariestro, prof. Korrado Grazzini, Direktoro de la I.E.I., prof. Luizo Minnaja⁹, kom. Franko Ramolfo, Ĝenerala Sekretario de la Torina Gazetagejo "Internacia Gazetaro".

Adv. Abate, dum la inaŭgura akcepto kiu okazis antaŭe en la Gazetara Klubo, tre dankis la Prezidanton de la Klubo, d.ro Johano Zanasi, kiu, ĉiam sentema okaze de aliaj regionaj manifestacioj por disvastigi Esperanton, disponigis la ejojn de la Klubo por la Kongreso.

Antaŭ ol aŭtoritataj reprezentantoj de la Kongreso prelegu, prof. Diliberto salutis - sia kaj de la urbo Palermo - la ĉeestantojn. Li aldonis, interalie, esti feliĉa partopreni en la manifestacio kaj pro la ideala kaj socia signifo ke ĝi prezentis, kaj pro la grava kultura evento ke tiu manifestacio konstituis.

Post prof. Diliberto prenis la parolon adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino, Regiona Delegito de la I.E.F., kiu salutis plene da kontento pro la multnombra ĉeesto en la laboroj de la Kongreso de italaj kaj eksterlandaj partoprenantoj. Adv. Boscarino, kiu faris lian intervenon antaŭe esperante kaj poste itale, estis tre aplaŭdita je la fino de lia parolado.

Noto 8 En la Sanktejo "Madono de Rimedo", en Placo Sendependo (Palermo), estas gardita la korpo. Sur la memorŝtono estas skribite: "+ ERNESTO KARDINALO RUFFINI - Ĉefepiskopo de Palermo - kaj - Apostola Administranto en Piana degli Albanesi - N(askita) 19.I.1888 - M(ortinta) 11.VI.1967 - Tiom multe li amis Madonon dum sia vivo - ke li volis esti sepultota apud Ŝi".

Noto 9 Luizo Minnaja (Pisticci, Matera, 21 januaro 1899 - Romo, 27 januaro 1974), funkciulo de Ministerio pri Trezoro. Li estis Sekretario de la Roma Esperantista-Grupo. Li verkis poeziaĵojn okaze de la siciliaj kunvenoj. Li edziĝis al Karolina Minjo-Paluello (Venecio, 15 novembro 1903 - Milano, 6 novembro 1984) kaj el ilia geedziĝo naskiĝis du filoj: Nikolao kaj Karlo.

Poste ekparoladis prof. Canuto¹⁰, kiu komencis dirante kiel popoloj ĉiam eksentis la neceson utiligi unu internacian lingvon por komuniki pli facile inter ili. Sed dum filozofoj kiel Cartesio deziris novan kaj kunan lingvon por transdoni iliajn filozofajn postulatojn, alia pensulo, Francisko Soave¹¹, titolulo de la Katedro pri Literaturo kaj Filozofio ĉe la Universitato de Parma, sopiris al universala lingvo, kiu, per ĝiaj karakterizoj de funkcia simpleco, devis esti proprajon de ĉiuj. Tiu estas la celo de Esperanto.

Prof. Canuto daŭrigis sian paroladon parolante pri la esperanta literaturo kaj pri la sennombraj revuoj en Esperanto, kiujn oni eldonas en la tuta mondo kaj kelkaj el ili havas tutmondan disvastiĝon, kiel la duonmonata "Heroldo de Esperanto". "Ĉio kutime estas ignorita de la publiko - finis la oratoro - ĉar ankoraŭ li perdiĝas kiel akvoguto en la senlima mondkultura aktiveco, sed tio ne malhelpas ke ekzistas vera popolo de geesperantistoj".

Rapidan ateston pri tiu lasta jeso de la fama fakulo oni havis kiam, alvokitaj al mikrofonoj ĉe la tablo de la Prezidado, oni ekaŭdis la voĉojn, en la Salonego de la Memorŝtonaj, de s.rinoj: Bankovacki Radimila (Jugoslavio), Carin Leona (Novi Sad), Hertz Olga (Kopenhago), Carl Olga (Aŭstrio), Correy Renée (Besançon), Nikolova Velicka (Bulgario), de pastro Katolik Kilisesi (Iskenderun), de s.roj Gil-Pollares Evaristo (Barcelono), Gassy Marin (Britio), Vronchat Gabriel (Francio), Delegitoj de la Esperantistaj Federacioj de Jugoslavio, Danio, Aŭstrio, Turkio, Francio, Hispanio, Bulgario, Britio, kiuj, parolinte tre bone en Esperanto, kunportis en la Kongreson la saluton de ilia lando kaj ilia persista volo de geesperantistoj.

La unua parto de la ceremonio, kiu estis antaŭiĝita per Sankta Meso celebrita en la preĝejo de la Martorana kaj en kiu partoprenis ĉiujn kongresanojn, finis matene per regalado oferita de Vic-urbestro prof. Diliberto en la ejoj de la Komunumo.

La tago la 28an, post turisman rondvojaĝo tra la urbo Trapani, kongresanoj¹² atingis Erice-on, kie ili estis gastoj en honora manifestacio, kiu okazis en la ejo de "Cinema della Vittoria" (Kinejo de la Venko) en la ĉeesto de la lokaj Aŭtoritatoj. En tiu okazo prof. Canuto faris prelegon pri la graveco de la Internacia Lingvo. Kongresanoj, poste, estis gastoj en la turisma vilaĝo oferita de la Urbestro de Erice (Erjĉe), prof. Antoneto De Stefano.

Noto 10 Georgo Canuto (Torino, 3 junio 1897 - tie, 29 oktobro 1960), magistriĝinta pri Medicino kaj Kirurgio (1920) kaj Juro (1924). Li estis profesoro pri Jurmedicino en Perugia (1934), Parma kie ankaŭ li estis Rektoro de la Universitato (1950 - 1956). Prezidanto de la Parma Esperantista-Grupo (1950 - 1959), Prezidanto de la I.E.F. (1956 - 1960), de la U.E.A. (1956 - 1960), Esperanto-Akademiano. Prof. Canuto interesiĝis pri la lingvo Esperanto ekde la jaro 1925 kaj baldaŭ li ekinstruis la lingvon. Je lia honoro oni starigis la "Fonduso Canuto"-n, kiu, en la sino de la U.E.A., subtenas la aliĝon en la asocio fare de geuloj el la landoj ekonomie postrestintaj.

Noto 11 Francisko Soave (Lugano, 10 junio 1743 - Pavia, 17 januaro 1806), itala filozofo de svisia origino. En 1774 li eldonis *Prikonsideroj pri la starigo de universala lingvo*, en kiu, Soave teoriigas la formadon de lingvo, kiu konsentu al ĉiuj homoj komuniki inter ili, malgraŭ li sin deklaris skeptika kiel la eblo enmeti tute nova validan universalan lingvon, proponante la uzon de la franca lingvo, kiu laŭ lia diro havis la rolon de universala lingvo de la klerularo, iam ekskluziva de la latina lingvo.

Noto 12 Antono De Salvo (Romo, 8 junio 1942), filo de sicilaj gepatroj elmigrantaj de Messina, antaŭ ol la milito. Li alproksimiĝis al Esperanto en 1956, kiel li skribis al mi la 5an de decembro 2003: "En la unuaj tagoj de decembro 1956, mi iris al la domo de mia benkkunulo en la Gimnazio por deprunti vortaron, mi vidis ke sur la pordo de la vidalvidulo de la ŝtuparplaceto estis skribita tabuleto "Delegito de Internacia Esperanto-Ligo" (estis kav. Luizo Minnaja). Ĝi estis la klasika "fulmofrapo", mi sonis ĉe la pordo, mi petis sciigojn, mi estis akceptita tre afable, kaj mi ricevis donace gramatikon.". En la 29a Nacia Kongreso (Palermo, 23 - 27 aŭgusto 1958) li ekzameniĝis en la duagrada, sed "la ekzamena Komisiono, mirigita antaŭ tiu knabo en ĵinso, kiu ĝuste parolis esperante pri la plej malsamaj temoj, donis al mi la triagradan diplomon.". Juĝisto de la Itala Kortumo pri Kontoj, redaktoro de la elsendo en Esperanto de RAI Internacia, li okupis dum pluraj jaroj oficojn en la nacia esperantismo (I.E.F., I.E.I.) kaj internacia (I.K.U.E., kies estrarano li restis ĝis Februaro 2012).

Nikolao Minnaja (Romo, 9 januaro 1938), magistriĝinta pri Fiziko ĉe la Universitato de Pizo en 1960, diplomita pri Fiziko en la Supera Nornala Skolo dum la sama jaro. Libera docento pri Strukturo de la Materio de 1969. En 1954 li akiris la diplomon por instrui Esperanton. Li okupis diversajn oficojn en Esperantismo: T.E.J.O.-sekretario (1955 - 1960), Respondeca Direktoro de la revuo "L'Esperanto" (1963 - 1975), I.E.F.-prezidanto (1975 - 1979), Membro de la Fakultatestra Konsilio de la I.E.I. de 1969.

Korrado Gracini (Florenco, 8 decembro 1883 - tie, 21 septembro 1971), bankoficisto, esperantisto de 1907. Li estis Direktoro de la I.E.I. (1925 - 1963).

Franko Galbusera (13 aŭgusto 1901 - 17 junio 1991), U.E.C.I. kaj I.K.U.E.-sekretario, I.E.F.-konsiliano.



Postkongresa ekskurso al Segesta. D.ro Antono De Salvo kaj prof. Nikolao Minnaja



Postkongresa ekskurso al Erice: E.-afiŝo de la urbo Erice.
S.ro Franko Galbusera kaj prof. Korrado Grazzini


La 3a Regiona Kunveno okazis en Taormina la 8an kaj la 9an de aprilo 1961.

Ĉeestis reprezentantoj el la naŭ provincoj kaj d.ro Petro Rizzo, tre konata de esperantistoj. La regiona delegito, adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino, faris mallongan prelegon pri la sukcesoj akiritaj laste de la Movado kaj sciigis ke la grupo de Trapani havas la nomon "Cordero De Montezemolo". La oratoro memorigis la simpatio de prof. Canuto por la siciliaj manifestacioj, en kiuj li ĉeestis tre volonte, ekzemple la ekskurso al Agrigento (1947), la 1a Kunveno en Catania (26 - 27 majo 1951) kaj la 2a en Palermo (6 - 7 aprilo 1957), la Kongreso en Palermo (23 - 27 aŭgusto 1958).


En Aŭlo de palaco Corvaia, la respondeculoj de la Katedroj kaj la provincaj delegitoj kunvenis sub la prezidado de la regiona delegito por pridiskuti la temojn de la tagordo koncernantaj la pliigon pri la organiza laboro en Sicilio.



3a kunveno de la siciliaj esperantistoj: poŝtkarto de la kunveno



3a kunveno de la siciliaj esperantistoj: karteto kun la poezajo "Taormina" de prof. Johano Bruno.
- Eksterna parto -



3a kunveno de la siciliaj esperantistoj: karteto kun la poezajo "Taormina" de prof. Johano Bruno.
- Interna parto -

Taormina

Serene ripoziga sorĉa loko
inter lazur' kaj verdo milnuancoj:
pala lazur' bluaĵoj ondo-dancaj,
delikata verdet', malhela floko,

Ebenaj grundoj je fruktar' bonŝancoj,
Krutaj obismoj el timiga roko,
Naturo jungis vin en praepoko,
Vi harmonias kvazaŭ versaj stancoj.

Rifoj jen nudaj, jen vestitaj ŝaŭme,
Inter maro kaj suno diamantas,
Kvazaŭ el ond' naskita pradiino.

Golfo brodita olivarbe, palme,
Ciprese, ĝoj' eterna, vin mi kantas,
Vin, ho dieca loko, Taormino.

Johano Bruno

(Trad. Clelia Conterno)

Taormino

Sorĉa loko plaĉa kaj ripoziga
Inter verda kaj lazura je ĉiu nuanco,
Pizverda kaj verda malhela koloro,
Hellazura kaj lazura ĉiam ŝanĝa.

Randoj de tero bela kaj ebena,
Apikaj krutaĵoj, kiuj tre timigas.
Sed la tuto estas kombinita de Naturo
Per agrabla kaj alloga harmonio.

Diversaj rifoj pitoreskaj kaj plaĉaj
Tie en la fundo, kie estas la marbordo,
Kun mallimigita horizonto kaj pintoj kaj golfetoj.

Nekomparebla dia farado,
Ĉiama ĝojo de la homaro
Estas, ĉi tie en Sicilio, Taormino

Johano Bruno

Taormino

Sorĉa loko plaĉa kaj ripoziga
inter verda kaj lazura je ĉiu nuanco,
pizverda kaj verda malhela koloro,
hellazura kaj lazura ĉiam ŝanĝa.



Randoj de tero bela kaj ebena,
apikaj krutaĵoj, kiuj tre timigas.
sed la tuto estas kombinita de Naturo
per agrabla kaj alloga harmonio.

Diversaj rifoj pitoreskaj kaj plaĉaj
tie en la fundo, kie estas la marbordo,
kun mallimigita horizonto kaj pintoj kaj golfetoj.

Nekomparebla dia farado,
ĉiama ĝojo de la homaro
estas, ĉi tie en Sicilio, Taormino.

Giovanni Bruno

La 4a Esperantista Kunveno, organizita de la loka grupo kunlabore kun esperantistoj el Agrigento, okazis en Sciacca la 5an, 6an kaj 7an de majo 1962.



4a kunveno de la siciliaj esperantistoj: poŝtkarto de la kunveno

La "interkona vespero" okazis en la kafejo-ĝardeno "La Nassa" (La Naso) apud la Termoj Seluntine. La postan tagon, la 6an de majo, oni celebris la Sanktan Meson kaj pastro Kaloĝero Augello legis kaj komentis esperante la Evangelion. Poste, en la urbodomo, la Urbestro salutis esperantistojn en la nomo de la urbo promesante, samtempe, titoligi straton al Esperanto. Dankinte, la regiona delegito, adv. Boscarino, prelegis pri: "Kiu estos la internacia helpa lingvo, kun aparta rilato al latino kaj al Esperanto". Ĉeestis ankaŭ s.ro Viktorio Dall'Acqua¹³, kiel reprezentanto de la Milana Esperantista-Klubo.

Post la socia tagmanĝo en la Hotelo Miramare, adv. Jozefo Stanislaŭo Boscarino dankis la organizintojn de la kunveno kaj precipe prof. Franko Tulone, prof. Ĝino Lupo, inĝ. Antono Ciotta kaj s.ro Johano Basile. La vespero finis per dancofesto en la Salono "La Conchiglia" (La Konko) kie oni elektis "Ino Esperanto 1962" fraŭlinon Maria Roza Parisi de la grupo "Cordero Di Montezemolo" de Trapani.

Ankaŭ la 5a Regiona Kunveno okazis en Sciacca la 27an, la 28an kaj la 29a de junio 1964, organizita de prof. Franko Tulone, Prezidanto de la loka esperantista-grupo.



5a kunveno de la siciliaj esperantistoj: poŝtkarto de la kunveno

La kunveno malfermiĝis sabaton la 27an en la tipa ejo "Al Porticello" (Ĉe Haveneto) por la "interkona vespero".



Momento de la "interkona vespero"
De maldekstre: d.ro Emilo Paladini, prof. Johano Bruno, prof. Anselmo Diliberto, Katarina Colletti, prof. Franko Tulone, adv. Ademaro Barbiellini Amidei

Noto 13 Viktorio Dall'Acqua (Palidano, 25 majo 1934 - Milano, 7 aŭgusto 1979), instruisto. En 1956 li transloĝiĝis al Milano ĉe "Corriere della Sera" (Kuriero de la Vespero) kie poste li iĝis funkciulo. Prezidanto de la milana Junulara Sekcio ĝis 1962 kaj de tiam sekretario de la Esperantista Klubo. Dum ĉirkaŭ jardeko I.E.F.-konsiliano. Instrua membro kaj akademiano de la I.E.I.. Li skribis multajn artikolojn pri la internacia lingvo eldonitaj en diversaj ĵurnaloj, li partoprenis en multaj poeziaj konkursoj (*La Verda Ĉapeleto* estis muzikigita de Gianfranco Molle), li gvidis multenombrajn Esperanto-kursojn, ankaŭ ĉe privataj radioj. Kunaŭtoro, reĝisoro kaj aktoro de la kabareta spektaklo "Gazetaĉo", aranĝita en la Festosalono de la Kazino de Saint Vincent fare de la milana junularo en 1963 okaze de la Kongreso. Sukceso, kiu lin emigis poste sin ripeti: en Trento en 1973 per *Senĉenaj dialogoj* kaj en Verono en 1974 per *Senkatenaj dialogoj*. Li verkis ankaŭ *Esperanto: Revolucio de la vorto* (1977). Li lasis mane skribita vortaron Esperanto-Itala.

Malgraŭ la malproksimo de Sciacca, en la Kunveno partoprenis krom siciliaj geesperantistoj, multe da aliaj devenintaj el la kontinento, kiuj akceptis la inviton de la grupo "G. Chiappisi".

Ĉeestis prof. Johano Bruno, Prezidanto de la grupo de Catania, prof. Mario Dazzini¹⁴ de la I.L.E.I., el Massa, prof. Johana Canepa, Esperanto-Katedranino de Palermo, adv. Ademaro Barbiellini Amidei, Prezidanto de la I.E.F., prof. Ĝino Lupo, Esperanto-Katedrano de Sciacca.

Dimanĉon, post la Sankta Meso celebrita de pastro Kaloĝero Augello en la Paroka Preĝejo Sankta Francisko de Paola, kunvenintoj iris al la belegaj ejoj de la Urbodomo kie okazis la laboroj. La konsilia ĉambrego estis tre dekoraciita per esperantaj paneloj, flagoj kaj tolostrioj, el kiuj elstaris la centra panelo prezentante la Mondon sur kiu estas granda konstruanta E, ĉirkaŭita per fantasmagoria ringo farita de ĉiuj naciaj flagoj.

Posttagmeze adv. Barbiellini malkovris la marmoran memorŝtonon de "Plaĝo Esperanto". Ĉe la fino de la tago, vespere, ĉiam ĉe "Al Porticello", okazis dancofestoj kie oni elektis "Ino Esperanto" fraŭlinon Katarina Colletti. La orkestro, estrita de muzikinstruisto Kaloĝero Modica, malfermis kaj fermis la dancofeston per plenumo de la esperanta himno "La Espero".



Laboroj de la Kunveno en la Konsilia Ĉambro de la Komunumo de Sciacca. Prelegas la I.E.F.-prezidanto

La 38a Itala Esperanto-Kongreso okazis de la 16a ĝis la 22a de septembro 1967 en Catania¹⁵.




38.a Nacia Kongreso de Esperanto: nomkarto kaj glumarko de la kongreso

Noto 14 Mario Dazzini (Pietrasanta, Lucca, 16 julio 1910 - Massa, 31 majo 1985), magistriginta pri Juro ĉe la Universitato de Pizo, post la milito li transloĝiĝis kun la familio al Massa, kie la fratino Katina (... , 8 januaro 1917 – Massa, 17 februaro 1997) obtenis instruan katedron ĉe la loka Liceo. Li eklernis Esperanton 17jara, perfektigonte poste kun prof. Campetti el Lucca. En 1953 li iĝis la unua Prezidanto de la Massa Esperantista-Grupo. En 1972 li kreis la Esperantan Nacian Bibliotekon de Massa dank'al la donacoj de fratoj Bruno kaj Elio Migliorini, de adv. Jozefo Stanislao Boscarino el Ragusa, de prof. Korrado Grazzini, de Luizo Minnaja kaj aliaj. La biblioteko estis inaŭgurita la 25an de oktobro 2008 en la Rezista Salono de la Doĝa Palaco.

Noto 15 La propaganda folieto havas la n. ron 704 de la Katalogo ELF-AREK.

Geesperantistoj renkontiĝis sabaton vespere en la "Eden Bar" (Kafejo Edeno). La sekvantan tagon, post la Sankta Meso en Esperanto en la Preĝejo Sankta Domenico, okazis la inaŭguro de la Kongreso en la luksa salono de la Sicilia Elektra Entrepreno (S.E.E.).



38a Itala Kongreso de Esperanto.
Ciklostilita letero subskribita de prof. Johano Bruno



38a Itala Kongreso de Esperanto.
Inaŭgura ceremonio: Hon. Lupis salutas nome de la Registaro
(Foto el: L'Esperanto n.ro 118, oktobro 1967, kovrilo)

Krom 250 italaj geesperantistoj kaj 19 reprezentantoj el 8 alilandoj el kiuj: Olga Carl (Aŭstrio), Jiri Kolejka (Ĉeĥio), Robert Coyac (Francio), Zorica Ignjatovic (Jugoslavio), Gertruda Kowlczyk (Pollando), Eta Szasz (Hungario), Pedro Aguilar Sola (Venezuelo) kaj Rossi (Respubliko Sankta Marino), kiuj salutis esperante, ĉeestis d.ro Humberto Stoppoloni¹⁶, I.E.F.-Prezidanto, d.ro Mario Dazzini, I.L.E.I.-Sekretario, adv. Attilio Vaona¹⁷ kaj prof. Karlo Agostini¹⁸, respektive Prezidanto kaj Ĝenerala Direktoro de la I.E.I., d.ro Dino Fabris¹⁹, de la Internacia Asocio de Esperantistaj Ĵurnalistoj kaj s.ro Ĝermano Gimelli²⁰ de la I.F.E.F..



Partoprenantoj en la kongreso
(Foto el: L'Esperanto n.ro 118, oktobro 1967, paĝo 107)

Plie ĉeestis: hon. Jozefo Lupis, Subsekretario de Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, kiel reprezentanto de la Regado; hon. Antonello Dato, kiel reprezentanto de la Regiono Sicilia kaj sen. Mario Martinez, Subsekretario pri Komerca Floto. Unu el la pli grava temo koncernis: "Esperanto en la lernejoj en Italio kaj eksterlande - Leĝpropono n.ro 1816".

Post la saluto de prof. Johano Bruno, Prezidanto de la L.K.K. (Esperantista-Grupo "Giorgio Canuto", strato Plebiscito n.ro 784, Catania), d.ro Stoppoloni malfermis la Kongreson petante la regadajn reprezentantojn apogi, ĉe la koncernaj Aŭtoritatoj, la leĝproponon por enmeti Esperanton ankaŭ en la italajn lernejojn. Hon. Giuseppe Lupis, surprizita sed ankaŭ kontenta por la partopreno de reprezentantoj de aliaj Landoj, difinis la kongreson "internacia kongreso".

Hon. Lupis substrekis interalie la graveco de la internacia lingvo "por ne senti sin barbare unu la alian. Oni esperas - finis hon. Lupis - ke Esperanto plenumu rapide la tutan vojon, kiun ĝi devas plenumi, precipe hodiaŭ ke la internacia turismo, iĝita impona socia fenomeno, ekkontaktas nomojn de diversaj Landoj; la komuna lingvo utilos por kompreniĝi facile".

Noto 16 Humberto Stoppoloni (27 februaro 1917 - Pistoia, 6 aŭgusto 2001), honora membro de U.E.A. de 1992. Esperantisto de 1951, li estis tre gravulo de la itala movado kaj dum tridek jaroj li surprenis diversajn oficojn en la I.E.F., pri kiu li estis Prezidanto de 1966 ĝis 1971. Dum la jaroj sepdekaj li havis la kuraĝon alfronti gravan ŝanĝon de la statuto kaj post longa kaj kompleksa proceduro li obtenigis por la I.E.F. oficialan agnoskon kiel organizo sen profita celo. Li laboradis dum longa tempo kun gefratoj Dazzini por peti al parlamento la oportunon enmeti la instruadon de Esperanto en la italaj lernejoj. Li skribis informan materialon kaj italigis diversajn dokumentojn en Esperanto.

Noto 17 Attilio Vaona (Zevio, 20 septembro 1880 - Torino, 1969), advokato, esperantisto de 1911. Li estis unu el la fondintoj de la Grupo de Verona kaj unu el la plej aktiva italaj esperantistoj de la unua postmilito. En la 6a kongreso de Trento (16 - 18 aŭgusto 1921) li estis nomumita I.E.F.-Prezidanto. Tre bona kaj konvinka parolanto, li propagandis, precipe en la turisma kampo. Transloĝiĝinta al Torino, en 1966 - 1967 li estris la I.E.I.. Ankaŭ li estis Lingva Komitatano.

Noto 18 Karlo Agostini (Monghidoro, 1906 - Modena, 21 septembro 1996), instruisto pri itala kaj latina lingvo. Li alproksimiĝis al Esperanto okaze de la 24a Nacia Kongreso de Bologna (6 - 10 septembro 1952). Li estis Prezidanto de la grupo de Bolonjo (1955 - 1957) kaj Ĝenerale Direktoro de la I.E.I..

Noto 19 Johano Dino Fabris (Venecio, 29 decembro 1917 - Cittadella, Padova, 13 marto 1996), klera kaj mensa homo, ĵurnalisto, esperantisto. Ekde la jaro 1950 li engaĝiĝis kun persisto kaj konvinko por disvastigi Esperanton. Li sukcesis en la triagrada ekzameno en Sassari okaze de la 26a Nacia Kongreso (24 - 29 Aŭgusto 1954). Prezidanto (1967 - 1977) kaj Ĝenerale Direktoro (1977 - 1996) de la I.E.I., U.E.A.-Delegito por Ĵurnalismo kaj Rotario, Sekretario (1958 - 1991) kaj Kasisto (1958 - 1995) de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (T.E.Ĵ.A.). En la 80a U.K. de Tampere (23 - 29 julio 1995), li estis elektita honora membro de la T.E. Ĵ.A..

Noto 20 Ĝermano Gimelli (Fiumana, Forlì, 4 novembro 1913 - Gallipoli, Lecce, 12 novembro 1999), I.F.E.A.-Sektretario, Redaktoro de la rilata revuo (1954 - 1984) kaj Prezidanto (1984 - 1995). En la 40a U.K. (Bolonjo, 30 julio - 6 aŭgusto 1955), li estis L.K.K.-ano.



La prelego de hon. Jozefo Lupis
(Foto el: L'Esperanto n.ro 118, oktobro 1967, paĝo 109)

Hon. Dato parolis pri la problemo de la eksterlandaj vortoj sub la vidpunkto de la trudo per milita aŭ politika devigo, dezirante ke Esperanto povu iĝi la duan lingvon de ĉiu lando, de Eŭropo ĝis la tutaj mondaj Landoj. Sen. Martinez proponis kurson por instrui Esperanton en la Komerca Floto, itala kaj de ĉiuj maraj landoj, ĉar maristoj, dum iliaj renkontiĝoj en ĉiu loko de la mondo havu simplan ilon por kompreni kaj libere interfratiĝi. Dum la oficialaj salutoj, kav. Luizo Minnaja recitis sian poeziaĵon en Esperanto, himnadante al Sicilio kaj al Catania, al Bellini kaj al Verga, al Dionisio kaj al Marninjoj, finante bondezirojn al la kongreso per la devizo "Antaŭen Esperanto!"

SALUTO AL CATANIA

Jen estas ni en mit-lulilo vera,
kie senhalte kun potenc' arkana,
plej ofte milda, foje tre kolera,
pulsadas l' inkandeska kor' Vulkana.
Unua, tie, geniul' inventa,
gajiĝis Dioniz' per vit-nektaro
kaj nimfoj dum la nokto lunarĝenta
dancadas inter rifoj ĉe la maro.

En ĉi fekunda tero idilia,
kiskaresata de la ora suno,
flavruĝas la fruktaro opuntia,
l' oranĝo blanke floras kun parfumo.
Hirundoj gaje trilas flugparade
al la tutjare daŭra belsezono,
kaj la cikadoj sunebriaĵe ade
tra l' foliaro grincas per kanzono.

Naskiĝis en ĉi urbo dibenata
Bellini, kiu vestis dolĉmuzike
la vortojn de l' animo delikata
de Norma kaj Amina artlirike;
kaj Verga, la aŭtoro sentoplana
pri l' region' verisma rakontisto:
gloroj de vi, Catania, suverena,
ĉefloko pitoreska de l' turisto.

Mondo feliĉa, rava land' prospera,
en l' eŭfonia helpa idiomo
al vi alvenu sur l' ondar' etera
la korsaluto de Radio Romo.
Al la Kongreso nun komenciĝanta
la bondezir': "Antaŭen, Esperanto!"

Luizo Minnaja

Dum la kongreso estis inaŭgurita oficiale "Strato Esperanto" en Catania.

Ĉi tiu la fina rezolucio de la 38a Itala Esperanto-Kongreso.

"La italaj geesperantistoj kunvenintaj en Catania de la 16a ĝis la 22a de septembro, prezentas agrablan respektaman dankon :

- al la Itala Regado pro la interesiĝo al problemo pri la internacia lingvo kaj favore al disvastigo de Esperanto, pere de la oficiala reprezento de Subsekretario ĉe Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj hon. Jozefo Lupis;
- al Regado de la Regiono Sicilio, kiu volis montri sian konsenton en la ĉeesto de hon. Antonello Dato;
- al hon. sen. Mario Martinez, Subsekretario ĉe Ministerio pri Komerca Floto pro sia partopreno en la Kongreso kaj pro la manifestita solidareco al la esperanta ideo;
- al la lokaj Instancoj kaj Turismaj Entreprenoj de Catania, Siracusa kaj Taormina pro la gastama akcepto kaj pro la estimo montrita al kongresanoj;
- konstatas la pliiĝitan intereson al Esperanto en la politikaj kaj kulturaj medioj per multenombraj favoraj esprimoj manifestitaj rilate al la leĝpropono n.ro 1816 kaj en aliaj okazoj;

- konfirmas la neceson enmeti Esperanton inter la lingvaj instruadoj, kiel logika adekvatigo de la lernejo al la sociaj necesoj de la moderna homaro;
- altiras la atenton de la koncernaj turismaj organoj, kaj ministeriaj kaj periferiaj, pri la praktika efiko de la internacia lingvo Esperanto por la pozitiva solvo de problemoj rilataj al amaturismo kaj favori la plej bona utiligo de la libera tempo, per pli intima kaj rekta interŝanĝo de konoj kaj de ideoj inter popoloj diversaj; ekde la venontan jaron 1968, deklarita jaro de la internacia turismo;
- konstatas en la internacia lingvo la pli taŭgan rimedon por la redukto de la ekonomiaj kostoj konsekvencaj kun la industriaj kaj komercaj rilatoj kaj por la kulturaj ŝanĝoj inter laboristoj de lando diversa.

Konstatante ke la supreindikitaj enkondukoj estas kunigataj de rimarkinda atendo de la publika opinio informata:

- invitas la koncernajn Ŝtatajn Organojn ekzameni serioze la lingvan problemon kaj favori la solvon per la uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, precipe en la turisma, komerca kampo kaj la kulturaj ŝanĝoj, per adekvata paralela preparo de gejunuloj ankaŭ en la lerneja kampo;
- sin turnas precipe al la honorindaj parlamentanoj de la oka konstanta Komisiono de la Ĉambro de la Deputitoj kaj de la sesa konstanta Komisiono de Senato, kaj kune kun sinjoro Ministro pri Instruado ĉar, en la kadro de la respektivaj kompetencoj kaj dum la nuna parlamenta periodo, volu pozitive klopodi por la baldaŭa aprobo de la leĝpropono n.ro 1816 celante konsenti la enmeton de Esperanto inter la lingvoj, kiujn oni povus instrui en la duagrada itala lernejoj, sen aldoni financajn instruajn kaj lerneajn ŝarĝojn”.

De la 19a ĝis la 26a de septembro 1970 okazis la 41a Itala Esperanto-Kongreso. La kongreso, organizita de la Torina Esperantista-Grupo, okazis krosade sur la motorŝipo “Caraiba” (Karajba), kun startejo kaj alvenejo al Genova, kun halto ankaŭ en Palermo (17an de septembro). En ĉi tiu okazo oni obtenis la poŝtstampo ²¹.

Ŝifhaltejoj: Barcelono, Palma di Maiorca, Palermo, Biserta, Kapreo, Napolo.



41a Nacia Kongreso de Esperanto: la speciala poŝtstampo

Por celebri la 125an datrevenon de la eldono de la Unua Libro, la gramatiko kiu aperis la 26an de julio 1887, la 79a Itala Esperanto-Kongreso okazis en Mazara de la Valo de la 17a ĝis la 25a de aŭgusto 2012, pluretna kaj plurkultura urbo pro la ĉeesto de geuloj, kiuj de longe establiĝis tie, precipe el la apuda Tunisia.

Noto 21 La poŝtstampo havas la n.ron 19 de la Katalogo ELF-AREK.



La flugfolio de la kongreso

Per la kongreso en Mazara de la Valo, post tiu en Torino (20 - 26 aŭgusto 2011), la tuta itala teritorio estis simbole trairita de geesperantistoj por memorigi ankaŭ la 150an datrevenon de la Unueco de Italio.

La kongrestemo estis "Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof". La frazo estis citaĵo el la inaŭgura parolado de Lodoviko Lazaro Zamenhof, la eltrovinto de Esperanto, okaze de la 1a Universala Kongreso, kiu okazis en Boulogne-sur-Mer en 1905 (7 - 12 aŭgusto).

Dum sia parolado Zamenhof diris interalie ke "ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marŝo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj".

Dum unu semajno Mazara de la Valo estis la pulsanta koro de Esperanto en Eŭropo kaj en Mediteraneo, ĝuste pro ĝia specifa geografia pozicio. Dum sia parolado, urbestro Nikolao Cristaldi diris ke "ni estas feliĉaj akcepti la 79an Italan Esperanto-Kongreson. Mazara de la Valo kandidatiĝas plentitole iĝi Ĉefurbo de Mediteraneo, ĉar pluretna kaj plurkultura urbo. La elekto de la I.E.F. fari en nia tero ilian kongreson ne estas tute hazarda, sed ĝi atestas la mondan gravecon, ke nia Urbo estas surprrenonta".

Urbestro Cristaldi manifestis ekde la unuaj kontaktoj entuziasman konsenton al la esperantistaj idealoj, kiuj kuniĝas kun karakterizoj de pluretna kaj plurkultura urbo, akcepta kaj aperta. Urbo, kiu la Urbestro mem deziras povu iĝi urbo-simbolo de Esperanto.



La inaŭguro okazis la 18an de aŭgusto en la Konsilia Ĉambro de la Komunumo, en la ĉeesto de la Urbestro, dum la kongresaj laboroj okazis en la Hotelo Hopps.

En la kongreso aliĝis ĉirkaŭ 350 geesperantistoj, kaj, malgraŭ iuj ne povis partopreni, almenaŭ la duono venis el eksterlando, ne nur el Eŭropo sed el ĉiuj kvin kontinentoj, kaj oni povas ĝin konsideri internacia.


Multenombre estis la aktvecoj enmetitaj en la kongresan programon: prelegoj, kursoj por komencantoj kaj kursoj progresantaj, teatraĵo, muziko, ekskursoj al Trapani kaj provinco kaj al Agrigento, disdono de la unuagrada atestoj al partoprenantoj en la kursoj.

Memore al la manifestacio, oni eldonis du poŝtkartojn kun la speciala poŝtstampo de la kongreso, enmetita en la sekcion "Trapani en la filatelio"²².

Noto 22 La poŝtstampo estos enmetota en la ELF-AREK katalogon dum la venonta ĝisdatigo.



La poŝtkartoj de la kongreso kun la speciala poŝtstampo



La Udine'a kastelo kun la steleo al Zamenhof.
Poŝtkarto private poŝtstampigita de Martinez en Trapani

Dank'al la disponeblo de la Urbestro, en Mazara de la Valo ekde la komenco de la jaro oni gvidas kaj, pro la multenombraj petoj, daŭrigas Esperantajn kursojn, ankaŭ en la venonta jaro en preskaŭ ĉiuj lernejo de la urbo.

Corso della lingua internazionale

esperanto

... per conoscere un mondo migliore

CORSO POMERIDIANO
MARTEDI
 h. 15.00-16.30
 A PARTIRE DA
 MARTEDI 20 NOVEMBRE

CORSO PRESERALE
MARTEDI
 h. 17.00-18.30
 A PARTIRE DA
 MARTEDI 20 NOVEMBRE



CEI CENTRO DI ESPERANTO E INTERCULTURA
 Palazzo della Legalità - Via Giotto 23
 Mazara del Vallo

Il corso consisterà di 20 lezioni settimanali di 90 minuti e porterà ad una conoscenza della lingua di livello A1, quindi a poter leggere e parlare correntemente, in modo elementare.
 Per informazioni, tel. 0923-908830, cei@esperanto.it

La afiŝo pri la kursoj

En la monato de majo 2012, la skribanto estis ekzamena Komisionano okaze de la ekzamenoj faritaj en la tagoj 23a kaj 24a respektive ĉe la Scienca Liceo "G.P. Ballatore" kaj ĉe la Mezgrada Lernejo "Jozefo Grassa".

La 2an de marto 2013, en la salono Tinozzi de la Provinco Pescara, oni aljuĝis al la urbestro de Mazara de la Valo, Nikolao Cristaldi, la premion "Guerriero di Capestrano" rekompence al lia disono favore al Esperanto, de la kongreso ĝis la kuntreno de la urbanoj.

Motivo: "Entuziasme, malavare kaj vasta horizonto kultura li aliĝis al idealo de Esperanto, konstituante en lia Komunumo fandujon da pluretnaj interesoj perfekte akordigeblaj kun la celoj de Esperanto, favorinte la malfermo de multenombraj kursoj pri la internacia lingvo, precipe en la lerneja medio, kaj aliaj iniciatojn al ĝia kunligitaj".

Je la fino de la ceremonio urbestro Cristaldi diris: "Estas por mi honoro la premion al mi aljuĝita, kiu estas rekompenco ankaŭ al miaj samurbanoj pro la plurkultura, pluretna kaj plurlingva rolo de la urbo Mazara de la Valo".

La premio "Guerriero di Capestrano" (Militisto de Capestrano) estas rekompenco, kiu estas aliŝota de la I.E.F. al tiu, kiu aparte distingiĝis "en la eltrovo de novaj perspektivoj por la solvo de la internacia komprena problemo".

La premio estas reproduktado de militisto de Capestrano, skulptaĵo el ŝtono kaj marmoro de la VIa jarcento a.K., de la antikva arto, trovita en nekropolo de la antikva urbo Ofena, Nord-Orienta loko de Capestrano kaj prezentante militiston de la antikva Piĉena popolo.

Estis ĉi tiuj la plej gravaj aktivecoj okazitaj en Sicilio kaj aliaj okazis. Por sekvi ordon, oni preferas skribi pri ĉiu provinco, reliefigante tiujn, kiuj tre klopodis por la disvastigo de Esperanto en Sicilio.


PROVINCO DE PALERMO



Palermo

PALERMO

La pioniro de Esperanto en Sicilio estis d-ro Vitangelo Nalli (24 aprilo 1876 - Ĝenovo, 1932),¹ kuracisto, Asistento ĉe la Pediatria Kliniko de la Reĝa Universitato. Li ekpropagandis Esperanton en Palermo jam de la jaro 1903 al liaj internaj kolegoj de la malsanulejoj, kaj poste iom post iom gajni pli vastajn kampojn. En 1903 li fondis la "Sicilia Federacio Esperanta"-n² kaj povis gvidi kurson ĉe universitata aŭlo, kun centoj da vizitantoj³.



1a Festeno esperantista. Invitilo de Stefano La Colla

Li atingis por la Federacio la patronecon de Urbestroj de Palermo kaj Siracusa kaj tiun de la Ministerio pri Instruado, kaj ankaŭ li sukcesis atingi ĉar la Provinca Studestro konsideru en la instruistaj konkursoj kiel meritkvalifiko la ateston pri partopreno en kursoj de Esperanto. Tiamaniere li antaŭigis tiujn, kiuj estas nun la Forĝaj Kreditoj.

En junio 1906 li ekeldonis la monatan revuon - tute redaktita en Esperanto - titolita "Idealo"⁴, kiu regule aperis dum unu jaro, kaj en 1907 li presigis *Teoria-praktican Esperanton kurson en ok lecionoj*.



La kurso en 8 lecionoj de d-ro Vitanĝelo Nalli: kovrilo, interna kaj lasta paĝo de la kovrilo

La Junula Amikaro Esperantista dume fondis “Notizie Esperantiste” (Esperantaj Sciigojn) (1908 -1909)⁷, modesta monata informilo kvarpaĝa, tute itallingve, kiu, laŭ la intenco de la fondintoj, pri ĝia ne multekosta prezo (100 kopioj po 2,50 liroj, afranko inkluzivita) ĝi devis esti sendota fare de lokaj grupoj al ĉiuj “esperanteblaj”.



La 1a numero de la informilo

El la informilo oni eldonigis nur 7 numerojn ĉar ĝi ĝuis malmultan krediton ĉe la italaj esperantistoj kaj ĝi ne donis la rezultojn, kiujn oni sin atendis. Oni decidis transformi la informilon en tute veran propagandan ĵurnalon kaj oni eklaboris tiele.

La eldono rekomenciĝis en junio 1921 kaj ĝi raportas la statuon de la Palermo Esperantista-Grupo datita la 31an de aŭgusto 1919. Estris ĝin Stefano La Colla dum la Direkcio kaj la Administrado estis ĉe Domenico Sarullo (strato Del Vespro, Bieno Gentile). La Estraro konsistis el: prez. Stefano La Colla, vic-prez. prof. Luizo Borello, bibl. pastro Gaetano Abratozzato, sekr. libr. Domenico Sarullo, adv. Nikolao Di Minica.

Sekve de la kunveno de la 15a de februaro 1909, la “Junula Amikaro Esperantista” iĝis “Palermo Grupo Esperantista”⁸, “Notizie Esperantiste” ĉiam estis eldonitaj, unika esperanta folio tiama en Italio, kaj ĝi alprenis klaran pozicion kontraŭ Ido⁹ kaj idistoj, kiuj, estritaj de Paŭlo Lusana, gajnis terenon.

La 17an de aprilo 1910 estas faritaj novaj elektoj por renovigi la sociajn oficojn. Estas konfirmata en la ofico Prezidanto d.ro Vitanĝelo Nalli kaj la 15an de majo 1910 estas atribuitaj la oficojn al la Estraro: anstataŭas prof.on Calderara, forpasita antaŭ nelonge, Johano Castiglia vic-prez.; Mikelanĝelo Ugo Collotti, kas.; Salvatore De Rosa, bibl.; Stefano La Colla, sekr..

Noto 7 Respondeca Direktoro estis Anĝelo De Simone.

Noto 8 Ĉeestis en la kunveno Henriko kaj Johano Castiglia, Stefano La Colla, Eŭgeno Morreale. La Ĝenerala Kunveno por la atribuo de la socij oficoj, prezidita de Stefano La Colla, okazis la 4an de aprilo 1909. Estis elektitaj: prez. d.ro Vitanĝelo Nalli; estraranoj: prof. Ignazo Calderara, Stefano La Colla, Johano Castiglia, Eŭgeno Morreale; Kontrevizoroj: Mikelanĝelo Ugo Collotti, Salvatore De Rosa. La 24an de aprilo 1909, okaze de la unua Estrara kunveno, estas atribuita la oficon: vic-prez. prof. Ignazo Calderara, kas. Johano Castiglia, bibl. Eŭgeno Morreale, sekr. Stefano La Colla.

Noto 9 En la kunveno de la 20a de junio 1909 la grupo “decidas skribi al Direktoro de la “Tribuna illustrata” (Tribuno ilustrita) protestante kontraŭ la procedo de Triola, kiu publikigis artikolon pri “Ido”, utiliginte la nomon “Esperanto” kaj skribi al “samideanoj” de Romo, ĉar ili klopodu malebligi la daŭrigon de la Ido-kurso”.


Poste la palerma grupo fondis "Itala Esperantisto"-n¹⁰, dumonata deksepaĝa revueto itallingve kaj en Esperanto, kiu ekaperis en Palermo en julio 1910. Respondeca Direktoro estis Anĝelo De Simone. Per letero de la 19a de novembro 1910 tiele skribas Zamenhof el Varsovio: "Reveninte el Ameriko hejmen, mi trovis kun plezuro la no. 1 de la "Itala Esperantisto". Koran dankon! Mi deziras al la gazeto plej bonan sukceson, longan kaj sanan vivon. Mi esperas ke la Palermo Grupo Esperantista kaj ĝia organo laboros en plena konsento kun la aliaj Italaj esperantistoj kaj dank'al via penado ni baldaŭ havos la ĝojon vidi fortan kaj bone organizitan Italan Esperantistaron".

Sed por la malmultaj esperantistoj de Palermo tiu estis multekosta, kaj kiam d.ro Alfredo Stromboli¹¹ en 1912 petis sekurigi ĝian eldonon, transportonte la revuon al Genova, sidejo de la Itala Esperantista-Asocio, la peto estis akceptita tre bone. De tiam ne povas plu paroli pri Palermo Esperantismo. Ĉiam estis kelkaj aktivaj esperantistoj, sed ĉiuj klopodoj por revivigi la Movadon, la multenombraj provoj pri kursoj, ne donis kion oni atendis.

En la ĝenerala kunveno de la 19a de februaro 1911 Stefano La Colla sciigas, ke d.ro Vitanĝelo Nalli estis vokita pro aferoj al Monastir kaj li ne povos daŭrigi la oficon kiel prezidanto de la grupo. Estis proponista kaj aprobata la nomumo de d.ro Nalli kiel Honora Membro. Estas anoncitaj la balotoj por la nova Estraro. Estas elektita prez. prof. Alfredo Grasso. La 20an de februaro 1911 oni atribuas la oficojn al la Estraro: vic-prez. Johano Castiglia, sekr. Mikelanĝelo Ugo Collotti, bibl. Eŭgeno Morreale, kas. Ignazo Caruso, revizoro Leopoldo Maisano.

La 28an de majo 1911 Ignazo Caruso demisias ĉar baldaŭ atendas vokon por okupi oficon. Anstataŭas lin Leopoldo Maisano, lia vico anstataŭita de Salvatore De Rosa kiel revizoro.

1912 estis jaro de ne aktiveco pro longa malsano de Stefano la Colla, animo de Esperantismo en Palermo. Plene resaniginta, oni reprenis la esperantan aktivecon kaj en la kunveno de la 22a de junio 1913, ĉe la "Asistfondaĵa Socio por Studentoj", oni decidis rekonfirmi la aktualan Estraron por doni la eblecon legi la Statuon. Fine la dokumento estas aprobata unanime.




Nota 10 La revuo enhavis 8 paĝojn itale kaj 8 esperante, krom la kovrilo por la propagando. La itala parto enhavis propagandan artikolon, la plej gravajn eksterajn kaj italajn sciigojn. La esperantista parto enhavis korespondajon el la eksterlando pri Esperantismo kaj el Italio, literaturajn artikolojn. Stefano La Colla estis taskita skribi leteron al italaj esperantistoj por havi propagandon kaj abonojn.

La revuo "Itala Esperantisto", "Fervore, Fidele, Konstante", por propagandi Esperanton, aperita en 1910 kiel organo de la Palermo Grupo Esperantista, poste transiĝis al Genova, kie iĝis, de 1912 ĝis 1914, la revuo de la Itala Esperantista-Asocio (Redakcio kaj Administrado supreniro Pallaiuoli n.ro 13), kaj poste ĝi estis interrompita pro malfacilaĵoj diversaj. En 1919 la Centra Plenuma Komitato de la I.E.F., en Genova, reprenis ĝian eldonon konfidante la direkcion al s.ro Demetrio Achillini. Do, estis "Itala Esperantisto" (de marto ĝis novembro 1919) la unua vera organo de la I.E.F.. Ĉe la fino de la jaro 1921 "Itala Esperantisto" definitive ĉesigis eldonojn; la I.E.F. elektis kiel propra oficiala organo la revuon "L'Esperanto" de la eldonisto Paolet el Sankta Vito al Tagliamento. En tiu revuo regule ĝis 1929 oni eldonis la oficialajn anoncojn inkluzivitaj la I.E.F.-Bultenojn, iafoje senditaj ankaŭ aparte kiel eliraĵo el la revuo.

La kondiĉoj por transdoni la respondecon de la revuo estis pridiskutitaj kaj aprobitaj de la Centra Komitato de la I.E.F. dum la asembleo de la 30a de aŭgusto 1921 kaj subskribitaj en Venezia la 5an de septembro 1921 fare de la Ĝenerala Sekretario Francesco Pizzi por la C.K. de la I.E.F.. Pri la dokumento vidu: Giacomino Martinez, *Esperantismo en Friulo*.

Francisko Pizzi (1880 - 1946), bibliotekisto ĉe la Venecia Sanktamarka Biblioteko, tre aktiva en la itala katolika movado (Ĝenerala Sekretario de I.K.U.E.), I.E.F.-sekretario. Ankaŭ li estis ŝatata origina poeto (*La Protektanto*, 1932).

Nota 11 Alfredo Stromboli (Borgo Sankta Sepolcro, 28 oktobro 1875 - Volterra, Pizo, 7 novembro 1949), doktoro pri Kemio. En marto 1911 li fondis la Ligurian Esperanto-Instituton (kiu poste unuiĝos al la Katedro).



mio sociale sarà devoluto per la propaganda
 dell'Esperanto
 Il segretario
 Stefano La Colla

La statuto

En la kunsido de la Estraro de la 23a de junio 1913 prof. Alfredo Grasso demisias kiel prezidanto, ne povonte pro liaj okupoj partopreni en la laboroj de la Estraro. Anstataŭas lin inĝ. Johano Castiglia, dum la aliaj oficoj estas: bibl. Mikelanĝelo Ugo Collotti, kas. Leopoldo Maisano, sekr. Stefano La Colla. Samtempe oni decidis ke la kunvenoj okazos ĉiu vendredo, post la 21.30, en la "Caffè del Massimo" (Kafejo ĉe Massimo).

Por la sekvontaj jaroj oni ne havas sciigojn kaj nur la 11an de julio 1920 estis reorganizita la palerma grupo per la elekto de: prez. prof. Stefano La Colla, vic-prez. prof. Luizo Borello, bibl. pastro Gaetano Abratozzato, kas. adv. Nikolao Di Minica, sekr. libr. Dominico Sarullo.

En la sekva jardeko oni ne havas aliajn sciigojn.

Per iniciato de Francesco Pantaleone delegito U.E.A., en la jaro 1929 estis restarigita la "Palerma Grupo Esperantista". En la unua kunveno, okazita en la domo de adv. Dominico Cavaleri, estis elektitaj: prez. Luizo Sarullo, studento pri Inĝenierio; vic-prez. Mikaelo Guccioni, studento pri Juro; sekr. Francisko Pantaleone, komercisto pri religia arto; kas. Vincenzo Accordi, studento pri Juro; konsiliano, Alfredo Gravogna, studento pri Inĝeniero. La grupo konsistis plejmulte de universitatanoj. Provizore la kursoj estis gviditaj en la kabineto de adv. Cavaleri, en strato Candelai n.ro 57, kaj Francisko Pantaleone donis lecionojn.

Oni ne havas sciigojn pri tiu periodo.

En printempo 1952, sub la gvidado de adv. Boscarino el Ragusa kaj la laborema partopreno de kav. Francisko Geluardi kaj de s.ro Lucio Sinagra, aro da esperantistoj kaj da simpatiantoj de la urbo grupiĝis.

En la monato de septembro la grupo jam havis tridekon da anoj kaj la propaganda ago estis en la komenco. Estis malfermita inda sidejo en la urbocentro, en strato Mariano Stabile n.ro 242 B, kies inaŭguro partoprenis la Regiona Delegito, adv. Boscarino, akceptita kun simpatio. Oni planis programojn por la pliigo de la grupo kaj por la plifortigo de Esperantismo en Sicilio.

En la jaro 1953 la grupo de Palermo, efektivigante radikalan aranĝon, elektis kiel Prezidanton adv. Rosario Abate.

La 22an de decembro 1957, en Palermo, la Regiona Delegito, adv. Jozefo Stanislao Boscarino, memorigis la naskiĝan tagon de L. L. Zamenhof prelegante pri la signifo de la tago dediĉita al la "Homaj rajtoj".

En la jaro 1958 en la sino de la grupo naskiĝis la Juna Sekcio, kies prezidanto estis nomumita s.ro Franko Barone.

Estraro por la jaro 1962: prez. d.ro Rosario Abate, vic-prez. prof.rino Jozefino De Vita-Picciotto, sekr. d.ro Carcone, kas. libr. Inzerillo, konsilianoj d.ro Tripodo, d.ro Giordano kaj inĝ. Pirrone, sindikoj s.ro Perricone, s.ro White kaj s.rino Fenati, reprezentanto de la Juna Sekcio s.ro Mezzatesta.

Por festi la 10an datrevenon de la grupa naskiĝo, oni organizis Interregionan Kunvenon al kiu partoprenis grupoj el Sciacca, Trapani, kaj Agrigento, ĉi lasta estrita de geom. Ciotta. En la Salono de la Gazetara Klubo adv. Jozefo Stanislao Boscarino prelegis pri "Esperanto kaj ĝia nuna funkcio". En la Kunveno ĉeestis ankaŭ d.ro Rizzo, pioniro de Esperantismo en Sicilio.

La 4an kaj la 5an de junio 1966 okazis en Palermo la Kunveno de Prezidantoj de la esperantistaj grupoj siciliaj en la kadro de la manifestiĝo ĉe la Mediteranea Foiro. En la laboroj, en la Gazetara Klubo, partoprenis reprezentantoj el Palermo, Catania, Sciacca, Agrigento kaj Trapani. Okaze de la Mediteranea Foiro, la Esperantista-Grupo "Trinakria" de Palermo (strato Dante n.ro 71) organizis grandan ekspozicion de libroj, revuoj kaj korespondan Esperanto-kurson dank'al la dispono donita de la Foira Direkcio, kiu montris grandan intereson por la lingvo kiel internacia propagandilo de la Foiro mem.



La afiŝo de la 23a Mediteranea Foiro



23a Mediteranea Foiro: Esperanto-stando kun Nikolao La Colla



Vito kaj Nikolao La Colla

La tagon la 5an, antaŭ multenombra publiko da esperantistoj kaj ne, en la Palaco de la Kongresoj de la Foiro prof. Johano Bruno el Catania prelegis pri: "Esperanto, vivanta lingvo en la kultura, komerca kaj turisma mondo". Sekvis publika debato, al kiu partoprenis advokatoj, ĵurnalistoj kaj instruistoj. Prezidanto estis adv. Vaona dum prof. Nunzio Parisi, Estro de la Esperanto-Katedro de Trapani, respondis al la demandoj de la publiko.

La 11an de februaro 1967, en la Gazetara Klubo, s.ro Perricone Pirandello prelegis pri: "Vidpunktoj pri la Internacia Lingvo". Poste d.ro Rosario Abate kaj prof.ino De Vita-Picciotto respondis al la demandoj de la publiko.

En la jaro 1967 la esperantista grupo de Palermo povis inaŭguri novan sidejon dank'al la estraro de la Klubo "Kulturo kaj Progreso", kiuj disponigis iliajn komfortajn ejojn en la tre centra avenuo de la Libertà, en la najbaraĵo de la Angla Ĝardeno. La inaŭgura ceremonio okazis posttagmeze de la 25a de majo 1967. El la invititoj estis ankaŭ hon. Natale Di Piazza kaj estranoj de la Klubo "Kulturo kaj Progreso".

Hon. Di Piazza parolis tre favore pri la leĝo por la instruo de Esperanto, lingvo kiun li konsideras efika helpo por niaj elmigrintoj en eksterlando, kiuj, pro la lingva baro, havas multajn malfacilaĵojn integriĝi en ilia nova labormedio. El la multenombraj junaj ĉeestantoj, estis la Esperanta-kursanoj de prof.ino De Vita-Picciotto, kiuj estas organizantaj, ene de la grupo, la Junan Esperantista-Sekcion, kiel kontinueco de la Palermo'a Esperantismo.



Hon. Natale Di Piazza dum lia parolado
(Foto el: L'Esperanto n.ro 113 - 114, majo - junio 1967, paĝo 59)

La 21an de Decembro 1968, en la sidejo de la Regiona Esperanto-Centro, en Palermo, kunvenis Prezidantoj de esperantistaj-grupoj siciliaj. Prezidis la kunvenon kav. prof. Franko Tulone el Sciacca, kiel Delegito de la I.E.F., por starigi Interregionajn Konsultiĝajn Komitatojn. Ĉeestis kiel honoraj invititoj ankaŭ hon. Muccioli (de la Parlamento Sicilia), prof. Giordano (Estro de la Centro Studoj SIG), prof. Silvestri (de la Porinstruista Lernejo "Finocchiaro-Aprile"). Prof. Tulone proponis la naskiĝon de Interregiona Konsultiĝa Komitato por la 5a Zono "Sicilio-Kalabrio". Oni elektis: sekr. adv. Abate, vic-sekr. prof. Bruno. La unua okupiĝos pri Sicilio, la dua pri Kalabrio. Plie, oni decidis titoligi la Sicilian Komitaton "Regiona Centro de Esperanto", sendependa de la grupo "G. Zacconi", kiu daŭras vivi en Palermo kiel la aliaj grupoj.

Grava perdo por la Movado en Palermo estis tiu de adv. Rosario Abate, forpasita la 16an de Septembro 1969 en Como, dum li partoprenis en la 40a Itala Esperanto-Kongreso (13 - 18 septembro). La 16an de oktobro 1969, en la Preĝejo Purgatorio de Sciacca, la esperantista-grupo "G. Chiappisi" celebrigis Sanktan

Meson, antaŭita per parolado de prof. Franco Tulone por memori lin. Li estis unu el la organizintoj de la 29a Kongreso de Palermo (23 - 27 aŭgusto 1958), kiam apenaŭ de 6 jaroj li sin dediĉis al Esperanto. En Palermo, lia aktiveco elvokis la intereson de la publiko por la solvo de la lingva problemo. Por liaj kapabloj lin oni elektis kiel sekretario de la 5a Interregiona Konsultiĝa Komitato. Li estis U.E.A.-delegito. En lia loĝejo en strato Tripoli n.ro 15, havis la sidejon la palerma grupo. La 21an de oktobro 1962, dum lia geedziĝa vojaĝo, li partoprenis en la inaŭguro de "Strato Zamenhof" en Pistoia¹².

La 6an de aŭgusto 2001 forpasis prof. Humberto La Corte. Post kiam mi havis la adreson de s.ro Vito La Colla, en la unuaj tagoj de julio la skribanto, de Udine, ekkontaktis profesoron por interparolo dum mia somerumo en Palermo. En la ĉefurbo, el la filo de profesoro mi eksciis la malfeliĉan sciigon kaj mi ne povis ekkoni lin.



Prof. Humberto La Corte apude Nikolao La Colla.
Klub-sidejo: 21 aprilo 1981

Unu el la plej gravaj pioniroj de Esperantismo Sicilia kaj Nacia estis Stefano La Colla, naskita la 2an de oktobro 1889 en Salemi, urbeto je 35 kilometroj de Trapani. En 1910, post la subita morto de la patro¹³, Vito, la familio transoliĝis al Palermo kie Stefano La Colla, kune kun la frato Nicolò, daŭrigis la studojn. Kaj en ĉi tiu urbo fratoj La Colla adreŝis ilian vivon laŭ flankaj vojoj. Stefano La Colla jam junaĝe distingiĝis pro sia talento. Post la klasikaj studoj li eklaboris ĉe la Ŝtata Arkivo, en Palermo, kie li restis ĝis la unuaj monatoj de la jaro 1929 sin dediĉante precipe al paleografio.



Stefano La Colla

Noto 12 Rosario Abate edziĝis kun Konĉetta Battaglia.

Noto 13 Serioza homo, kiu malofte ridis sed multe li amis siajn 6 gefilojn (2 inoj kaj 4 filoj): Vita, Karolina, Paskalo, Stefano, Nikolao, Francisko Vito. Alia filo forpasis kiam li estis dujara. El la "Subtenantoj" de la unua jartrio (1931 - 1933) de la "Itala Esperanto-Centro" estas la nomo de prof.ino Vita La Colla (1932 - 1933).



Foto de la jaro 1964, kie estas, ĉu lastfoje, gefratoj La Colla
 Sidataj ĉe la tablo: Stefano, Karolina, Francisko (Ĉiĉio), Emila (edzino de Paskalo), Paskalo,
 Vita (ekster la kadro, oni vidas nur la brakoj).
 Malantaŭe: Nikolao, Vito (filo de Nikolao), Johan-Paŭlo (filo de Pasquale)

Poste, pro lia profunda kaj vasta kulturo, li estis alvokita al Romo de Bruno Migliorini¹⁴ por kunlabori en la naskiĝanta “Enciclopedia Italiana” (Itala Enciklopedio) kie li laboris de la 27a de februaro 1929 ĝis la 31a de decembro 1938. Li estris la Bibliotekon de la Istituto kaj li redaktis multajn verkaĵojn de la Itala Enciklopedio pri: mezepoka kaj moderna Historio, Bibliotekoj, Bibliofilio kaj Bibliologio, Sporto, Literaturo kaj orientaj Civilizacioj, Lingvistiko kaj Romanidaj Literaturoj (vol. X, XIII, XIV, XVII, XIX, XX, XXII, XXIII, XXV, XXVI, XXVIII, XXX, XXXI, XXXV).

Malgraŭ li ne mastriĝis (li estis granda fakulo kun mirinda memoro kaj li konis 5 aŭ 6 lingvoj), li pruvis havi vastan kaj solidan kulturon kontribuante aktive al la redakto de la Enciklopedio, por kiu li verkis ankaŭ pri sia naskiĝa urbo, Salemi (Volumo XXXa) kaj, pri Esperanto, la biografion de Ludovik Lejzer Zamenhof, eltrovinto de la Helpa Lingvo Internacia Esperanto (Volumo XXXV) kaj ankaŭ pri “Pazigrafio kaj Pazilalio” (Volumo XXVI).

Koncerne lian intereson al Esperanto, en la prelego de Giovanni Treccani de la 10a de januaro 1931, okaze de la vizito de Mussolini, oni legas: “Jen... la Biblioteko estrita de prof. Stefano La Colla, grandvalora esperantisto”.



Stefano La Colla antaŭ Benito Mussolini


Noto 14 Bruno Migliorini (Rovigo, 19 novembro 1896 – Poggio Secco, 18 junio 1975), lingvistiko, universitata profesoro. Li sciigis pri Esperanto tre juna, post prelego, kiun prof. Aŭgusto Tellini faris la 14an de januaro 1913 en Rovigo. Li partoprenis en konkursoj pri tradukado kaj pri origina prozo kaj en Italio kaj en Hispanio. En “Internaciaj Floraj Ludoj” de la jaro 1914, li estis premiata por la verko *Utile alportota de helpa lingvo internacia al la komerco*. Li subskribis ĝin per la pseŭdonimo “Ĉu mi?”. Li estis Ĉefredaktoro de la Itala Enciklopedio. Li okupiĝis pri Lingvistiko kaj Literaturo.

Stefano La Colla estis kunlaboranto kun la Itala Enciklopedio ĝis la IIIa Apendico de la jaro 1961. Poste, post kiam li okupiĝis pri ekonomio tradukinte kaj editorinte du librojn por la eldonejo Sansoni en la jaroj 1933 - 1934¹⁵, de oktobro 1941 ĝis la jaro 1959 Stefano La Colla laboradis en Milano, ĉe la Buroo pri Studoj de la Itala Komerca Banko¹⁶.


En tiu milana periodo ne estas sciigoj pri lia ĉeesto en la Milana Esperantista-Klubo ĉar Stefano La Colla vizitis ĝin de tempo al tempo ĉar li estis pli okupita por la Federacio (li estis parto de la konsultiĝa Komitato de la Itala Esperanto-Revuo).

La *Manlibro pri Esperanto* enhavas lian "enkonduko al la eldonaĵo" (eldonita de: Esperanto- Propaganda Centro, Milano, 1961, 2a Eldono).

Li forpasis la 5an de februaro 1966 en Milano, kie li edziĝis en la jaro 1931. Li estis sepultita en Palermo la 10an.



Frontispico de la revuo



La sciigo pri la forpaso de prof. Stefano La Colla


Nota 15 Temas pri:

- La programa ekonomio: verkoj de diversaj verkistoj. Trad. S. La Colla kaj E. Peterlongo, Firenze, 1933;
- la kapitalisma krizo: verkoj de diversaj verkistoj. Trad. S. La Colla, Firenze, 1934.

Nota 16 Dum lia aktiveco ĉe la Comit (Itala Komerca Banko), Stefano La Colla sukcesis partoprenigi sesdekon da oficistoj de la banko en Esperanta-kurso.

Lia intereso por Esperanto komenciĝis jam knabe; li, fakte, sekvis la propagandon farita en Palermo de d.ro Vitanĝelo Nalli en la komenco de la jarcento kaj dum la periodo majo - junio 1905 li vizitadis kurson, gvidita de d.ro Nalli, en la Universitato de Palermo. Konstatinte ke Esperanto, pro ĝia simpla kaj genia strukturo kaj la harmonia fonetiko realigis la idealon, kiun li multe reves, li retrovis la tutan entuziasmon perdita kelkan jaron antaŭe leginte artikolon skribita en lingvo "Volapük".

En la jaro 1907, li naskigis kune kun aliaj esperantistoj de Palermo, el kiuj Johano Castiglia kaj Eŭgeno Morreale, la asocion "Junula Amikaro Esperantista", kiu en februaro 1909 iĝis "Palerma Grupo Esperantista". Stefano La Colla estis delegito U.E.A. jam de ĝia fondo (28 aprilo 1908) antaŭe en Palermo kaj poste en Romo kaj Milano kaj, en la jaro 1928, okaze de la 20a datreveno de la Asocio (28 aprilo 1908 - 1928), li estis nomumita Honora Membro. En la palaco de U.E.A., en Rotterdam, oni titolis ĉambron al li, dank'al la interesiĝo kaj donaco de la vidvino s.rino Averina Sforza.



20a datreveno de la U.E.A. (1908-1928)
Nomumo de Honoraj membroj

ĈAMBROJ DE LA CENTRA OFICEJO

Albert (arkivejo) de s-ino A. Albert	J. Heetkamp-Senstius (kuirejo) de s-ino J. Dunnewold-Ehrmann.
Arabio (TEJO) de d-ro Nassif Isaac	Hideo Shinoda (komputila ĉambro) de s-ro Hideo Shinoda
Aŭstralio (biblioteko kaj redaktejo) de Aŭstralia Esperanto-Asocio	Kanado (Biblioteko "Hector Hodler") de s-ino Dorothy M. Henderson
Edwin Burg (mangoĉambro) de s-ino J. Dunnewold-Ehrmann	Llech-Walter (librostokejo) de s-ro R. Llech Walter
Elfriede Ernst (grafikejo) de s-ino Elfriede Ernst	Minnaja (ĝeneraldirektora ĉambro) de Familo Minnaja
Epstein (ĝenerala administrejo) de s-ro Felix Epstein	Monte-Carlo (financa fako) de ges-roj Jos Derks
Frank Netrvál (volontula loĝoĉambro) de s-ro F. Netrvál	P.H. Mooij (stokejo) de s-ino Elfriede Ernst
	Nov-Zelando (ekspektejo) de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio
	Onisaburo Deguchi (libroservo) de Oomoto
	Riichi Kawakami (brokantejo) de s-ino T. Kawakami-Nielsen
	Salberg (TEJO-oficejo) de s-ro Erik Salberg
	Simon Salt (Biblioteko "Hector Hodler") de amiko de Simon Salt
	Stefano La Colla (direktora ĉambro) de s-ino A. Storza La Colla
	Svedujo (volontula loĝoĉambro) de Sveda Esperanto-Federacio
	Zamenhof (kunsidejo) de s-ino G.B.J. Mantlingh

U.E.A.: Ĉambroj de la Centra Oficejo

Dum la roma periodo li estis ankaŭ Prezidanto de la loka grupo¹⁷ kaj Prezidanto de la 27a Universala Kongreso, kiu okazis precize en Romo de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1935¹⁸.




2 3 1 4 5 6 7 8
27a Universala Kongreso: la inaŭgura prelego de prof. Stefano La Colla.

1. prof. Stefano La Colla, 2. Gen. Louis Bastien, 3. prof. Georgo Canuto, 4. Ernfrid Malmgren,
5. Teo Jung, 6. Jean Couteaux, 7. J.R.G. Isbrucker, 8. Julio Baghy

En decembro 1970 oni konfidis al prof. Karlo Minnaja²⁰ la taskon fari Redaktan Komitaton por reordigi la restaĵo de la verko kaj kompletigi la mankontan parton de la vortaro, ĝis ĝia eldono kiu okazis en marto 1996. Tio estis ebligita dank'al la nobleco de la vidvino s.rino Averina Sforza-La Colla²¹.

Stefano La Colla estis granda fakulo pri Esperanto kaj li estis intima amiko kun Bruno Migliorini, Georgo Canuto, Ivo Lapenna kaj Kálmán Kalocsay. Kun tiu ĉi lasta li korespondis tre multe pri la traduko de Infero (Dante, *La Dia Komedio*). Fine de la traduko Kalocsay sendis al li ekzempleron kun aŭtografa dediĉo tercine. Je la paĝo 8a de la antaŭparolo oni legas: "Grandan dankon mi ŝuldas al sinjoroj Stefano La Colla kaj Bruno Migliorini, kiuj bonvolis tralegi la tradukon el la vidpunkto de la lingva fideleco por forigi eventualajn lingvajn miskomprenojn. Dank'al ilia grava kaj ne anstataŭigebla helpo mi sukcesis elsarki plurajn malĝustaĵojn, precipe el la unuaj ok kantoj, dum kies traduko mia itala lingvscienco estis ankoraŭ tro freŝbakita. Ilia kortusa fervoro, kun kiu ili surpris la lacigan taskon de tekstokomparado, devigas min je danko apenaŭ esprimebla en vortoj".



La dediĉo de Kálmán Kalocsay

Historio de la itala movado Fratro La Colla kaj Kalocsay

Jam kelkfoje aŭdiĝis ĉe ni la plendo, ke neankoraŭ verkigis kompleta historio pri la esperantista movado en Italio. Iam nebulankronikon oni povas legi en la arkitektura "Enciklopedio de Esperanto"; kaj tre interesajn analizojn pri apartaj aspektoj, lenigpo aŭ lokoj, verkis kelkaj valoraj movadanoj. Inter ĉi lastaj ni aprezis la studojn de Briano, Migliorini kaj Siffer.

Nun al la nerika rikolto aldonigas interesa broŝuro, kiu ni ricevis de sam. Giacomo Martinez, el Udine. Temas pri ok-paĝa biografio de du el niaj plej konataj kaj altvaloraj pioniroj: fratoj Stefano kaj Nicolò La Colla. Ni ĝin ricevis kun la peto pri aperigo, sed tion ni ne povas fari pro la troa longo (la honoron de tiom longa nekrologo ricevis ĝis nun neniu eminentulo, lastatempe nek Contorno, Dazzini, Bertolotti, Marelli).

La verko enhavas ĉiukaze tre interesajn informojn pri la gravaj poresperantaj agadoj de la du elstaraj siciliaj fratoj. Pri Stefano, eminenta lingvisto, enciklopediisto, akademiano, aŭtoro de la fama (kvankam neankoraŭ finpretita) vortaro. Pri Nicolò, ĵurnalisto, senlaca gvidinto de multnombraj kursoj, fondinto de E-kluboj, flago de nia movado en Palermo.

La publikiga liveras plurajn sciindajn detalojn, inter tiuj, ekzemple, ke la E-klubo "Nova Espero Friuli", en Udine, aĉetis 517 librojn el la riĉa priesperanta biblioteko de frato La Colla, tiel savante probable disperdigintan trezoron.

Sed, laŭ nia opinio, la plej frandinda bombono en la broŝuro de sam. Martinez (ĉu mi povas lanci la neologismon "skupo", el la angla "scoop"?)

estas la publikigita poemo de Kálmán Kalocsay, nome la darkesprima versajo, kiu samtempe nia hungara bardo dediĉis al Stefano La Colla, por danki lin pro la konsiderinda kunlaboro oferita de nia akademiano al la tradukado de "La Infero" de Dante.

Ni opinias valore publikigi tiun poemon, tre valojne neankoraŭ konata, tiel kontribuante la kolektado de ĉiu verko de Kalocsay, por la (esperantista) baldau aperonta lia plena verkaro.



La verkon, kiun vi bonvolis legi, kompari, torni, faji korektante, pri kiu vi bonvolis klopodegi dum vi ĝin ekzamenis kant-al-kante, mi sendas nun dankante kaj donace: jen estas, prete, la Infero de Dante. Se eble trovus vi, ke tro aŭdace procedis mi en la vort-asimilo: mi petas, ke indulge kaj sagace vi pensu pri la granda malfacilo, pri la konzizo, pri l'vortaro riĉa, pri l'esprimarto de l'Dante-a stilo. Mi estus vere vere tre felika, se vi rekonus, ke por tia tasko vortar' vulgara estas nesulica, ĝin uzi, sole, gvidus al liasko. Nenun povas trafi do alifino pro l'novaj vortoj, tiu dika fasko neceso nepra estas, ne delikto. Kaj nun atendas mi pli time ol la senkulpa akuzito pri l'verdiko, pri via juĝo, ho STEFANO LA COLLA.

K. Kalocsay

Se iu historiisto aŭ scivilulo deziras koni pli funde la cititan broŝuron, jen la adreso de la verkinto: Giacomo Martinez, Viale Venezia, 396/3, 33100 Udine.

A.d.G.

P.S. — Ni rememorigas nofoje al la legantoj, ke ĉiu mate-

rialo por la revuo devas esti sendata al la redaktoro, en Como (la adreso operas regule kovritorse en la revuo). Evidente nenultaj estas la esperantistoj, kiuj atente legas nian organon, ĉar ĉiam multaj estas la artikoloj, informoj, anoncoj ktp. sendataj al la sekretariejo de IEF en Milano, tiel perdigante tempon por la sekva plusenadato al Como.





20 Karlo Minnaja (Roma, 19 marto 1940) doktoriĝis pri Matematikaj Sciencoj en Pizo en la jaro 1963. Profesoro pri Analitiko en la Universitato de Padova. Li estis dum kvin jaroj en la T.E.J.O.-estraro. Membro de la Internacia Akademio de Sankta Marino, Ĝenerala Direktoro de la I.E.I., I.E.F.-estrarano, Akademiano de Esperanto. Li esperantigis diversajn verkojn de italaj verkistoj, el kiuj: Karlo Goldoni *La Locandiera* (La Gastejestrino) (1981), Niccolò Machiavelli *Il Principe* (La Princo) (2008). Li verkis multajn eseojn kaj kompilis la *Vortaron Itala-Esperanto* (1996). En 1990 li estis ordenita per la kultura Premio de la Ĉefministreco.

Noto 21 La propono konfidi al prof. Minnaja la taskon rekontroli kaj ĝisdatigi la manuskripton de Stefano La Colla estis aprobita de la I.E.F. la 20an de decembro 1970, okaze de kunveno okazita en la Komerca Ĉambro de Genova (Placo De Ferrari n.ro 4). Por pli profunda sciigo, vidu *Historio-n de vortaro*, paĝoj 10a, 11a, 12a kaj 13a de la *Vortaro Itala-Esperanto* de prof. Carlo Minnaja (CoEdEs, 1996) kaj la artikolon de Wim Jansen kaj Marisa Jansen-Miglioli aperita en "Esperanto" n.ro 1086 (11), novembro 1996, paĝo 193a.

<p>La verkon, kiun vi bonvolis legi, kompari, torni, fajli kovertante, pri kiu vi bonvolis klopodegi dum vi ĝin ekzamenis kant-al-kante, mi sendas nun dankante kaj donace: jen estas, prete, la Infer' de Dante. Se eble trovus vi, ke tro audace procedis mi en la vort-asimilo: mi petas, ke indulge kaj sagace vi pensu pri la granda malfacilo, pri la koncizo, pri l' vortaro riĉa, pri l' esprimforto de l' Dante-a stilo. Mi estus vere vere tre feliĉa, se vi rekonus, ke por tia tasko vortar' vulgara estas nesufiĉa, ĝin uzi, sole, gvidus al fiasko. Neniun povas trafi do aflikto pro l' novaj vortoj, tiu dika fasko necese nepra estas, ne delikto. Kaj nun atendas mi, pli time ol la senkulpa akuzito pri l' verdikto, pri via juĝo, ho STEFAN' LA COLLA. K. Kalocsay</p>	<p>L'opera, che hai voluto leggere, confrontare, tornire, limare coprendo, della quale hai voluto occuparti, esaminandola canto per canto, ti invio ora con gratitudine e in omaggio: ecco, è pronto l'Inferno di Dante. Se forse troverai che ho proceduto con troppa audacia nell'accogliere parole: pensa, ti prego, con indulgenza e sagacia alla grande difficoltà, alla concisione, alla ricchezza di parole, alla forza di espressione dello stile di Dante. Sarei davvero molto felice, se riconoscessi che per tale compito non sono sufficienti le parole comuni, che, usate da sole, porterebbero all'insuccesso. Nessuno dunque può rammaricarsi per le parole nuove, tale abbondanza è assoluta necessità, non delitto. E ora, più timoroso dell'accusato senza colpa in ansia per il verdetto, attendo il tuo giudizio, oh STEFANO LA COLLA. K. Kalocsay</p>
---	--



La dediĉo de Kálmán Kalocsay al Stefano La Colla

Li donis sian kontribuajon ankaŭ okaze de la revizio pri tradukitaj verkoj de aliaj esperantistoj kiel *Kurioza okazaĵo* de Karlo Goldoni, esperantigita en la jaro 1933 de Mevo (pseŭdonimo de Rinaldo Orengo)²². La verko esperantigita poste estis ludita la 5an de aŭgusto 1935 okaze de la 27a Universala Kongreso en Romo (3 - 10 aŭgusto), per la reĝisoro de Julio Baghy. Por estonta memoro, oni citas geludantojn: Felikso Bertoletti (Filiberto), Elda Massarani (Giannina), Osvaldo Pagani (Riccardo), Ada Massarani (Costanza), Mario Ĉeffali (De La Coterie), Sara Parmeggiani (Marianna), Dante Cattaneo (Guascogna), Natale Rosso, sufloro.




Dediĉoj al prof. Stefano La Colla

Laŭ horloĝa direkto: d.ro A. Stromboli, *Kompleta gramatiko por la studo de la Internacia Helpa Lingvo Esperanto*; William Solzbacher, *Esperanto. The world interlanguage*; Francisko Azorin, *Universala Terminologio de la Arkitekturo*; Théophile Cart, *Vortoj de prof. Th. Cart*



Dediĉoj al prof. Stefano La Colla:
Gaston Waringhien, *Eseoj*; Théophile Cart, *Oficiala klasika libro de Esperanto*



La dediĉo de la Roma Esperantista-Grupo
(L. L. Zamenhof, *Originala verkaro*, 1929)

Noto 22 En la lasta paĝo estas citita la danko al Stefano La Colla "per tralegado de la presprovoj kaj valoraj lingvaj konsiloj".

Rinaldo Orenge (La Spezia, 13 novembro 1895 - Milano, 1991), elektronika inĝeniero. Li uzis aliajn pseŭdonomojn kiel Ro kaj Oro. Esperantisto de la jaro 1920, li estis unu el la fondintoj de la grupo de Brindisi kaj de La Spezia. Vic-prezidanto de la I.E.F. (1926 - 1928). En 1930 li fondis en Milano la oficejon "Esperanto-Centro Itala". Li esperantigis ankaŭ *La cena delle beffe* (La manĝo de la ŝercoj) de Sem Benelli.

Mi ekkonis Nikolao-n La Colla en la jaro 1983, dum miaj someraj ferioj: vigla maljunuleto 84jara, kiu, sola, tenis vivanta la Palerman Grupon Esperantistan "Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla"".



Nikolao La Colla

La Klubo, kiun li fondis en la jaro 1961 kun profunda kaj pasia interesiĝo, bone komenciĝis. Lokita komence en luita ejo en strato Principe di Villafranca n.ro 34 biso, la Klubsidejo poste estis transloĝigita al la domo de la fondinto en strato Jozefino Turrisi Colonna n.ro 9 kaj poste, de la jaro 1980, en strato Del Quarnaro n.ro 5: granda ĉambro, tapetita per esperantaj afiŝoj, kie estis longaj libroŝrankoj plene da esperantaj libroj, parto el ili hereditaj de la frato Stefano²³.

Tie, Nikolao La Colla ekgvidis multe da senpagaj kursoj al studentoj, profesiuloj kaj amatoroj prizorgante disdoni, al kursanoj, la instrumaterialon, kiun li mem pretigis kaj ciklostilis. Granda estis mia miro vidante kaj konstatante kiom da pasio kaj skrupoleco li havis pretigante la necesan materialon por doni lecionojn al liaj lernantoj.



Leterkapoj de Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla"





26 junio 1981: fino de la 1a kurso

Luma ŝildo de la Klubo "Stefano La Kolla" kaj la salono en la domo de Nikolao La Colla

Nikolao La Colla, naŭ jaroj pli juna ol la frato Stefano (li naskiĝis en Salemi la 30an de aprilo 1898, ĝemelo de Francisko-Vito, inĝeniero ĉe privata firmo de Palermo), post la abiturienta ekzameno, li militiris kiel volontulo dum la 1a Mondmilito batalante en Albanio. Li estis ankaŭ en Fiume, kun D'Annunzio, en la tempo de la itala okupado de legianoj (12 septembro 1919). Legiano li mem, li kolektis multajn aĵojn (fotoj, gazetoj, afiŝoj, aŭtografoj, k.t.p.) pri tiu aventura periodo.

Transloĝiĝinta al Torino, post kelkaj jaroj en la Komunumo li eklaboris por Radiocorriere kaj poste por la Gazzetta del Popolo (Popola Gazeto) kiel Redaktoro.

Edziĝinta en la jaro 1934, li havis du filojn: Vito kaj Marko.

Kiam eksplodis la 2a Mondmilito, li batalis en Kroatio kie li estis kaptiĝinta de germanoj kaj translokita al koncentrejo de Bolzano. Reveninte Italion post la fino de la milito, li faris diversajn laborojn kiel publicisto, turisma organizanto (li planis diversajn vojaĝojn okaze de la Universalaj Kongresoj de Esperanto: Malmö, Parizo, Munkeno, Oslo).

Post la forpaso de la edzino, Adriana Panini, en la jaro 1955 li revenis Palermo-n kaj tie li restis ĝis la forpaso okazita la 25an de Majo 1984, ankoraŭ lucida kaj aktiva.

Kiel la frato, ankaŭ li pasiĝis por Esperanto, ke en la jaroj 1932 - 1936, dum lia restado en Torino, li estis respondeca Direktoro de "L'Esperanto"²⁴.

Li partoprenis en diversaj Universalaj Kongresoj el kiuj: 25a Kolonjo (29 julio - 5 aŭgusto 1933), 33a Malmö (31 julio - 7 aŭgusto 1948), 35a Parizo (5 - 12 aŭgusto 1950), 36a Munkeno (4 - 11 aŭgusto 1951), 37a Oslo (2 - 9 aŭgusto 1952), 53a Madrido (3 - 10 aŭgusto 1968), 63a Varna (29 julio - 5 aŭgusto 1978) kaj en multaj italaj kongresoj.


En Palermo:

- li publikigis diversajn artikolojn pri Esperanto en la lokaj ĵurnaloj;
- li gvidis, en la jaro 1978, popolan Esperanto-kurson ĉe la privata radiostacio "Disco Club" (Disko Klubo), kun lecionoj ĉiu lundo kaj vendredo;
- li gvidis, en la jaro 1979, dumonatan kurson ĉe la loka televido "Telesicania" (Telesikanja);
- li pretigis, dum la lastaj jaroj de lia vivo, kompletan Esperanto-kurson (1a kaj 2a grado) konsistita el deko da tajpitaj paĝoj, disvastigata per la lokaj televidoj kaj gazetaroj.

Noto 23 Post kiam mi ekkontaktis s.ron Vito La Colla, en la jaro 1986 la grupo "Nova Espero Friuli" aĉetis parton el la libraro ĉar ili ne estu perditaj aŭ donitaj al neesperantistoj. Temas pri 517 libroj el la biblioteko de fratoj La Colla, enhavante literaturajn volumojn (romanoj, noveloj, poeziaĵoj) kaj verkojn diversajn originaj kaj esperantigitaj: historio de Esperanto, gramatikoj, vortaroj Esperanto-landoj diversaj, biografioj, turismaj broŝuroj, k.t.p.. Kelkaj el ili enhavas la dediĉon de la verkinto.


En la jaro 2017, pro la transloĝiĝo de la Fervojista Postlaboro, la grupo devis lasi la sidejon en strato Cernaia kaj, pro la malfacileco trovi alian senpagan ĉambron, oni estis devigitaj peti al la Urba Biblioteko "V. Joppi" la eblecon transloki, por la gardo, la Bibliotekon "Nova Espero Friuli". Nune la tuta materialo estas enmetita en la "deponejoj" de la "Joppi" atendente ke oni finas la restaŭradaj laboroj kaj akrotaj la bretaro kie ordigi la Bibliotekon "Nova Espero Friuli". Tio ebligis dank'al la dispono de d.ro Romano Vecchiet, Estro de la "Joppi" kaj de d.rino Franciska Tamburlini, respondeculino pri la Sekcio manuskriptoj kaj raraĵoj.

Noto 24 "L'Esperanto" - Informaj kaj komentaj revuo, strato Goffredo Casalis n.ro 25 (poste Corso Palestro n.ro 6). La monatrevuo (ĉiu 15 ĉiumonate), konsistita el 4 paĝoj je la grandeco de ĵurnalo, kostis 30 centimojn. La revuo anstataŭis la "Itala Esperanto-Revuo"-n, aperita ĝis la jaro 1931 kaj ĝi estis eldonita de la I.E.F., presita en Torino ĉe la presejo de la "Gazzetta del Popolo" (Popola Gazeto) (Eldona Socio Torina, Corso Valdocco n.ro 2) kaj estrita de Nikolao La Colla, ĵurnalisto.



19 aprilo 1979: kurso ĉe "Telesicania"

Li korespondis tre multe kun eksterlandaj esperantistoj kaj ofte li gastigis ilin hejme. Tion pruvas agendo plene da fotoj kaj dediĉoj faritaj de esperantistoj, kiujn li gastigis.



La dediĉo de la skribanto
okaze de la unua renkonto kun Nikolao La Colla

Sidejo de la grupo:

- Esperantista-Grupo, ĉe Stefano La Colla, strato Paolo Amato n.ro 2 (kunvenejo: Atrio Sankta Anna): 1926;
- Esperantista-Grupo, ĉe "Birreria Italia" (Bierejo Italio), strato Cavour: 1930;
- Esperantista-Grupo, ĉe "Caffè del Massimo" (Kafejo ĉe Maksimo): 1932;
- Palerma Grupo Esperantista, ĉe Rozario Abate-Miceli, strato Bara all'Olivella n.ro 58: 1954;
- Esperantista-Grupo, ĉe adv. Rozario Abate, strato Tripoli n.ro 15: 1957, 1958, 1960, 1961, 1962;
- Sicilia Esperanto-Klubo, strato Sammartino n.ro 72: 1957²⁵;
- Esperantista-Grupo "Jozefo Zacconi", ĉe d.ro Rosario Abate, strato Quintino Sella n.ro 29: 1966, 1968;
- Esperantista-Grupo "Trinacria" (Trinakrja), strato Dante n.ro 71: 1966, 1968²⁶;
- Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla", strato Principe di Villafranca n.ro 34 biso: 1961;
- Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla", strato Jozefino Turrisi Colonna n.ro 9: 1978;
- Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla", strato Del Quamaro n.ro 5: 1980, 1981, 1982, 1983, 1984;
- Esperantista-Grupo "Stefano La Colla", ĉe d.ro Francisko Paŭlo Picciotto, strato Sirakuzo n.ro 35: 1991, 1992, 1993, 1994, 1995.

Kursoj:

- 1922 Naŭtika Instituto (pastro prof. Gaetano Abratozzato);
- 1925 Radiotelegrafia Instituto "A. Volta" (prof. Stefano La Colla, Prezidanto de la Grupo);
- 1925 Kurso gvidita de Leonardo Palagonia eldonita en la universitata ĵurnalo "Goliardia" (Studentaro);
- 1952 Ŝtata Porinstruista Lernejo "G. Finocchiaro-Aprile" (placo Politeama), per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952²⁷, interkonsente kun la Provinca Studestro de Palermo. Oni donis Lecionojn merkrede kaj sabate de la 18.30 ĝis la 19.30. La kurso daŭris tri monatojn, kaj la kotizo estis 1.000 lirojn;
- 1956 Instituto "G. Finocchiaro-Aprile" (prof.ino Jozefino De Vita). Oni faris ekzamenojn ĉe la Instituto "Duca degli Abruzzi" (Duko de Abruzoj), en la ĉeesto de lernejestro Johano Vizzini. La plej diligenta estis s.ro Alfredo Perricone Pirandello, kiu eldonigis antaŭe artikolon en "Palermo d'oggi" (La hodiaŭa Palermo) pri la Internacia Lingvo;
- 1961 Lernejo "Giordano" (d.ro Giordano);
- 1962 Lernejo "Giordano", organizita de la loka Katedro;
- 1964 Mezgrada Lernejo de Petralia Sottana. Partoprenantoj havis intenton fondi grupon la venontan jaron, sub la gvidado de prof. Valerio Inguaggiato (strato Felikso Gangi n.ro 7);
- 1965 Teknika Komerca Instituto "Duca degli Abruzzi", 1a grado (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto);
- 1965 Mezgrada Lernejo de Petralia Sottana, 1a grado (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto);
- 1966 Grupsideo, 1a grado (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto) kaj 2a grado (Alfredo Perricone Pirandello);
- 1966 U.S.I. CIMA (strato Dante n.ro 71), 1a grado, ĉiu lundo kaj vendredo (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto kaj Alfredo Perricone Pirandello);
- 1967 Teknika Komerca Instituto (strato Sgarlata), 1a grado (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto), per apliko de la Cirkulero n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952;
- 1967 Klubo "Kulturo kaj Progreso", 3a grado, ĉiu mardo kaj sabato (Alfredo Perricone Pirandello);
- 1968 Centro Studoj SIG (Alfredo Perricone Pirandello)²⁸;
- 1969 Instituto "Finocchiaro-Aprile". La komisiono konsistis el: prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto, prof. Canepa, s.ro Perricone Pirandello. La kurso estis organizita de la Interregiona Konsultiĝa Komitato kunlabore kun la Katedro de Palermo;
- 1974 Grupsideo, 1a grado (Nikolao La Colla);
- 1974 Elementa Lernejo "Monte Grappa" - Monto Grappa, 1a grado (Biagio Trapani)²⁹;
- 1974 Privata domo, 2a grado (prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto);
- 1974 Teknika Instituto por Turismo, 2a grado (Alfredo Perricone Pirandello).

Noto 25 El "Almanako 1957 - Donaco de Sicilia Esperanto-Klubo": SICILIA ESPERANTO-KLUBO, strato Sammartino, 72 - Palermo. Sendependa asocio, kaj do ne aliĝinta al la I.E.F., naskiĝita en la monato de decembro 1956 per notaria akto, intencas organizi grandskale efikan esperantismon en Sicilio.

Noto 26 Estis Prezidanto d.ro Francisko Paŭlo Picciotto post la forpaso de prof.ino Jozefino De Vita-Picciotto (Palermo, 1916 - tie, marto 1989). Naskita en Palermo, Agento de G. Einaudi Eldonisto en tiu urbo. Magistriginta pri Politikaj Sciencoj, li akiris la Instruistan Diplomon en la jaro 1968 en Montekatini, kaj li gvidis Esperanto-kursojn en Palermo, Altavilla Milicia kaj Petralia Sottana. Liaj artikoloj aperis en la loka gazetaro.

Noto 27 La cirkulero n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952 de Ministro Segni pri la instruado de Esperanto en la lernejoj ekstere la normala lerneja horaro, estis konfirmita la 28an de januaro 1956 de Ministro Rossi. Per la supre menciita Cirkulero, Ministerio pri Instruado "komprenita la utilon kaj la intereson, kiuj povas deveni de la kono kaj disvastigo de Esperanto, li opinias ke oni devas subteni la lernadon".

Noto 28 Centro Studoj SIG, aŭtonoma asocio sen profita celo, fondita en Palermo en septembro 1967. En la jaro 1973 la Centro Studoj SIG estas agnoskita kiel Centro pri Profesia Treinado per dispozicio de la Skabeneco al Laboro kaj Kunlaboro de la Regiono Sicilio.

Noto 29 En la jaro 1969 Biagio Trapani aliĝis al la Esperanta Literatura Klubo "La Patrolo" ĵus starigita de Giorgio Silfer (pseŭdonimo de Valerio Ari) kaj Manuela Bottigioni, kie li estis aktiva dum unu jaro per originalaj verkoj en Esperanto. En la jaro 1980 li estis parto de la Esperanto-katedro de Palermo.

Valerio Ari (n. Milano, 1949), verkisto, poeto, mastriĝinta pri Modernaj Lingvoj. Li alproksimiĝis al Esperanto 20jara, laŭ hazardo, post kiam li trovis libron en la domo de la bofratino. En la jaro 1969 li starigis, kune kun Manuela Bottigioni, la Literatura Klubo "La Patrolo". Aŭtoro de multaj verkoj kiel eseisto, poeto, prozisto, tradukisto.

Z.E.O.

“Esperanto-strato”: decido n.ro 86/DS de la 29a de junio 2016. Inaŭguro: la 4an de marto 2017.

Post ripetitaj petoj farita de s.ro Vito La Colla (n. Torino, 23 junio 1935), filo de Nikolao (Salemi, Trapani, 30 aprilo 1898 – Palermo, 25 majo 1984) kaj nevo de Stefano (Salemi, Trapani, 2 oktobro 1889 – Milano, 5 februaro 1966), la 29an de marto 2007 estis eldonita, je la paĝo 30a de la “Giornale di Sicilia” (Ĵurnalo de Sicilio), artikolo titolita “Pli ol 200 stratoj ŝanĝas nomon”, sekve la kunvenoj de la Toponimia Komisiono de la 21a de februaro, de la 5a kaj de la 26a de marto. El la novaj toponimioj estis ankaŭ “Strato Esperanto” (ĝi anstataŭis la eks straton RL 8). La artikolo finas per la vortoj de Prezidanto de la Komisiono, Sebastiano Bavetta, kiu garantias ke “...jam ni aktiviĝis ĉar en la daŭro de la venonta somero la stratoj estos provizotaj de la stratabuloj kaj ĉar estu ankaŭ eldonota la ĝisdatota stratlisto”. Sed la “Strato Esperanto” ankoraŭ ne ekzistas.

La 8an de februaro 2016 s.rino Laŭra Ciotta, edzino de s.ro Vito La Colla, sendis leteron al urbestro Leoluko Orlando proponante por la nova strato nomita CL 30, en la kvartalo Cruillas, la nomon de “Esperanto-strato” kaj ĉifoj, fine, ankaŭ Palermo havas sian Z.E.O.-n.

La “Esperanto-strato” estas flankata de Strato Filippo Brunetto, en Cruillas, kaj ĝi anstataŭos la antaŭan loknomon CL 44.

Antaŭfiksita antaŭe la 23an de februaro 2017, la inaŭguro estis prokrastita la 4an de marto 2017 pro sindevigoj de la Urbestro.

La stratabulo, kovrita per la drapo flava-ruĝa, koloroj de la Komunumo de Palermo, apudigita de la Esperanto-flago, estis inaŭgurita samtempe de urbestro Leoluko Orlando (n. Palermo, 1 aŭgusto 1947) kaj s.ro Vito La Colla.

Antaŭ la inaŭgura ceremonio de la nova loknomo, prenis la parolon s.ro Michele Maraventano, Prezidanto de la Via Distrikto, s.ro Vito La Colla, s.rino Luisa La Colla (n. Palermo, 4 marto 1974), urba konsilianino kaj kuzino de s.ro Vito La Colla, kaj urbestro Leoluko Orlando. Post kiam li skizis ke en la jaro 2018 Palermo estos la “Ĉefurbo de la Kulturo”, dum lia parolado la urbestro, parolante pri Esperanto, diris interalie: “Homo bezonas de la renkontiĝo kun la aliulo kaj la revo de Esperanto estas tiu konstrui lingvon samopiniita por plenumi tiun neceson kaj superi la obstaklon konstituita de la lingvo. Mi subtenas ke tiu kultura ŝanĝo ĝin ni devas al migrantoj, ĉar dank'al ili ni estis devigitaj malkovri ke ekzistas mondo, kiun antaŭe ni konis nur per nia elmigrantoj, nun ankaŭ per niaj enmigrantoj.



S.ro Vito La Colla kaj urbestro Leoluko Orlando post la malkovro de la stratabulo



La parolado de urbestro Orlando

PROVINCO DE MESINO



Mesino



Motta D'Affermo



Castoreale - Kastoreale

MESINO

Mesino havis multajn esperantistojn ĉar en la antaŭaj jaroj oni gvidis diversajn instruajn kursojn sub la gvidado de la agema prof. Jozefo Zappulla. En la jaro 1952 ĉi tiuj kulturantoj pri Esperanto fondis grupon, kies prezidanteco oni konfidis al libr. Julio Viti¹, esperantisto de longe kaj la Vic-prezidanteco al prof. Karmelo Garofalo.

La 15an de decembro 1959, en la Salonego de la Sicilia Universitato por Fremduloj, disponigita de prof. Garofalo, I.E.F.-ano, prof. Jozefo Petrolino, Estro de la loka Esperanto-Katedro, faris prelegon pri la personeco de Zamenhof kaj poste pri Esperanto, pri ĝia gramatika kaj etimologia formado, pri la diversaj lingvuzadoj kaj la celoj de Esperantismo.

Poste oni starigis Komitaton por fondi en Messina regulan esperantista-grupon. Prezidanto estis elektita adv. Jozefo Stanislao Boscarino; la aliaj estraranoj estis: prof. Jozefo Petrolino, prof.ino Adele Giganti, s.rino Konĉetta Guzzone, s.rino Nikoletta Manfrè kaj f.inoj Gracia Miuccio, Santina Russo kaj Brigita Sergi; sekr. estis s.ro Feliĉe Miuccio.

En la jaro 1960 oni fondis novan grupon titolita "Peloro". Prezidanto estis prof. Karmelo Garofalo kaj Sekretario estis s.ro Feliĉe Miuccio. La grupo, konsistigita el dudeko da esperantistoj, havis la sidejon en strato Piemonte n.ro 49/a, ĉe la loĝejo de s.ro Miuccio.

En la unua ĝenerala kunveno de la jaro 1961 la Estraro konsistis el: prez. prof. Jozefo Petrolino, vic-prez. prof.ino Mimma Scarmato; sekr. s.ro Feliĉe Miuccio, konsilianinoj prof.inoj Adele Giganti, Konĉetta Guzzone, reprezentantinoj f.ino Diana Cannao, prof.ino Lidia Mangano, prof.ino Nikoletta Manfrè.

La sama jaro prof. Jozefo Petrolino, Estro de la loka Esperanto-Katedro, estis alvokita al Romo kie li estis Ministeria Komisionano pri la lernejoj reformoj.

Dank'al la interesiĝo de fratinoj Giganti, la 10an de decembro 1962, en la Salonego de la Preĝejo Sankta Nikola⁰, prof.ino Viktoria Giganti faris prelegon pri la Internacia Lingvo. La temo pritraktis: "Moderna lingvo por nuntempa mondo".

La 17an de Novembro 1972 forpasis Feliĉe Miuccio. Naskita en 1926, U.E.A.-delegito pri komerco en Messina. Forpasinta en Romo, en "Polikliniko Gemelli", post koroperacio daŭrita dekunu horojn, pri kiu multaj romaj esperantistoj donis ilian sangon. Li estis nur 46jara.

La 26an de Novembro 2000 forpasis Aleksandro Zappalà. Naskita en Messina en 1922, Instruisto ĉe Mezlernejo, delegito U.E.A. pri instruado, forpasita post longa malsano. Li refondis, en la jaro 1978, la "Esperanto Rondo"-n.

Sidejo de la grupo:

- Esperanto-Grupo "Peloro", ĉe s.ro Feliĉe Miuccio, strato Piemonte n.ro 49/a: 1960;
- Esperanto-Grupo "Peloro", strato de la Zecca, dombloko 308, n.ro 44, ŝtuparo Ĉ: 1961, 1962;
- Messina Esperanto-Rondo, Poŝtfako 127: 1978, 1991;
- Radio-Grupo "Peloro", strato de la Santo n.ro 2, Carrubara: 1972.

Kursoj:

- 1957 Porinstruista Instituto "Ainis", elementa kurso kun ĉirkaŭ 70 junaj partoprenantoj, gvidita de prof. Jozefo Petrolino kaj Julio Viti. Fine de la kurso, prof. Jozefo Petrolino faris prelegon pri: "Socia kaj politika graveco de la Universala Lingvo". Poste oni disdonis diplomojn al dudeko da kursanoj. La realiĝo de la kurso estis ebla dank'al la interesiĝo de prof. Francisko Rizzuti (Provinca Studestrejo), de prof. Paŭlo D'Arrigo (Lernejestro de la Instituto) kaj de s.rino Antonietta Preitano-Milazzo (vic-lernejestrino) kaj la helpo de adv. Jozefo Stanislao Boscarino;
- 1961 Instituto "Tommaso Cannizzaro" (prof. Jozefo Petrolino), per la helpo de d.ro Nikolao Grassi (Provinca Studestrejo) kaj per interesiĝo de prof. Sebastiano Conti;
- 1962 Instituto "Tommaso Cannizzaro", 1a grado.

Nota 1 En la jaro 1947 libr. Julio Viti estis nomumita Repraesentanto de la I.E.F. por Mesino de la Regiona Delegito Jozefo Stanislao Boscarino.

CASTROREALE

Z.E.O.

Decido n.ro 69 de la 7 junio 2017

La Castoreale-Komunumo (Messina), per decido n.ro 69 de la 7a de junio 2017, decidis:

- aliĝi al la eŭropa objektivo por la pliigo de la lingvo Esperanto por ĝia plena uzado en la internaciaj rilatoj, en la trans-kultura, scienca, politika, religia kaj ekonomia kadro;
- deklari la Castoreale-Komunumon "Esperantista Komunumo" kun la celo antaŭenpuŝi la lingvon kaj doni kunordigitan, progresivan kaj strukturan evoluon faronte pro tio ĉiujn iniciatojn utilaj al ĝia disvastigo kaj al la lingva lernado, konsiderante agojn kaj metodologioj celotaj strebadi tiun objektivon.

MOTTA D'AFFERMO

Z.E.O.

"Esperanto-Vojeto". Ĝi estas la enirejo al la monta domo de s.ro Vito La Colla, filo de ĵurnalisto Nicolò (vidu Palermo-n). Ĝi ne estas Z.E.O. kaj ĝi ne estas parto de la urba toponimio




La skribanto okaze de vizito



La briketo "Vojeto de Esperanto"

PROVINCIA DE KATANIO



Katanio



Caltagirone – Kaltagirone



Aci Catena - Açi Katena



Acireale – Açireale



Giarre - Ğarre



Mineo

KATANIO

Trovi sciigojn pri la Katani-anaj pioniroj estis tre malfacila tasko malgraŭ multaj leteroj adresitaj al geesperantistoj, kies nomoj oni eltiris el malnovaj revuoj. Malmultoj respondis (oni povas ĝin kalkuli laŭ la fingroj de unu mano) kaj ne haviginte utilajn sciigojn. Tamen en la Jarlibro de Italaj Esperantistoj, eldonita en la jaro 1908 en la informilo "Roma Esperantisto" estas du nomoj: Gaetano D'Agata (ĉe poŝtofiĉejo) kaj Jozefo Maglia Piemonte (strato Corona n.ro 50). Plie en la "Indicatore Esperantista Italiano per l'anno 1928" (Gvidlibro Itala Esperantisto de la jaro 1928), eldonita de Paolet, krom Petro Rizzo, estas enlistigita libr.-n Benedikto De Vita (Itala Komerca Banko, nova U.E.A.-delegito post la foriro el Messina de Petro Rizzo), Humberto De Franco (strato Del Velo n.ro 7, emerita profesoro kaj eminenta latinisto, plifoje premiita en Certamen Capitolinum), Johano Miuccio (strato de la Lettera n.ro 4) kaj Vincenzo Russo (strato Coppola n.ro 64, eble la unua katania esperantisto).

Bedaŭrinde la tuta grupa dokumentaro perdiĝis kaj oni havas ĉi tiujn sciigojn dank'al prof. Jozefo Zappulla, kiu, ĉe la fino de la jaroj '70, li ekkontaktis d.ron Petro Rizzo kaj de li, laŭ lia memoro, havis sciigojn pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Catania. Poste, akirinte la verkon *Sesdek jaroj*, kiun d.ro Petro Rizzo eldonigis en la jaro 1979, je propraj elspezoj, kaj disdonita al amikoj kaj al italaj Esperantista-grupoj, oni povis havi sciigojn de la unua periodo de Esperanto en Catania. En ĉi tiu verketo d.ro Petro Rizzo rakontas liajn memoraĵojn pri lia esperantista vivo.

Estas certe, do, ke unu el la pioniroj de Esperantismo estis d.ro Petro Rizzo (Mineo, 28 majo 1907 - Ĝenovo, 27 junio 1985), naskita de Francisko kaj Rozalia Barone.



D.ro Petro Rizzo

En 1920 li transloĝiĝis al Sirakuzo, kie la patro laboris kiel ŝtatoficisto, kaj en ĉi tiu urbo li vizitadis la 4an Gimnazion.

En tiu periodo en Sirakuzo ĉeestis du esperantistoj, pastro Scatà kaj Rudolfo Castagnino, sed pri ili ne multe oni sciis¹.

Lia alproksimiĝo al Esperanto okazis laŭ hazardo: unu tago, reveninte el la lernejo, li haltis ĉe gazetkiosko kaj ĉi tie li ekvidis libreton de la serio "Biblioteca del Popolo" (Popola Biblioteko) eldonita de Sanzogno kun la titolo *Gramatiko de Esperanto* verkita de iu Scott. Logita de tiu libreto li aĉetis ĝin kaj en la lernejo, dum la horo pri la greklingvo, ne vidita de la instruisto, li eklegis ĝin.

Legi la libreton estis por d.ro Rizzo kaŭzo de entuziasmo al Esperanto, kiu lin igis iri al librovendejo kaj peti pli kompletan gramatikon². En printempo de la jaro 1920 Petro Rizzo iĝis esperantisto.

En la jaro 1922 la patro estis translokinta al Katanio kie Petro Rizzo finis la universitatajn studojn kaj en la jaro 1929 li doktoriĝis ĉe la Fakultato pri Juro.

En la jaro 1931, post la militservo, Petro Rizzo sukcesas en la konkurso de la Ŝtata Administrado kaj li estis parto de la Administrado de Ministerio pri Enlandaj Aferoj. Iĝita Kabinetestro ĉe la Prefekteco de Napolo, en la jaro 1951 li estis nomumita Prefekto de Mesino kaj poste en tiuj de Bolzano, Peruĝo (11 Oktobro 1951 - 24 Novembro 1954), Reĝjo Kalabrio (1954 - 1956), Katanio (1957), Palermo, Ĝenovo (1965 - 1972).

Noto 1 Okazis al mi legi, ke en la jaro 1961 li havis adreson ĉe la Urba Biblioteko de Sirakuzo sed de la respondo, kiun mi ricevis en junio 2006, sekve de mia peto, ne rezultas ke li laboris ĉe la Biblioteko. En la jaro 1917 Rudolfo Castagnino loĝis en strato Malto n.ro 24 kaj en la jaro 1926 en strato Gargallo n.ro 44 .

Noto 2 Temas pri *Gramatiko kaj ekzercoj de la internacia lingvo Esperanto, laŭ la franca teksto de L. de Beaufront, traduko kaj reduktio por italoj* de Jozefo Puccinelli, 4a eldono, Livorno, 1913.

Je lia rehejmiĝo al Katanio li konis la 20jaran Vincenzo Russo³. Tio estis la komenco de intensa aktiveco por diskonigi Esperanton en Katanio, ankaŭ per la helpo de Kaloĝero Palermo el Canicatti⁴. Tiel, ekestis la trio Palermo - Russo - Rizzo, kiuj kunlaboradis dum diversaj jaroj propagandante en la lokaj ĵurnaloj kaj gvidante kurson, kiu ebligis la fondon de grupo estrita de Agripino Kostancio Di Stefano, instruisto en elementa lernejo, de Mineo⁵.

Malmulto restis pri tiu periodo kaj el la esperantistoj, kiuj distingiĝis oni memoras Emanuelo Scalici kaj Johano Cagni⁶.

De la jaro 1962 ĝis 1965 li estis vokita al Caserta kiel Direktoro de la Supera Lernejo de la Ŝtata Administrado por la Forĝigo de la Direktoraj Funkciuloj de la Ŝtato.

D.ro Petro Rizzo estis U.E.A.-delegito en Katanio (1926), Vic-delegito (1927 - 1928) kaj poste Delegito (1929 - 1931) en Mesino. En 1932, kvankam li restis aliĝinta al la I.E.F., li disiĝis de la U.E.A. ĉar oni ne permesis al la ŝtataj oficistoj aliĝi al internaciaj asocioj.

En la jaro 1935 Petro Rizzo partoprenis en la 27a Universala Kongreso (Romo, 3 - 10 aŭgusto), la unua de serio, kaj granda estis lia emocio konante persone famajn esperantistojn kiel Julio Baghy, Louis Bastien, Odo Bujwid, Georgo Canuto, Robert Kreuz, Stefano La Colla, Bruno Migliorini kaj Rinaldo Orengo.

En 1937, post la geedziĝo al s.rino Elodia⁷, Pietro Rizzo estis translokinta al Ministerio pri Enlandaj Aferoj, en Romo, kaj en ĉi tiu urbo li havis la okazon renkonti esperantistojn de la roma grupo, kiuj kunvenis ĉiu ĵaŭdo ĉe "Caffè Greco" (Kafejo Greko), en strato dei Condotti, kie ofte li vidis Stefano-n La Colla, tiam Redaktoro de la "Itala Enciklopedio".

Pasita la milita periodo, en 1949 Petro Rizzo estis nomumita Kabinetestro ĉe la Kvestoreco de Napolo. Li realiĝis al U.E.A. kaj ekpartoprenis en la diversaj Universalaj Kongresoj. La partopreno en la Universalaj Kongresoj havigis al li la eblon renkonti famajn esperantistojn kaj havi kun ili interesajn rilatojn.

D.ro Rizzo distingiĝis ankaŭ en la studaj kampoj. Li sin dediĉis tre multe al Esperanto kaj pri ĉi tiu temo li verkis informan materialon pri Esperanto kaj aŭtobiografiajn rakontojn pri Esperantismo: *Sesdekjaroj* (1979) kun *Aldonaj konsideroj* (1980), *Skizo pri la leksikografio de Esperanto. Notoj por recenzo.* (1983)⁸.

Noto 3 Vincenzo Russo iĝis esperantisto en 1919 dank'al amiko de Romo, kiu sendis al li gramatikon. Jam li estis sperta de la lingvo kiel konstatis d.ro Petro Rizzo leginte lian tradukon el la itala de la poeziaĵo *La neve* (La neĝo). Post kiam li ĉesis labori kiel inĝeniero, Vincenzo Russo revenas al Katanio, kie li okupiĝas pri agrikulturo kaj astronomio. De longe li ne havis sciigojn pri la Movado kaj la sola ligo kun Esperanto estis la ĉisemajna rendevuo kun Radio Zagrebo. La patro, Joakino Russo (Katanio, 9 aŭgusto 1865 - tie, 7 majo 1953), inĝeniero, Generalo de la Ŝipkonstrua Oficejo, estis instruisto ĉe la Ŝipokademio de Livorno de la jaro 1896 ĝis 1898 kaj li okupis de la jaro 1929 ĝis 1933 la oficon kiel Vicministro pri la Mara Ministerio. Eltrovinto de la unua periskopo por la subakva navigado (kleptoskopo) kaj de la ŝippendolo, li estas aŭtoro de *Trattato di architettura navale* (Traktato pri ŝipa arkitekturo) (1905). Li estas konata ankaŭ pri liaj serĉadoj pri la onda movo kaj pri la ŝipruliĝado.

Noto 4 Nomumita de la I.E.F. Komisararo por organizi la Movadon en Sicilio, Kaloĝero Palermo, esperantisto de la jaro 1919, daŭrigis la taskon tenante la adreson en Canicatti, ankaŭ post lia dungo kiel bankoficisto en Palermo kaj poste en Katanio en 1923.

Noto 5 La grupo naskiĝis en 1922. Post lia forpaso, oni donis al la grupo lian nomon. La 16an de januaro 1923 oni elektis: prez. inĝ. Jozefo Lucretti, vic-prez. prof. Severino Sebastiano, sekr. adv. Stefano Sciuto, bibl. prof. Francisko Cavallaro, kas. Petro Rizzo, konsilianoj, Vincenzo Russo kaj Alfredo Leonardi. Post la forpaso de inĝ. Lucretti, okazita la 21an de marto 1923, adv. Johano Privitera surpris la oficon.

Noto 6 Emanuelo Scalici (1899 - januaro 1979), inĝeniero, estis U.E.A.-delegito por Katanio de la jaro 1927 ĝis 1932 sed li lasis Esperanton post multe da tempo. Li estris la Akvokondukilo "Casalotto" (Kasalotto).

Johano Cagni, konsiderita promesplenulo por lia flua parolado en Esperanto, estris skoltgrupon titolita "Gruppo Escursionisti Indomiti" (Grupo Nevenkeblaj Skoltoj). La grupo, animita ankaŭ de Petro Rizzo kaj Emanuelo Scalici, ĉesis sian aktivecon en 1933 post la forpaso de la juna skolto. Kiam en la jaro 1927 la faŝisma reĝimo malpermesis la Skoltismo en Italio, en Katanio li iĝis membro de la juna sekcio de la Itala Alpaklubo. Li forpasis pro neĝa blovado dum la supreniro al Etno. Lia korpo estis trovita en printempo, post la degelo. La rifuĝejo sur Etno havas lian nomon. Sekve de mia peto, la 16an de marto 2007 oni diris al mi, ke la rifuĝejo estis detruita de la lafo antaŭ kelkajn jarojn, poste la "vekiĝo" de Etno.

Noto 7 El la geedziĝo naskiĝis gefilojn Roberta, Renata, Marcela, Francisko, Hipolita.

Noto 8 Per letero de la 2a de aŭgusto 1982 d.ro Petro Rizzo petis al la grupo "Nova Espero Friuli" serĉi en la urba biblioteko de Udino librojn "por rimarki elementojn, kiujn mi bezonas" ĉar "mi kondukas al ĝia fino prilaboritan kaj lacigan serĉadon pri la leksikografio de Esperanto ĝenerale kaj en Italio, kaj ĉi tiuj estas la solaj elementoj, kiuj mankas al mi". Temas pri: Hacker & Mayer, *Vocabolario sistematico Italiano-Esperanto* (Sistema vortaro itala-Esperanto), Berlino, eld. Behr, 1907, paĝoj 9+315; Luizo Giambene, *Vocabolario Italiano-Esperanto con brevi note di grammatica* (Vortaro itala-Esperanto kun mallongaj gramatikaj notoj), Romo, Bernardo Lux eldonisto, 1906, paĝo 94; Jakobo Meazzini, *Dizionario completo Esperanto-Italiano* (Kompleta vortaro Esperanto-itala) (nur literoj A-B) kaj *Supplemento al vocabolario Italiano-Esperanto* (Supplemento al la vortaro itala-Esperanto) (nur literoj A-F), S. Vito al Tagliamento, 1925. La libro estas: *Lineamenti di lessicografia dell'Esperanto. Note per una recensione* (*Skizo pri la leksikografio de Esperanto. Notoj por recenzo*), Edistudio, 1983.

Je la paĝo 56a oni legas: "La redaktisto de ĉi tiuj notoj dankas, por la efika helpo, kiun donis al li dum sia serĉado, de samideanoj... s.ino Serena De Sanctis (Udino)...".

En 1980 d.ro Petro Rizzo aliĝis al la 12a Trilanda Esperanto-Konferenco, kiu okazis en Udino de la 23a ĝis la 25 de majo 1980. En la aliĝlisto li havis la n.ron 99.

Dott. Pietro Rizzo Genova, 8 agosto 1982

Cari "invidiosoj" del Gruppo di Udine,

donde chiederli una grande cortesia e spero che possa
 te farai avere la ~~grata~~ collaborazione.

(C'è, nella Biblioteca Civica di Udine (fondo Telli
 in) questo libro, che lo stesso ebbe cura di curare
 in occasione di una "Iniziativa Conferenza":

Hoeber & Mayer - Vocabolario di Grammatica Italiana -
 Esperanto 1937 - Berlino, ed. Behr, 1907, pagine 9+315

Mi scorderò, naturalmente con tuo stesso gusto,
 le fotografie del frontespizio, delle 9 pagine dello "introduzione"
 e delle prime 3 del vocabolario.

Se si fonda delle difficoltà, da parte della Biblioteca,
 per fotografare, ci sarebbe certo un'esperienza
 tutto diversa e più facile da copiarla a mano?

Progetta un'alta possibilità. Lo di poter
 trovare altrove, e chiedere le pagine fotografate, gli
 libri:

Luigi Giambone - Vocabolario Italiano - Esperanto
 con i libri di grammatica - Roma, Editore
 edita - 1906 - pag. 94

Giuseppe Mezzani - Dizionario Italiano - Esperanto
 con i libri di grammatica - Roma, Editore
 edita - 1906 - pag. 94

Cons. Mario Gropo, 11-1 - 1017 GENOVA - Telefono 010.89

La letero de d.ro Petro Rizzo adresita al la Udine'a grupo

La 19an de septembro 1970, en la Kongresa Palaco de la Internacia Foiro pri la Maro de Ĝenovo, okaze de la inaŭguro de la 41a Nacia Kongreso (Krizado sur la motorŝipo "Caribia" (Karibja), 19 - 26 septembro), I.E.F.-Estraro atribuis ankaŭ al Petro Rizzo oran medalon "por la longa fideleco al la esperanta movado".

D.ro Petro Rizzo, post kiam li distingigis per morala rekteco, per granda prestiĝo, per la sindevigo per kiu li sin dediĉis al la solvo de la lokaj problemoj, li lasis neforviŝeblan memoron en la etna ĉefurbo kaj en la naskiĝa urbo.

En 2005, en la Komunumo Mineo, okaze de la inaŭguro de la "Casa Museo di Luigi Capuana" (Domo Muzeo Luizo Capuana) (18 marto 2005), unu teretaĝa salonego estis dediĉita al Esperanto, kie estas gardita la riĉa persona biblioteko de d.ro Petro Rizzo (kolekto da libroj, revuoj kaj korespondaĵoj pri Esperanto), donacita de familianoj.


La aktiveco de la grupo de Katanio interrompiĝis pro la 2a Granda Milito kaj pro la translokiĝo de gravaj grupanoj kiel ekzemple Petro Rizzo kaj ĝi reaktivis la 5an de marto 1952, per iniciato de adv. Jozefo Stanislao Boscarino el Raguzo kaj la helpo de laboremaj esperantistoj lokaj, el kiuj prof. Francisko Geraci⁹ kaj libr. Rozario Sgroi. Multaj simpatiantoj memorantaj pri la Kunveno de Katanio de la jaro 1951 (26 - 27 majo), grupiĝis kaj elektis kiel prezidanton prof. Francisko Geraci¹⁰.

Por la jaro 1955 oni elektis la jenan estraron: prez. prof. Franciskoo Geraci, vic-prez. prof. Salvatore Chiarenza, sekr. s.ro Petro Zappalà, kas. libr. Rozario Sgroi, konsiliano prof. Jozefo Galeani, revizoroj, prof. Antoneto Cuscunà, libr. Guido Siciliano kaj f.ino Anĝela Lyana Patané.


La 29an de majo 1956 okazis la ĝenerala kunveno kaj festis la 5an datrevenon de la 1a Kunveno de Siciliaj Esperantistoj. Oni rekonfirmis en la oficoj la estraron elektita en 1955 kaj nomumitaj "Honoraj Membroj" prof. Georgo Kanuto kaj d.ro Karlo Borione.

Noto 9 Franciskoo Geraci (1898 - 12 aprilo 1965), profesoro en mezgrada lernejo, organizis la 1an Sicilian Esperantista-Kunvenon (26 - 27 majo 1951).

Noto 10 La grupo estis inaŭgurita la 26an de majo 1952.



La nomumo "Honoraj Membroj" de prof. Giorgio Canuto kaj d. ro Karlo Borione



La pergamento "Honora Membro" de prof. Giorgio Canuto kaj d. ro Karlo Borione

La grupo, en daŭra progreso, imponis sian ĉeeston al la atento de la publiko kaj de la aŭtoritatoj. Per interesiĝo de prof. Geraci, de libr. Sgroi kaj de prof. Ottorino Russo De Felice, kiuj estras la grupon, la Provinca Turisma Entrepreno eldonis reklamprospekton en Esperanto.

La Komunumo, la Provinca Administrado kaj la Komerca Ĉambro helpas la grupon per regulaj donacoj da mono por pliigi la instruon de Esperanto.

La 31an de Marto 1957 esperantistoj de Katanio festis la 5an datrevenon de la grupofondo. Partoprenis en la ceremonio ankaŭ d. ro Petro Rizzo, Prefekto de Katanio, Honora Grupano, kaj adv. Jozefo Stanislaw Boscarino, Honora Prezidento. La antaŭan tagon, reprezentantoj de la estraro demetis florkronon sur la tombo de pioniro Agripino Costanzo.

Okaze de la 50a datreveno de la fondo de la Komerca Teknika Instituto de Katanio, estis eldonita libro titolita *Cinquant'anni di vita dell'Istituto Tecnico Commerciale "Giuseppe De Felice Giuffrida"* (50jaroj de vivo de la Komerca Teknika Instituto "Jozefo De Felice Giuffrida"). En ĉi tiu libro, de paĝo 349a ĝis paĝo 351a, oni povas legi artikolon de prof. Jozefo Zappulla, instruisto pri Geografio en ĉi tiu Instituto, pri la Esperanto-instruo. Interalie, estas ankaŭ skribita ke en ĉi tiu Instituto oni gvidas Esperanto-kursojn ekde la jaro 1923.

Por la historio, peco el la supre menciita artikolo: "...en la fora jaro 1923, al la letero de la 26a de februaro 1923, sendita de la loka esperantista-grupo "Agrippino Costanzo", kiu laŭvorte oni transskribas: "Attestimata S.ro Lernejestro de la Komerca Teknika Instituto G. De Felice Giuffrida - Catania. La grupo esperantista de Katanio pere de sia Prezidanteco, esprimas la deziron malfermi, en la Instituto estrita de via Sinjora Moŝto, nedevidigan Esperanto-kurson senpage, kies fino estos eldonotaj specialajn atestojn al ĉiuj, kiuj sukcese vizitadis kaj sukcesis en ekzamenoj. Aliflanke la Grupo donos kapablajn instruantojn, krom ĉiujn klarigojn kaj helpojn, kiuj iĝus necesaj.

Unika celo estos nur tiu pliampleksigigi la lernejan horizonton al facilaj kaj utilaj nocioj kaj kontribui al la lerneja rolo por ekfratiĝi en la homa socio. Kun la deziro de bonvola akcepto de la jena letero kaj atendente respondon, kun alta estimo. (subskribita Prezidanto de la Grupo Esperantista de Katanio inĝ. G. Panzarotti)". Lernejestro Cafiero Dominico, per letero de la 6a de marto 1923, respondis: "...tre volonte mi akceptas la proponon de via Sinjora Moŝto malfermi en ĉi tiu Instituto senpagan nedevidigan Esperanto-kurson, certa ke ĝi alportos multe da utileco kaj profito al la lernantoj estontaj komercantoj. Mi ĝojas povi esti utila por iniciato inda je ĉiu laŭdo kaj kuraĝigo iniciato, kun alta estimo."

En aŭtuno de la jaro 1962 prof. Johano Bruno, kiel Estro de la Esperanto-Katedro de Katanio, interkonsente kun la Estro de la Provinca Buroo de la "Itala Junularo", proponis fari kurson pri instrukapableco de Esperanto. La iniciato estis prenita ĉar, estinte prezentita al Senato leĝprojekton por la instruo de Esperanto en la publikaj lernejoj, estis necese krei taŭgan kaj kapablan instruistaron por alfronti tiun eventualecon. La kurso komenciĝis la 1an de oktobro 1962 kaj ĝi rikoltis kontentigan sukceson, malgraŭ, je la fino, nur ok partoprenantoj el dudek kvin aliĝintoj sukcesis akiri diplomon. Kiel ajn la kurso utilis kiel saltotabulo por la fondo de la esperantista-grupo, iam tre aktiva en Katanio, kaj de kelkaj jaroj ekzistanta nur "pro formo". Fakte unu el la partoprenantoj en la Esperanto-kurso, s.ro Salvatore Crocellà, unu vespero proponis startigi esperantista-grupon ankaŭ en Katanio. La iniciato estis akceptita entuziame kaj la 26an de novembro 1962, en la ejoj de strato Plebiscito n.ro 784, sidejo de la Provinca Buroo de la "Itala Junularo"¹¹, estis restarigita la Grupo Esperantista de Katanio pere de: prof. Johano Bruno, libr. Jozefo Bruno, Konĉetta Bruno, Francisko Grasso, Aldo Santangelo, Maria Konĉetta Vagliasindi, Antona Pumo, Viktorio Castro, Kamilo Feletti, Maria Luisa Grosso, Rosa Pappalardo, Gaetano Circià, Dominico Finocchiaro, Maria Matilda Finocchiaro, Antoneta Sangrigoli, Roza Patanè, Maria Musmeci, Francisko Pirrone kaj Salvatore Crocellà.



La grupo "Giorgio Canuto"
1. libr. Rozario Sgroi, 2. prof. Gaetano Circià, 3. prof. Johano Bruno,
4. libr. Jozefo Bruno, 5. s.ro Salvatore Crocellà

Noto 11 Estis Estro libr. Jozefo Bruno, kiu disponigis du ĉambrojn por la grupo. Dank'al lia helpo, oni povis daŭrigi la diskonigon de Esperanto.

En tiu okazo estis aprobita la Statuto kaj, akceptante la proponon de prof. Johano Bruno, titolita la grupo laŭ la nomo de la bedaŭrata prof. Georgo Canuto.



Leterkapo de la grupo

Poste, la 30an de novembro 1962, estis elektita la unua Estraro de la Grupo Esperantista de Katanio "Giorgio Canuto" kaj tio estas: prez. prof. Johano Bruno, vic-prez. libr. Jozefo Bruno, sekr. s.ro Salvatore Krocclà, vic-sekr. s.ro Gaetano Cirià, kas. f.ino Lukrecia Giordano, bibl. s.ro Viktorio Castro, disvastiga kaj gazetara ataŝeo s.ro Francisko Pirrone.

Oni decidis ke la grupsidejo estas malfermata lunde, merkrede kaj vendrede de la 19.00 ĝis la 20.00 kaj ankaŭ ĉiuj sabatoj de la 18.00 ĝis la 20.00.

En la kunveno de la 8a de majo 1964 oni decidis re prilabori la Statuton por ĝin redakti konforma al la direktivoj de la I.E.F.. Pro tio specifa komisiono estis taskita redakti la novan Statuton por ĝin prezenti al kunvenantoj dum venontan kunvenon. La komisiono konsistis el: prof. Johano Bruno, (prez.); Rozario Sgroi, Jozefo Bruno, Salvatore Krocclà, Mikelo D'Agata kaj Salvatore Pirrone (komisionanoj).

La nova Statuo, kiu konsistis el 16 artikoloj, estis submetita al la aprobo de grupanoj la 17an de majo 1964.

En la sama kunveno oni komisiis la sociajn oficojn por la jaro 1964 kaj tio estas: prez. prof. Johano Bruno, vic-prez. libr. Jozefo Bruno, sek. s.ro Gaetano Cirià, kas. f.ino Maria Matilda Finocchiaro, konsiliano d.ro Mikelo D'Agata.

En la komenco de la jaro 1967, en la Kongresa Salono de la palaco de la Itala Junulara, okazis la inaŭguro de la 15a socia jaro de la grupo. Prezidanto de la grupo kaj Estro de la Katedro prof. Johano Bruno, en lia raporto pri la grupa aktiveco en la jaro 1966, sciigis pri la venonta Nacia Kongreso, kiu okazos en Katanio dum la monato de septembro. En tiu okazo oni elektis: prez. prof. d.ro Johano Bruno, vic-prez. d.ro Mikelo D'Agata, sekr. prof.ino Roza Rotondo, administra sekr. libr. Jozefo Bruno, konsilianoj instr. Anĝelo Ciravolo, d.ro Hektoro Mancuso; junulara reprezentanto s.ro Jozefo Minio.

1967 estas la jaro de la 38a Itala Esperanto-Kongreso. Libr. Jozefo Bruno informante grupanojn pri la diversaj stadioj, pri la rilatoj kaj la interkonsentoj kun la lokaj Aŭtoritatoj, kaj ankaŭ kun la estraranoj de la I.E.F. por la Kongresorganizado, la 16an de aprilo 1967 diris ke, pro la sennombraj malfacilaĵoj kaj pro la kompleksa kaj ne indiferenta amaso da laboro, oni pensis rezigni akcepti la Kongreson; sed sekve de insistoj de la I.E.F., de kuraĝigoj de la Provinca Turisma Entrepreno kaj de la konsiderindaj helpoj kaj donacoj de la lokaj Institucioj por la bona sukceso de la manifestacio, oni decidis organizi la Kongreson. Tial, li petis ilian kontribuadon, sin surprenante precizajn oficojn por la plenumo de la diversaj taskoj en la multnombraj oficoj, kiuj devos esti antaŭaranĝitaj por ĝia organizado.

La jaroj, kiuj sekvis estas sen sciigoj kaj nur en la jaro 1975 oni reprenis la aktivecon.

Per peto de prof. Anĝelo Ciravolo, la 30an de oktobro 1975 kunvenis grupanoj de la Grupo Esperantista de Katanio kaj la Esperanto-Katedranoj de Katanio de la Itala Esperanto-Instituto por memori prof.-on Johano Bruno, Prezidanto de la grupo, forpasita en Katanio la 27an de junio 1975.

Post la forpaso de prof. Johano Bruno, surprenis la oficon kiel estro de la Esperanto-Katedro prof. Jozefo Zappulla¹³.

Prof. Johano Bruno naskiĝis en Vizzini la 23an de aŭgusto 1900. Magistriginta pri Beletro, dum multaj jaroj li instruis lingvojn kaj italan, latinan kaj grekan literaturon en multaj ŝtataj lernejoj. Dum jartrideko li vivis en Bolonjo kie en la jaro 1955, jaro de la 40a Universala Kongreso (30 julio - 6 aŭgusto), li esperantiĝis dank'al kav. Jozefo Zacconi (Bolonjo, 19 aprilo 1893 - tie, 16 marto 1964). En 1957 li transloĝiĝinte al Katanio, kie li instruis Geografion en la Komerca Teknika Instituto kaj Beletron en Liceoj, li portis Esperanton en la lernejojn gvidante fakultajn kursojn kaj sukcesis enmetigi Esperanton, kiel deviga studobjekto, en la Instruistan Superan Istituton pri Socia Servo.

Noto 13 Prof. Jozefo Zappulla, (Mesino, 2 januaro 1923 - Katanio, 28 julio 2007), lernis Esperanton aŭtodidakte, 17-18jara. Li akiris la Instruistan Diplomon en la ekzamensio en Palermo, dum la 29a Itala Esperanto-Kongreso (23 - 27 aŭgusto 1958). La diplomo havas la daton 27an de septembro 1958.

Prof. Johano Bruno estis pioniro de Esperanto en Katanio. Membro de la Itala Esperanto-Instituto kaj Estro de la Katedro de Katanio (li atingis la Instruistan Diplomon en Palermo, okaze de la Kongreso de la jaro 1958), krom Delegito de la I.E.F. kaj U.E.A., ĉiam li aliĝis al la iniciatoj por disvastigi Esperanton aktive partopreninte en tiu organizo. Grupanimanto kaj organizanto de la Grupo Esperantista de Katanio, li kaptis ĉiujn okazojn por teni vigla la atenton de la publiko pri la Movado. En 1967 li estis Prezidanto de la Organiza Komitato de la 38a Itala Esperanto-Kongreso (16 - 22 septembro) kaj li tre multe faris ĉar la Komunumo de Katanio titolu straton al Esperanto.



Poŝtkarto eldonita de prof. Johano Bruno

Prof. Johano Bruno, Prezidanto de la Grupo Esperantista de Katanio "Georgo Canuto", finis lian karieron, post 50 jaroj de instruado, ĉe la Scienca Liceo "Principe Umberto". La 26an de decembro 1970, kun solena ceremonio, oni atribuis al li oran medalon de Lernejestro pro la dediĉo ĉiam montrita al la lernejo, al la instruado kaj al la aktiveco por Esperanto.

La 23an de decembro 1975 forpasis en Katanio libr. Rozario Sgroi. Naskiĝita en Katanio en 1913 en ne bonstata familio, tre juna li eksentis la neceson pri komuna ligo de amo kaj de reciproka kompreno inter ĉiuj homoj. Apenaŭ dektrijara, li trovis per Esperanto tiun klarigan lumon, kiu devis daŭre lumigi lian vivon. Lerninta aŭtodidakte Esperanton, li ekaĉetis, laŭ liaj limigitaj ekonomiaj eblecoj, librojn kaj revuojn, li ekkorespondis kun esperantistoj el la tuta mondo kaj partoprenis en ĉiuj regionaj kaj naciaj aktivecoj por Esperanto. Li estis nelacigebla subtenanto de Esperanto dediĉante la tutan lian liberan tempon kaj liajn malgrandajn ŝparaĵojn por la disvastigo kaj instruado de la lingvo en la provinco Katanio (li estis Sekretario en ŝtataj lernejoj, ne edzo). Plie, li estis elpensinto de ekspozicioj pri esperanta libro, kursorganizanto en la urbaj lernejoj, redaktinto de la grupa Statuto kaj lerta serĉanto de la eroj pli taŭgaj por instrui la lingvon. Neniam li instruis Esperanton al lernantoj kaj ĉiam li ripetis, ke "la instruistoj devas instrui Esperanton, ĝin mi ne devas instrui, ke mi estas librotenisto".

La plej grava laboro el la tuta lia esperantista vivo estis tamen la asidua kaj konstanta serĉado de ĉio, kio estis eldonitaj en Italio kaj eksterlande pri Esperanto. Li estis kolektanto atenta kaj persista, inteligenta kolektanto pri ĉio, kio, laŭ liaj konvinkoj, estis utila posedi. Lia privata kolekto de libroj kaj revuoj pri Esperanto estis pli riĉa ol la grupa biblioteko, kiun li mem volis fondi en 1952 zorgante la sliparojn kaj la inventarojn. Pro lia specifa volo, li volis, ke lia privata kolekto de esperantaj libroj kaj revuoj, persite farita en duonjarcento de ama serĉado, estu donacota al la Grupo Esperantista de Katanio.

Lia sanstato plimalboniĝis dum la lastaj jaroj (li suferis de astmo) kaj li bezonis daŭrajn kuracadojn. Antaŭ nelonge lia forpaso, li decidis teni kunvenon por rekonstrui la grupon propre la 23an de decembro 1975, je la 18.30, sed la mateno de tiu tago okazis lia forpaso.

La jaro 1976 estis tre malfacila jaro por la grupo pro la forpaso de prof. Johano Bruno kaj de libr. Rozario Sgroi. Esperantistoj, fidelaj al la idealo por la Internacia Lingvo kaj por la "Verda Stelo", decidis do interesigi prof. Jozefo Zappulla surpreni la gvidon de la grupo, ĉar li estis la plej aĝa esperantisto el la grupo mem, kaj en la kunveno de la 15a de januaro 1976 prof. Jozefo Zappulla informis la partoprenantojn (entute 11 grupanoj), ke estis necese restarigi la grupon kaj aprobi novan Statuton, ĉar la antaŭa de la 26a de novembro 1962 nun estas neadekvata. Plie, li memorigis ke libr. Sgroi, antaŭ ol lia forpaso, li pretigis novan Statuton konsistita el 16 artikoloj. Post kiam li legis ĝin kaj pridiskutis kelkajn rimarkojn de adv. prof. Johano Giuffrida, la dokumento estis aprobita unuanimece.

En la sama kunveno oni elektis la novan Estraron: prez. prof. Jozefo Zappulla, vic-prez. prof. Anĝelo Ciravolo, sekr. prof.ino Roza Rotondo-Pettinato, sekr.-kas. s.ro Francisko Canfarelli, bibl. pastro Petro Giovanni Fontanini, revizoroj prof. Jozefo Gravagno, prof. Salvatore Platania kaj prof. rino Adriana Vitale. La aliaj grupanoj estis: Natale De Fino, adv. Johano Giuffrida, prof.ino Franka Gravagno (Instruantino pri Esperanto).

La 23an de januaro 1976, en la grupsideo, okazis la titoliga ceremonio al Rozario Sgroi de la Esperanto-Biblioteko de la Grupo Esperantista de Katanio. Prof. Zappulla, parolinte pri la laborema kaj la esperantista vivo de libr. Sgroi, evidentigis la altvaloran donacon de Esperanto-libroj farita al la grupa biblioteko¹⁴.

La 23an de aprilo 1976, en la Seminaria Preĝejo (strato Pordenone), pastro Petro Giovanni Fontanini celebris Sanktan Meson por la meritplena esperantisto Rozario Sgroi animripoz.



Kovertkapo de la Biblioteko "Rozario Sgroi"

La 26an de februaro 1977, en la grupsideo, prof. Jozefo Zappulla faris prelegon pri: "Zamenhof, eltrovinto de Esperanto, kaj la problemoj pri la internacia lingvo".

En 1976 la ejoj de la grupo pasis sub la administrado de la Regiono Sicilia kaj en la unua jarduono de 1980 la grupo sin trovis en la situacio ekserĉi alian sidejon. Neniu provo valoris ĉe la publikaj Aŭtoritatoj kaj la kunvenoj okazis en la loĝejo de Francisko Canfarelli, en strato D.ro Consoli n.ro 63, antaŭ liaj demisioj pro lia transloko al alia sidejo.

Dume la biblioteko trovis novan lokon en la ejoj de la Mezgrada Lernejo "A. Manzoni" en strato Plebiscito.

La 3an de oktobro 1981, ĉe Granda Hotelo "Costa", en strato Etna n.ro 551, okazis la Kunveno de grupanoj por ekzameni allasajn petojn en la grupo de: f.ino Julia Galifi, f.ino Maria Gracia Mezzanotte, f.ino Elvezia Russo, f.ino Anna Gloria Scandura, Kap. Emanuelo Virgillito, jam grupano en la jaroj 1974 - 1975¹⁵.



↑ 1 ↑ 2 ↑ 3 ↑ 4 ↑ 5 ↑ 6 ↑ 7 ↑ 8

Kap. Emanuelo Virgillito ĉe la Grupo de Bari.

La foto estis farita la 14an de februaro 1976 okaze de la vizito de pastro Albino Ciccanti laŭ invito de la grupo "La Karavelo".

1. Dorina Reuschler, 2. Paŭlo Reuschler, 3. pastro Albino Ciccanti, 4. Nikolao Lasalandra, 5. Vincenzo Polignano, 6. Karlo Reuschler, 7. Irma Cellie, 8. Emanuelo Virgillito.

Noto 14 La Esperantista-Biblioteko "Rozario Sgroi" estis konsiderita la plej riĉa en la Suda Italio. Ĝi enhavis pli ol mil librojn kaj du mil revuojn. Je la dato de la 10a de junio 2003 (sciigo de prof. Gaetano Circià), la biblioteko estas ĉe la Teknika Industria Instituto "G. Marconi" (strato Episkopo Maurizio, 95126 Katanio). La katalogada laboro estis farita de prof. Jozefo Zappulla.

Noto 15 Kap. Emanuelo Virgillito jam loĝis de longe en Bari kaj li laboris ĉe la vojaĝagentejo "La Ventana". En 1981 li estis elektita en la Estraro de la Apulia Kultura Esperantista Asocio (adreso: ĉe E. Virgillito, strato A. Vaccaro n.ro 18, 70121 Bari) kun la tasko Sekretario, ofico, kiun li surprprenis ĝis lia reveno al Katanio.

Oni elektis la novan Estraron: prez. inĝ. Vincenzo Russo, vic-prez. f.ino Maria Gracia Mezzanotte kaj f.ino Elvezia Russo, sekr. kaj kas. Kap. Emanuelo Virgillito, vic-sekr. f.ino Anna Gloria Scandura, estrino Esperanto-Katedro prof.ino Franka Gravagno, estro Esperanto-biblioteko prof. Jozefo Zappulla, vic-estro Esperanto-biblioteko prof.ino Roza Rotondo.

La sidejomanko ne permesis gvidi Esperanto-kursojn kaj por trovi rimedon kontraŭ tiu nekonvenaĵo prof. Zappulla kaj inĝ. Russo sin turnis al Lernejestro de la Mezgrada Lernejo "A. Manzoni" por havi permeson utiligi, dufoje po semajno kaj je la vesperaj horoj, lernoĉambrom. Tio ankaŭ konforme al la Cirkulero n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952, adresita al la Provincaj Studestroj de la tiama Ministro pri Publika Instruado hon. Antono Segni. Bedaŭrinde la peto, skribe farita ankaŭ oficiale de la grupo, havis nean respondon pro la burokrataj formalajtoj ankaŭ ĉe la Regiono.

La problemo pri la sidejo estis multe sentita. La 21an de novembro 1981, en la Estrara Kunveno en la sidejo de la vojaĝagentejo "Romano Vojaĝoj" (strato Viktorio Emanuelo n.ro 192), kies Estro estis Kap. Virgillito, prof.ino Rotondo diris ke ŝi ekkontaktis Prezidanton de la Asocio Siciliaj Poetoj (strato Aloj n.ro 15), kiu estis inklina al akcepto senpage la Grupon Esperantistan de Katanio por plenumi kaj ĝian aktivecon kaj por gvidi Esperanto-kursojn.

La 12an de februaro 1982 la Estraro kunvenis unuafoje en la ejoj disponigitaj de la Asocio Siciliaj Poetoj. En tiu okazo oni decidis proponi al la I.E.F. kiel kandidataton Kap. Virgillito pri la nomumo de Regiona Delegito por la Orienta Sicilio.

La 4an de decembro 1982 estis faritaj la elektoj por la nova Estraro por la jarduoj 1983 - 1984. Oni elektis: prez. Kap. Emanuelo Virgillito, vic-prez. d.ro Vincenzo Romeo, sekr. s.ro Jozefo Smedile, kas. d.rino Anĝela Mangano, respondeculo pri la junula sekcio d.rino Anna Gloria Scandura, estrino Esperanto-Katedro d.rino Franka Gravagno, estro Esperanto-biblioteko d.ro Vincenzo Romeo.

En februaro 1983 prof. Gaetano Circià, Lernejestro de la Industria Teknika Instituto de Caltagirone, laŭ la invito de Kap. Virgillito, surprenis la oficon kiel Estro de la Esperanto-Katedro de Katanio post la demisioj de prof.ino Franka Gravagno.

La nova Estraro havas ŝanĝojn pro demisioj de titoluloj en la unua monatoj de la jaro 1983 kaj pro tio ĝi estas modifita tiele: prez. Kap. Emanuelo Virgillito, vic-prez. kaj estro biblioteko d.ro Vincenzo Romeo, sekr. s.ro Jozefo Smedile, konsilianoj f.ino Anna Gloria Scandura, ark. Johanbaptisto Nicastro kaj f.ino Elvezia Russo, revizoroj inĝ. Vincenzo Russo¹⁶, prof.ino Roza Rotondo kaj f.ino Eleonora Dell'Arte.

En la jarfino 1983 prof. Circià estis translokinta al Milano, kaj ĉar el Palermo alvenis al la grupo kvin petoj de kandidatoj por elteni la duagradan ekzamenon, Kap. Virgillito sin turnis al s.ro Henriko Mingo el Napoli. Ĉilasta difinis la ekzamenan daton la 15an de decembro 1983, en Katanio. La necerta situacio de la Katedro de Katanio estis farita al la Ĝenerala Direkcio de la Itala Esperanto-Instituto per skriba raporto de prof. Zappulla.

La 20an de junio 1984 oni proponis la nomumom kiel Regionan Delegiton de ark. Johanbaptisto Nicastro.

La 1an de decembro 1984 estis faritaj la elektojn por la renovigo de la Estraro por la jarduoj 1985 -1986: Oni elektis: prez. Kap. Emanuelo Virgillito, vic-prez. ark. Johanbaptisto Nicastro, sekr. f.ino Elvezia Russo, kas. s.ro Jozefo Smedile, estro de la biblioteko d.ro Vincenzo Romeo, konsilianoj inĝ. Vincenzo Russo, d.rino Anna Gloria Scandura.

La sideja bezono prezentiĝis en la komenco de la jaro 1984 kaj la kunvenoj okazis en la ejoj de la "Romano Vojaĝoj" atendante novan sidejon. Sekve de kontaktoj kun la nova Lernejestro de la Mezgrada Lernejo "A. Manzoni", al la grupo estis metita je plena dispono de la biblioteka ejoj, jam de longe uzitaj por la aktiveco de la grupa biblioteko mem.

La 26an de novembro 1986 oni elektis la novan Estraron por la jarduoj 1987 - 1988: prez. Kap. Emanuelo Virgillito, vic-prez. ark. Johanbaptisto Nicastro, sekr. s.ro Jozefo Smedile, estro biblioteko d.rino Anĝela Mangano, vic-estrino biblioteko kaj kas. prof.ino Dorothy Darmanin, konsilianoj f.ino Maria Roza Ali, prof. Roberto Di Benedetto.

1987, jaro de la Esperanto-Jubileo, trovas la Esperantistan Grupon de Katanio maleble celebri ĝin pro la malbonaj financaj statoj, kiuj ne permesas fari ian laŭpagan informan aktivecon (murafiŝoj, anoncetoj, k.t.p.). La grupsidejo bezonas bontenadajn laborojn (murstukaĵoj, plankado, malfermo de pordo masonita, kiu kunligas la du ĉambrojn konfiditaj al la grupo) sen kiuj la sidejo ne povos esti prezentbla al la publiko, precipe okaze de informaj manifestacioj.

La 7an de marto 1987, en la ejoj de la Industria Teknika Instituto "Tommaso Cannizzaro" de Katanio disponigitaj de Lernejestro prof. Gaetano Circià, okazis la 3agrada ekzamenoj. Sukcesis en ĝi Kap. Emanuelo Virgillito kaj ark. Johanbaptisto Nicastro el Caltagirone. La Komisiono konsistis el: Henriko Mingo el Napolo (Prezidanto)¹⁷, Jozefo Zappulla, Franka Gravagno, Roza Rotondo, Gaetano Circià.



Maldekstre: Emanuelo Virgillito, Henriko Mingo, Franka Gravagno, Gaetano Circià.
 Dekstre Johanbaptisto Nicastro, Henriko Mingo, Franka Gravagno, Gaetano Circià.

La 31an de majo 1987, en la sidejo de la Blindaj Itala Unio de Katania, Kap. Virgillito estis ekzamena Komisararo en ekstra sesio organizita de la Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj (I.A.B.E.).

La 28an de oktobro 1987 prof.ino Roza Rotondo estis nomumita Konsilianino de la Esperantista Grupo de Katanio anstataŭ Roberto Di Benedetto pro liaj neĉeestoj en la kunvenoj.

La 15an de januaro 1988 Kap. Virgillito estas je dispono por eventuala numumo kiel I.E.F.-Delegito por la Regiono Sicilio.

Pro la indispono de grupanoj surpreni estraj taskojn, la 6an de Novembro 1988 oni decidis prokrasti la renovigon de la oficoj al la venonta jarĉduo.

Pro la malbonaj kondiĉoj de la grupsideoj kaŭzitaĵ de humideco, oni devis necese transloki bibliotekon al alia ejo. Prof. Gaetano Circià, esperantisto de longe, estis je dispono akcepti la tutan libran materialon de la Biblioteko "Rosario Sgroi" en la ejoj de la Industria Teknika Instituto "Tommaso Cannizzaro" de Katanio, kiun li estras. La transloko de la tuta libra materialo de la grupsideoj en strato Plebiscito n.ro 784 ĝis la ejoj de la Industria Teknika Instituto okazis la 27an de februaro 1991.

La neuzeblo de la sidejo devigis la Esperantistan Grupon de Katanio interrompi ĉiun socian aktivecon atendante trovi novan sidejon. Tio kaŭzis ŝtelon plenumita de nekonataj ŝtelistoj, kiu akcelis la neceson transloki materialon de la nuna sidejo ene de la Mezgrada Lernejo "A. Manzoni" en strato Plebisito n.ro 784. Kap. Emanuelo Virgillito sin proponis disponebla transloki la restantan materialon al sia Agentejo "Vulkano Viaggi" (Vulkano Vojaĝoj) (strato Viktorio Emanuelo n.ro 48/a) en Gravina de Katanio.

En tiu loko, la 12an de januaro 1992, oni decidis ke la eliranta Estraro restu en sia ofico ankaŭ por la jarĉduo 1992 - 1993 pro la indispono de grupanoj surpreni oficojn.

La 9an de decembro 1992 oni subskribis liverprotokolon ejoj al la Komunumo de Katanio fare de: inĝ. Jozefo Raguza kaj geom. Vito Rapisarda, respektive respondeculo Semaforaj Instalaĵoj de la XVII Sektoro kaj Teknikisto de la V Sektoro de la Komunumo de Katanio, Emanuelo Virgillito prezidanto de la Esperantista Grupo de Katanio, prof. Jozefo Zappulla estro de la Esperantista-biblioteko "Rosario Sgroi".

Ĉiuj dokumentoj de la arkivo, la fotoj pri la 38a Itala Esperanto-Kongreso kaj la administraj dokumentaro de la grupo estis translokita al la ejoj de la Agentejo "Vulkano Vojaĝoj" ĉar ne estis alia ejo disponebla.

La 12an de decembro 1993, okaze de la Ĝenerala eksterordinara Kunsido, Kap. Emanuelo Virgillito informis, ke la 7an de decembro 1993 li aĉetis la domon lokita en Gravina de Katanio en strato Viktorio Emanuelo n.ro 9 por ĝin destini poste kiel vojaĝagentejo kaj li ĝin metas je grupa dispono ĝis kiam li komencigos la restrukturadajn laborojn. Oni decidis, laŭ la peto de Kap. Virgillito, transloki provizore la sidejon al strato Viktorio Emanuelo n.ro 9 - Gravina de Katanio, kune kun la Esperantista-biblioteko kaj la Esperanto-Katedro. Kap. Virgillito surprenis elspezojn por transloki materialon gardita en lia agentejo en strato Viktorio Emanuelo n.ro 48/a al la strato Viktorio Emanuelo n.ro 9, en la domo aĉetita de li mem. Plie, Kap. Virgillito klopodos informi tiujn, kiuj estas interesota pri la supredirita translokado (I.E.F., Milano; Itala Esperanto-Instituto, Verono; k.t.p.).

Noto 17 Henriko Mingo (Katanio, 9 oktobro 1915 - Napolo, 30 novembro 2003), gimnazia en Trapani (la patro instruis en la Klasika Liceo "Leonardo Ximenes"), li alproksimiĝis al Esperanto en 1955 okaze de renkontiĝo kun la kroata esperantisto Jakobo Percevic. Li akiris la unuan gradan diplomon en la jaro 1958 kaj la duan gradan en 1963. En la jaro 1966 li sukcesas per plej alta noto (50/50) en la 3grada ekzameno.

La 26an de februaro 1967 li starigas en Napolo la grupon "Harmonio kaj Progreso" kaj en 1997 li prezidas la Organizan Komitaton de la 66a Itala Esperanto-Kongreso (23 - 29 aŭgusto).

La 24an de oktobro 2000 la Kultura Arta Centro aljuĝas al li "honora" la Premion "Urbo Napoli" kiel Meritulo de la Kulturo por la disvastigo de Esperanto.



En aŭgusto 2002, en Verono (5a Eŭrop-Unia E.-Kongreso, 23 - 28 aŭgusto), okaze de la kunveno de la I.E.F., li ricevas la numumon kiel Honora Membro kaj artan pergamenon "por la plurdekjara aktiveco praktikita favore al Esperanto en Italio".

Dum la lasta jarkvardeko li gvidis senĉese kursojn en Kampanio (Napolo, Kaserto, Salerno, Benevento) kaj Molise (Kampobasso kaj Venafro). Li estis Prezidanto de ekzamenaj Komisionoj krom la antaŭa urboj, ankaŭ en Apulio (Bari kaj Margareta de Savoia), Kalabrio (Kosenzo kaj Reĝjo Kalabrio) kaj Sicilio (Katanio kaj Palermo).

Post la forpaso de Kap. Emanuelo Virgillito¹⁸ oni ne havas sciigojn pri la Esperantista Grupo de Katanio malgraŭ la multenombraj leteroj, kiujn sendis la skribanto al geesperantistoj, kiuj estis grupanoj.

Sidejo de la grupo:

- Esperantista-Grupo, ĉe prof. Francisko Geraci, strato Ughetti n.ro 24: 1952, 1954;
- Esperantista-Grupo, ĉe d.ro Ottorino Russo-De Felice, strato Ughetti n.ro 60: 1955, 1957;
- Esperantista-Grupo, ĉe prof. Johano Bruno, strato Conte Ruggero n.ro 105: 1960, 1961, 1962;
- Esperantista-Grupo "Georgo Canuto", strato Plebiscito n.ro 784: 1962, 1966, 1968, 1971, 1976, 1991;
- Esperantista-Grupo "Georgo Canuto", strato Viktorio Emanuelo n.ro 9, Gravina de Katanio: 1993, 1994, 1995.



Poŝtkarto subskribita de prof. Francisko Geraci



Poŝtkarto de Vincenzo Russo al prof. Zappulla

Noto 18 Emanuelo Virgillito (Katanio, 22 marto 1947 - tie, 10 junio 1995), diplomita Maŝinkapitano en la Naŭtika Teknika Instituto "Duca degli Abruzzi" (Duko de Abruzoj) de Katanio la 2an de aŭgusto 1967, li akiris la Instruistan Diplomon en Katanio la 7an de marto 1987 (Reg. n.ro 11210 de la 4a de majo 1987).

Kursoj:

- 1922 Rajtegaligita Teknika Instituto;
- 1923 Komerca Instituto (prof. Francisko Cavallaro);
- 1924 Sociaj ejoj de la Junulara Kristana Asocio (strato Naumachia n.ro 42). Adv. Stefano Senito malfermis kurson per prelego;
- 1954 Teknika Komerca Instituto "Giuseppe De Felice" (prof. Rozario Rizzo kaj Karmelo Rapisarda);
- 1955 tri lernejaj kursoj, kaj unu publika. El 47 partoprenantoj, 23 akiris la 1agradan ateston;
- 1961 Mezgrada Lernejo "Pirandello", 1a grado (prof. Johano Bruno);
- 1962 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, strato Etnea n.ro 248 (prof. Johano Bruno);
- 1963 sidejo de la Itala Junularo, 1a, 2a kaj 3a grado (prof. Johano Bruno). Akiris la 3agradan diplomon: Johana Canepa, Gaetano Cirià, Maria Matilde Finocchiaro, Dominico Finocchiaro, Lucrecia Giordano, Maria Luisa Grosso, Rosetta Pappalardo kaj Alfredo Perricone;
- 1964 Mezgrada Lernejo "Pirandello" kaj "Manzoni", 1a kaj 2a grado, per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952;
- 1965 Itala Junularo, 3a grado;
- 1965 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo (en la urboj Katanio kaj Vittoria, kiel deviga studobjekto), 1a kaj 2a grado. Sukcesis en la 1a grado n.ro 76, en la 2a grado n.ro 12 kaj en la 3a grado n.ro 9. Instruantoj en la sidejo, por la 1a kaj 2a grado: Jozefino Di Stefano kaj Jozefo Minio; ekstersidejo: prof. Johano Bruno;
- 1965 Mezgrada Lernejo "Pirandello", 2a grado (Maria Matilde kaj Dominico Finocchiaro);
- 1965 Mezgrada Lernejo "Manzoni", 1a kaj 2a grado (Anĝelo Ciravolo kaj Maria Pia Abramo);
- 1965 Ekstersekcio de la Sicilia Pedagogio pri Socia Servo de Katanio kaj Vittoria, 1a grado (prof. Johano Bruno);
- 1966 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, 1a kaj 2a grado (prof. Johano Bruno);
- 1966 Grupsidejo, 1a grado (Jozefo Minio) kaj 3a grado (prof. Johano Bruno);
- 1970 Supera Lernejo por Sociaj Asistantoj, ankaŭ en Lentini kaj Kaltanisseto, kiel deviga studobjekto;
- 1972 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, 1a kaj 2a grado. Komenco 22 novembro 1972 (prof. Johano Bruno);
- 1976 Mezgrada Lernejo "Grassi" (prof.ino Franka Gravagno);
- 1976 Komerca Teknika Instituto "C. Gemellaro (prof. Jozefo Zappulla);
- 1977 grupsidejo, 1a grado (prof. Jozefo Zappulla);
- 1977 Komerca Teknika Instituto "C. Gemellaro (prof. Jozefo Zappulla);
- 1977 Mezgrada Lernejo "Grassi" (prof.ino Franka Gravagno);
- 1978 Mezgrada Lernejo "Grassi" (prof.ino Franka Gravagno);
- 1978 Komerca Teknika Instituto "C. Gemellaro (prof. Jozefo Zappulla);
- 1982 Scienca Liceo "E. Fermi" en Paternò (Kap. Emanuelo Virgillito). La komisiono estis konsistigita el: prof.ino Franka Gravagno, prof.ino Roza Rotondo kaj prof. Jozefo Zappulla;
- 1983 2a grado en Paternò, (Kap. Emanuelo Virgillito). Ekzamenoj en oktobro;
- 1983 1a kaj 2a grado en la ejoj de la Asocio Siciliaj Poetoj. Komenco de la kurso la 16an de februaro 1983 (Kap. Emanuelo Virgillito kaj inĝ. Vincenzo Russo);
- 1987 1a grado, de la 25a de februaro 1987 ĝis la 16a de decembro 1987 (Kap. Emanuelo Virgillito). Oni propagandis la kurson en la ĵurnalo "Sicilia". Poste tiu anonco, Kap. Virgillito estis invitita por intervjuo de la loka televida reto Telecolor V3. Oni donis la lecionojn merkrede de la 18.00 ĝis la 20.00. Ekzamenoj faritaj la 16an de decembro 1987 en la grupsidejo.



Prof. Johano Bruno inter gelernantoj. Dekstre: libr. Rozario Sgroi
(Foto el: L'Esperanto n.ro 4, aprilo 1974, paĝo 2)

Z.E.O.

”Strato Esperanto”: decido n. 4576 de la 19a de oktobro 1964. Inaŭguro la 20an de septembro 1967. La peto estis farita de la Esperantista-Grupo “por memori la tre diskonigitan internacian helpan lingvon eltrovita de d.ro Zamenhof el Varsovio en 1886”, kiel oni legas en la decido. Ĝi estas flanko de strato Salvatore Citelli kaj finiĝas ĉe strato Karlo Fontanini.



Katania: strato Esperanto

CALTAGIRONE

En ĉi tiu urbo oni ekparolis pri Esperanto en 1968 post kiam prof. Johano Bruno, Prezidanto de la Esperantista Grupo de Katanio “Georgo Canuto”, estis la unua, kiu gvidis kurson ĉe la Sociologia Instituto. En la periodo de la 21a ĝis la 28a de novembro 1982 okazis la Unua Internacia Ekspozicio de Turismaj Afiŝoj kaj Broŝuroj “Urboj en la Mondo”. Elpensintoj kaj iniciatintoj de la ekspozicio estis Kap. Emanuelo Virgillito kaj ark. Johanbaptisto Nicastro de la Esperantista Grupo de Katanio.






Ark. Johanbaptisto Nicastro kaj Kap. Emanuelo Virgillito



La enirejo de la ekspozicio
(Foto el: L'Esperanto n.ro 3, marto 1983, paĝo 11)

La ekspozicio, kiu havis la Patronecon de la Skabeneco Kulturaj Valoraĵoj de la Urbo Caltagirone, eksponis kelkajn centojn da turismaj faldfolioj, afiŝojn, revuojn kaj aliaĵon en Esperanto. La ekspozicio okazis en la Salonego de la Speguloj disponigita de la "Sporting Club" (Sporta Klubo) en Placo de la Loggia (Loĝja).



Paneloj de la ekspozicio



Ark. Johanbaptisto Nicastro okaze de la inaŭguro de la ekspozicio



Kap. Virgillito dum lia parolado




Momentoj de la ekspozicio

En la periodo 20 - 24 novembro 1983, ĉiam ĉe la "Sporta Klubo", okazis la 2a fojo de "Urboj en la mondo" organizita de ark. Johanbaptisto Nicastro. En tiu okazo, la tagon 20an pastro Albino Ciccanti¹⁹, UECl-prezidanto, celebris, unuafoje en Caltagirone, la Sanktan Meson en Esperanto en la Preĝejo de la Jezuitaj Kolegio.

Noto 19 Pastro Albino Ciccanti (1930 - Forlì, 13 septembro 1994), franciskano. Forpasita tuj post lia reveno de la 8a U.E.C.I.-kongreso (Armeno, 9 - 13 septembro 1994). Esperantisto de pli ol 35 jaroj. Li estis U.E.A.-delegito por Katolikismo. Li estis konata kiel "Fluganta monaĥo", ĉar ofte li petis kaj ricevis senpage la flugon el la flugkompanioj. Li estis la celebranto de la unua Esperanto-Meso (1965). Li fondis kaj estris la Esperantistan Centron de Rimini.

La 9an de decembro 1987, en la notaria kabineto de d.ro Vincenzo Montemagno (strato Viktorio Emanuelo n.ro 17), oni fondis la Esperantistan Grupon de Caltagirone "Verda Aglo"²⁰, kun sidejo en strato Viktorio Emanuelo n.ro 25, zorge de: Jozefo Cali, Nikla Caruso, d.rino Konĉetta Franco, geom. Luizo Giaquinta, Anna Interlandi, pastro Antono La Spada, d.ro Alfio Lo Faro, d.ro Petro Malventano, ark. Johanbaptisto Nicastro, Rosanna Nicoletti, adv. Francisko Randazzini, Francisko Rapisarda, d.rino Konĉetta Trovato.



La fonda akto

En tiu okazo oni atribuis la sociajn oficojn kaj tio estas: prez. ark. Johanbaptisto Nicastro, vic-prez. d.ro Alfio Lo Faro, sekr. Jozefo Cali, vic-sekr. Anna Interlandi, estrino bibl. Roksana Nicoletti, kas. Francisko Rapisarda, organiza respondeculo Nikla Caruso.

Ark. Johanbaptisto Nicastro tre multe klopodis por disvastigi la Internacian Lingvon en lia urbo kondukante preskaŭ sole liajn batalojn, kun oferemo kaj granda engaĝiĝo. "Konvinkita asertanto de senlima sicilieco" (li estis ankaŭ Prezidanto de "Sicilio nia", Asocio de Serĉantoj por la Renaskiĝo de la Sicilia Nacia Kulturo)²¹, en januaro 1991, okaze de la festo Sankta Jakobo, celebra la tagon 11an, li surmetis "trilingva"-n tabelon el ceramiko kun la origina stratnomo anstataŭigante la tabelon strato Viktorio Emanuelo. Tio por rekuperi la antikvan toponimion de strato Sankta Jakobo, malfermita de la normana Roĝero de Altavilla (dirita Roĝero I) en 1090 por konduki al la konstruonta Baziliko Sankta Jakobo. Post kiam la diservo finis, ark. Nicastro forigis la tabelon per siaj manoj tiel kiel li ĝin surmetis la antaŭan tagon. Ĉar en Caltagirone la toponimia problemo ankoraŭ ne estis solvita, per tiu ago ark. Nikastro poste klarigis ke "sia" tabelo, se adoptota de la Komunumo, estus la unua trilingva strattabelo enhavante skribon en sicilia lingvo kaj Esperante²². La sciigo estis eldonita en "La Sicilia" de la 9a de februaro 1991.



Leterkapo de la Asocio

Nota 20 La titolo por la grupo de tiu nomo estas pro la koloro de Esperanto, ĝuste la verda, kaj pro la aglo ĉar ĝi enmetita en la Ŝildo de la Komunumo de Caltagirone. La fonda akto de la grupo estis registrita per n.ro 3.000 la 21an de decembro 1987.

Nota 21 "Sicilio nia", kultura asocio "por la morala kaj ekonomia renaskiĝo de Sicilio kaj Mediteraneo" kun sidejo en strato Sankta Bonaventura n.ro 38. La eldonoj kaj la korespondaĵo de la Asocio estas skribitaj sicillingve.

Nota 22 En Friulo, ekzemple, la tabeloj indikantaj lokojn kaj komunumajn oficojn havas ankaŭ la skribon friullingve.



La "trilingva" tabelo de strato Sankta Jakobo



La surmetita strattabulo de ark. Johanbaptisto Nicastro.
Ĝi estas videbla en masonita.

CALTAGIRONE

Una targa «trilingue»

Riporta il nome originale di una strada
Collocata da un architetto, è stata poi rimossa



L'originale targa «trilingue»

CALTAGIRONE — Con un gesto polemico di protesta civile, l'arch. Titta Nicastro ha collocato all'inizio di via Vittorio Emanuele una targa «trilingue» in ceramica con il nome originario della via. Le lingue sono l'italiano, il siciliano e l'esperanto. La targa con la scritta «Strada di San Giacomo» è stata successivamente rimossa.

Gli abitanti della strada, con il parroco in testa, hanno sottoscritto una petizione per riavere il nome originario. L'iniziativa dell'arch. Nicastro era di

sollevare l'interesse popolare. E c'è pienamente riuscito.

Sostanzialmente, per la gente di Caltagirone, quella è e resta la «Strada di San Giacomo». E l'argomento dà l'occasione per ribadire la necessità dell'uso della maiolica quale supporto della toponomastica e delle targhe degli uffici pubblici. Qualche riuscito tentativo c'è stato: il commissariato di polizia, l'istituto di Sociologia e un punto commerciale di via Taranto. Perché ci si è fermati solo qui?

A. G.

La sciigo eldonita en la ĵurnalo

Sidejo de la grupo:

Esperantista-Grupo "Verda Aglo", strato Viktorio Emanuelo n.ro 25: 1987, 1991.

Kursoj:

- 1968 Pedagogio pri Socia Servo, 1a grado (prof. Anĝelo Ciravolo);
- 1983 1a grado, kun 20 partoprenantoj. Ekzamenoj faritaj la 27an de junio 1983 en la Teknika Industria Instituto (ark. Johanbaptisto Nicastro);
- 1983 en la Episkopa Seminario. Oni donis lecionojn en lernoĉambro de la Mezgrada Lernejo "Piero Gobetti" disponigita de Lernejestro prof. Rikardo Fragapane (ark. Johanbaptisto Nicastro). Ĝi estas la dua kurso, kiun oni gvidas en Caltagirone per apliko de la Cirkulero n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952;
- 1984 1a kaj 2a grado (ark. Johanbaptisto Nicastro);
- 1987 en la sidejo de la Movado Katolikaj Laboristoj (Malsupreniro Sankta Agata n.ro 8) gvidita de Istvan Ertl, hungara studento.

ACI CATENA

Z.E.O

"Strato Esperanto": inaŭguro la 8an de februaro 1968. Ĝi estas flanka de la ĉefstrato Viktorio Emanuelo, en la historia centro.



Aci Catena: strato Esperanto

ACIREALE

En ĉi tiu urbo, je 16 kilometroj el Katanio, la 23an de februaro 1964 oni fondis novan grupon. La 1an de marto grupanoj elektis: prez. s.ro Franko Grasso, sekr. s.ro Kamilo Feletti, konsiliano inĝ. Vito Messina.

Sidejo de la grupo:

Esperantista-Grupo, ĉe Franko Grasso, strato Genuardi n.ro 17: 1964, 1965, 1966.

Kursoj:

- 1959 Ŝtata Porinstruista Instituto, elementa kurso, per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952 (prof. Johano Bruno);
- 1963 Ŝtata Scienca Liceo, elementa kurso (prof. Johano Bruno).

GIARRE

En ĉi tiu urbo, je 30 kilometroj el Katanio, pro merito kaj pro la asidua agado de la I.E.F.-delegito adv. Karmelo Caltabiano, en 1924 oni starigis esperantistan grupon, al kiu partoprenis eminentuloj de la loka intelekta klaso, precipe profesiuloj kaj instruistoj.

Kursoj:

- 1964 Ŝtata Scienca Liceo (Placo Karmine);
- 1965 Ŝtata Scienca Liceo, 1a grado (prof. Johano Bruno);
- 1966 Ŝtata Scienca Liceo, 1a grado (prof. Johano Bruno);

MINEO

Post la restaŭradaj laboroj, en Palaco Capuana, naskiĝa domo de la fama verkisto, oni ordigis la Urban Bibliotekon. Unu salonego el la teretaĝo de la impona konstruaĵo estis dediĉita al Esperanto, kie estas gardata la kolekto de libroj, revuoj kaj korespondaĵo pri Esperanto, kiun familianoj de la forpasita prefekto d.ro Petro Rizzo donacis al la Biblioteko.

PROVINCO DE SIRAKUZO



Sirakuzo

SIRAKUZO

Dank'al la iniciato de prof. Petro Fredas¹, Instruisto pri Librotenado en la Reĝa Teknika Instituto kaj ano de la grupo de Venecio, oni fondis la Esperantista-Grupon en ĉi tiu urbo, al kiu jam aliĝis 80 personoj. La solena kuniĝo okazis la 20an de novembro 1915 kaj oni elektis prof.-on Fredas kiel Prezidanton kaj la aliĝon al la Katedro². El la eminentuloj pli elstaraj aliĝis prof.-oj Melidoni, Peres, Vinci kaj De Cristoforo. Oni ricevis la aliĝojn ĉe la Sekretario Luizo Sassone (strato Maestranza n.ro 22) kaj ĉe Francisko Garofalo, studento en la tria licea kurso.

Poste, dum la unuaj monatoj de la jaro 1916, la grupo kuniĝis kun la Kultura Klubo de Sankta Lucia, estrita de prof. Cappello.

La 13an de majo 1917 prof. Petro Fredas faris prelegon en la Reĝa Teknika Instituto de Melfi pri: "Esperanto, faktoro de civilizo kaj progreso". La prelego, poste, estis eldonita fare de la Presejo A. Liccione de Melfi, je la elspezoj de la Esperantista-Grupo de Melfi³.



La 5an de aŭgusto 1953 la senlaca Delegito por Sicilio adv. Jozefo Stanislawo Boscarino faris prelegon.

La du domoj por la Protektado de Junulino adoptis la uzon de Esperanto.

Rudolfo Castagnino, pasia fakulo kaj aktiva propagandisto pri Esperanto, aŭtoro de diversaj tradukoj: *Cavalleria Rusticana* (Kampanara kavalireco) de Johano Verga⁴ (1923), *Dagli Appennini alle Ande* (De Apeninoj ĝis Andoj) el *Koro* de Edmondo De Amicis⁵, *Racconti per ragazzi* (Rakontoj por geknaboj) de Italo Toscani (1932), estis U.E.A.-delegito. Li proponis sian kontribuon por eldoni verkojn en la revuo "L'Esperanto" kaj propagandajn artikolojn por Esperanto en la "Gazzetta di Siracusa" (Gazeto de Sirakuzo).

Kursoj:

- 1954 Instituto de Ursulaninoj (Porinstruista Supera Lernejo) kun 50 lernantinoj. Instruantino: monaĥino Maria Stella Rocuzzo, magistriĝita pri Juro.



Du verkoj tradukitaj de Rudolfo Castagnino

Noto 1 Greka laŭ naskiĝo, li finis la klasikajn studojn en Grekio. Dum lia aliĝo al la grupo de Venezia, li ekesperantigis *Iliado*-on de Homero.

Noto 2 La nomo Siracusa estas en la kapo de "L'Esperanto" n.ro 10 - 11 de la 25a de oktobro - 25a de novembro 1915.

Noto 3 Ekzemplero de la eldonaĵo oni povas konsulti en la biblioteko de la grupo "Nova Espero Friuli".

Noto 4 Giovanni Verga (Catania, 2 septembro 1840 - tie, 27 januaro 1922), la plej granda fakulo pri Verismo, li prezentis la vivon de lia popolo, la medion de humiluloj kaj li kreis rakontan lingvon novan en la itala tradicio.

Noto 5 Edmondo De Amicis (Oneglia, Imperia, 21 oktobro 1846 - Bordighera, Imperia, 11 marto 1908), post kiam li studis en Cuneo kaj Torino je 16jara li eniris la Oficirlernejon de Modena kie li iĝis oficiro. Demisiita el la armeo, li iĝis la verkisto la plej legita en Italio, sekve de la eksterordinara sukceso de la verko *Koro* (1866).

PROVINCIA DE RAGUZO



Raguzo



Vittoria - Viktoria



Comiso - Komiso




Scicli - Šikli



Modica - Modjka

RAGUZO


Jozefo Stanislaŭ Boscarino - Boskarino (Ragusa, 10 novembro 1899 - tie, 21 oktobro 1971), advokato, estis unu el pioniroj de Esperantismo en Sicilio. 14jaraĝa kune kun la patro kuracisto, d.ro Francisko, li vizitis Esperanto-kurson gvidita de pastro Johano Di Giacomo. Membro de la Itala Esperanto-Katedro, li estis tre aktiva precipe post la 2a Mondmilito. En 1945 li fondis kaj estris ĝis 1962 la Sicilian Delegacion de la I.E.F. (ĉe adv. Boscarino, Korso Viktorio Veneto n.ro 92). Li organizis kvar Regionajn Kunvenojn: Katanio (26 - 27 majo 1951), Palermo (6 - 7 aprilo 1957), Taormina (8 - 9 aprilo 1961), Sciacca - Ŝaka (5 - 7 majo 1962) kaj en 1958 li estis Vic-Prezidanto de la Organiza Komitato de la 29a Itala Esperanto-Kongreso en Palermo (23 - 27 aŭgusto). Dum tiu kongreso oni elektis lin kiel Honoran Membron de la I.E.F..



Adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino
(Foto el: L'Esperanto n.ro 2 - 3, februaro - marto 1972, paĝo 14)

Li tre klopodis por Esperanto disvastigante kaj prelegante en diversaj siciliaj urboj kaj gvidante multajn kursojn fondinte grupojn kaj katedrojn. Plie, li tre klopodis por titoligi stratojn al Esperanto en kelkaj urboj de la insulo¹. Li prezentigis al sen. Moltisanti, ĉe la Itala Parlamento, la unuan leĝproponon por instrui Esperanton en la lernejoj².


Li interesiĝis pri filatelio eldoninte poŝtkartojn reproduktante ĉiujn poŝtmarkojn dediĉitaj al Esperanto kaj multajn aliajn poŝtkartojn kaj glumarkojn en Esperanto.



Poŝtkarto de adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino

Noto 1 Per letero de la 15a de decembro 1958 kaj adresita al la Urbestro de Raguzo, Karmelo Pisana, adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino sukcesis titoligi straton laŭ la nomo Esperanto ankaŭ en lia urbo.

Noto 2 La 19an de januaro 1962 sen. Moltisanti el Raguzo prezentis al Parlamento la leĝproponon n.ro 1890 "Starigo de kursoj por la instruo de Esperanto en la duagradaj lernejoj de 1a kaj 2a grado". Ĉi tiu unua provo por leĝfara agnosko de la Internacia Lingvo en Italio, ne sukcesis pro la forpaso de la proponinto.



Propagandmaterialo

Interalie, en 1959 li eldonigis esperantan kurson en la filatela gazeto "Il Filatelico" (La Filatelisto), aperita en Katanio³.

En 1962, pro labora motivoj, li demisiis kiel Regiona Delegito por Sicilio.

Li havis multe da rekompencoj kiel la titolon Komandoro ne nur de la Itala Respubliko sed ankaŭ de la Sankta Sidejo. Dank'al li kard. Ernesto Ruffini, dum lia juneco, lernis Esperanton kaj aliĝis denove al la Movado. Kard. Ruffini, Ĉefepiskopo de Palermo, estis Honora Komitatano dum la 29a Itala Esperanto-Kongreso (Palermo, 23 - 27 aŭgusto 1958). En la 4a I.K.U.E.-kongreso (Romo, 4 - 10 septembro 1913), dum lia parolado tiele li parolis pri Esperanto: "... Esperanto min allogis ekde mia juneco kaj mi deziras, ke ĉiuj rekonu ĝian utilecon precipe por faciligi la komprenon de la homoj el landoj diversaj en la mondo". Por la siciliaj esperantistoj tiuj vortoj estis pozitiva signo por disvatigi ĉiam pli Esperanton en la katolika mondo.

Per dekreto de Prezidento de la Regiono Sicilio, adv. Boscarino estis nomumita Prezidanto de la Provinca Kontrola Komisiono de Ragusa. Tiu Komisiono, en la aŭtonomaj regionoj, havas la funkcion de Prefekto.

Li forpasis en sia naskiĝa urbo pro trombozo.

TRISTA SICILIA AŬTUNO

Amata tero, suna Sicilio,
kie parfume citronujo floras,
kaj inter densa verdo de l' folio
flambrietante la oranĝo oras!

Pri vi kor-arde digna fil' sopiris;
per li tra landoj mita ĉarmo via,
mistere rava, la atenton tiris,
kaj helpis l' idiom' internacia.

Aŭtuno trista venis kun doloro;
sur la horloĝo de la tera vivo
sonoris sen kompat' la lasta horo:
la kor' rompita haltis ĉe l' deklivo.

En vi nun, forrabita de l' destino
eterne dormas Slao Boscarino

Luigi Minnaja

La poezajo de prof. Luizo Minnaja por la forpaso de adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino

En 1952, laŭ la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952 "Kursoj pri Esperanto-Lingvo", kaj kun la celo prepari instruistaron taŭga por doni lecionojn pri Esperanto en la lernejoj, estis malfermita kurso por instruistoj de la mezgrada lernejo. Fine de la kurso sin prezentis 21 geinstruistoj de la lokaj mezgradaj lernejoj. La ekzamena Komisiono Konsistis el adv. Boscarino kaj prof. ino Bianka De Falco kaj prezidita de s.rino Anna Rizzone, Lernejestrino de la Mezgrada Lernejo de Raguzo. Unua en la klasifiko estis prof. ino Vanda Ingraŭ, naskiĝinta en Goricio, al kiu estis donacita ekzempleron de Plena Vortaro.

Analogan kurson por elementaj instruistoj gvidis adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino en la monato de februaro 1953. La Komisiono prezidita de la Lerneja Inspektoro d.ro Kaloĝero Zacco - Zako kaj konsistigita el prof. ino Di Giacomo kaj adv. Boscarino aprobis 68 kursanojn kontraŭ 98 partoprenantoj. Aprobita per plej altaj notoj fraŭlino Salvina Schembari, al kiu oni donacis ekzempleron de Plena Vortaro.

Noto 3 La revuo "La Filatelisto", de Katanio, estis estrita de s.ro Luizo Musumarra, filatelamanto kaj simpatianto por Esperanto. En ĉi tiu revuo oni eldonis diversajn artikolojn pri la rilatoj inter Esperanto kaj filatelio.

Poste oni lotis la tri unualokaj klasitoj en la Esperanto-kursoj gviditaj en Raguzo, Comiso kaj Vittoria. Fortuno favoris la instruistino Johana Peluso, el Comiso, al kiu oni ekabonis "Heroldo de Esperanto"-n por la jaro 1953, donacita de adv. Boscarino.

En 1959, dank'al la interesiĝo de la Sicilia Delegacio de la I.E.F., en la "Gvidlibro pri Raguzo", eldonita de la Komunumo, aperis longa artikolo titolita "Esperanto en Raguzo".

Kursoj:

- 1952 per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952, por geinstruistoj de mezgrada lernejo (adv. Jozefo Stanislao Boscarino);
- 1953 per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411, por geinstruistoj de elementaj lernejoj (adv. Jozefo Stanislao Boscarino);
- 1965 Asistantaj Lernejo, 3a grado (prof. Johano Bruno).

Z.E.O.

"Strato Esperanto": decido n.ro 74 de la 18a de decembro 1958. Inaŭguro la 5an de aprilo 1959, okaze de la jarreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof.

La peto por titoligi straton al Esperanto estis farita la 15an de decembro 1958 de adv. Jozefo Stanislao Boscarino.

Tiu strato troviĝas en la kvartalo Villa Pax (Vilao Paco), industria Centro de la urbo, apud la stacidomo kaj en la proksimeco de la Junulargastejo.




Postkarto kun strato Esperanto





Raguzo: strato Esperanto



Raguzo: mapo kun la indiko de strato Esperanto

Prof. Pisana, Urbestro de Raguzo, sciigante la novan toponimon al adv. Boscarino, skribis: “Dediĉante straton al Esperanto mi esprimas mian konsenton kun la esperantista ideo, kiu celas la interkompreniĝon kaj la fratiĝon de ĉiuj popoloj inter ili; ideo tre ŝatata en nia Ragusa kie ĝin disvastigas la pioniroj de Esperantismo”.

VITTORIA

La 23an de februaro 1953, en la ĉeesto de la Lerneja Direktoro d.ro Salvatore Iurato kaj de la Re prezentanto de la Lerneja Sindikato prof. Jozefo Zacco, adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino gvidis la unuan lecionon de la kurso por elementaj instruistoj. Aliĝis 95. Fine de la kurso, la ekzamena Komisiono, integriĝita per prof.ino Karmela Di Giacomo, aprobis nur 72 el 95 kandidatoj. La plej unua estis instruistino Johana Buccellato, al kiu oni donacis ekzempleron de Plena Vortaro.

La 25an de majo 1986 okazis la premia ceremonia de la literatura konkurso “Giorgio La Pira”. En la sekcio Esperanto, la unuan premion oni aljuĝis al Spomenka Ŝtimec⁵ el Jugoslavio.

Noto 5 Spomenka Ŝtimec (Orehovica, 4 januaro 1949), verkistino, tradukistino, instruistino pri Esperanto. Diplomiĝita pri lingvoj en 1972 (germana kaj franca), ŝi eklernis Esperanton en 1964. Ŝi aktive partoprenis en la T.E.J.O. kaj ŝi organizis la 29an I.J.F.-on en Sarajevo (1973). De la jaro 1972 ĝis 1994 ŝi laboris en la Internacia Kultura Servo.

Kursoj:

- 1953 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952 (adv. Jozefo Stanislao Boscarino);
- 1964 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, 1a kaj 2a grado;
- 1967 Sicilia Pedagogio pri Socia Servo, 1a kaj 2a grado (prof. Johano Bruno);
- 1967 grupsideo, 1a kaj 2a grado (Jozefino Di Stefano kaj Jozefo Minio).

COMISO

En 1922 estis fondita grupo fare de prof. Salvatore Nipote, delegito de la I.E.F..
La 22an de februaro 1953 okazis la skriba ekzameno de la Esperanto-kurso por elementaj instruistoj de Comiso. La partoprenantoj estis 60. La ekzamena Komisiono estis prezidita de la Lerneja Direktoro prof. Emanuelo Pitruzzello, d.ro Karmelo Nasello kaj adv. Jozefo Stanislao Boscarino, Regiona Delegito de la I.E.F. kaj estro de la Esperanto-Katedro de Raguzo. Fine la ekzamenoj, la Komisiono aprobis 43 el 60 partoprenantoj. Unualoka klasito estis fraŭlino Johana Peluso, al kiu oni donacis ekzempleron de Plena Vortaro.


Kursoj:

- 1953 por instruistoj, per apliko de la Cirkulero de la Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952.

SCICLI

Z.E.O.

“Strato Esperanto”. Decido n.ro 208 de la 18a de decembro 1959. Ĝi estas flanko de strato Josuo Carducci – Kardučĉi, en la vilaĝo Lungi.



Scicli: strato Esperanto

MODICA

Komence la Esperanto-Movado disvolviĝis ne en la grandaj urboj sed en la malgrandaj; fakte la kapo de "L'Esperanto" n.ro 1 de la 10a de januaro 1913 raportas ankaŭ ĉi tiun urbeton. Grandaj urboj kiel Trento, Triesto kaj Goricio ne estis de la Itala Regno, sed de la aŭstria-hungara Imperio.


En februaro 1913 kanoniko Petro Favacchio - Favakio, membro de la Itala Esperanto-Katedro kaj U.E.A.-Delegito por la Italaj Esperantista-Institucioj, gvidis Esperanto-kurson kun la partopreno de diversaj Liceanoj. La postajn monatojn mons. Petro Favacchio gvidis kursojn ankaŭ ĉe la Reĝa Liceo kaj ĉe la Reĝa Teknika Instituto kaj vesperkurson por laboristoj.

La ĵurnalo "Indipendente" (Sendependa) de la 8a de marto 1914 anoncas la kurson gvidita de prof. Petro Favacchio.

Mons. Petro Favacchio loĝis en strato Ritiro n.ro 47.



Mons. Pietro Favacchio



Poŝtkarto de mons. Petro Favacchio

PROVINCO DE ENNA



Valguarnera-Caropepe

VALGUARNERA-CAROPEPE

En ĉi tiu urbeto je 19 km el Enna, la Zamenhofa lingvo estas disvastigata de Ugo Izidoro Patti, naskita en Marsala (Trapani) la 4an de aprilo 1946, emerito. Li havis unuan konon pri Esperanto kiam prof. Joakino Aldo Ruggieri, lia instruisto pri Beletro, kunportis en klason du gramatikojn de Grazzini donacinte ilin al du studentoj. Post kiam li transloĝiĝis al Bergamo¹, li alproksimiĝis al Esperanto okaze de la 60a Nacia Kongreso (Bergamo, 26 aŭgusto - 1 septembro 1989), kiu okazis en tiu urbo. Aĉetitaj kelkajn librojn, li ekstudis la lingvon ĉe inĝ. Leo Franzoni en Treviglio. Poste, ricevinte inviton de la I.E.J. el Torino, li partoprenis en kunveno organizita en Napoli. La sperto en Napoli vekis por li la studadon de Esperanto kaj aŭtodidakte li prepariĝis por elteni la unuagradan ekzamenon en Portonovo okaze de la 71a Itala Esperanto-Kongreso (27 - 31 aŭgusto 2003) kaj la duagradan en Udino, ĉe la grupo "Nova Espero Friuli"².



Ugo Patti gaste ĉe la skribanto

La 15an de decembro 2005 li fondis la Kulturan Asocion Sicilia Esperanto-Grupo "Ludovico Lazzaro Zamenhof" por "faciligi la konon, la komprenon kaj la fratecon inter ĉiuj popoloj de la tero" pere de la Internacia Lingvo Esperanto. La Asocio havas sidejon en la loĝejo de la fondinto.

Noto 1 Post kiam li venkis la rilatan konkurson, li laboradis 21 jarojn ĉe la Studestra Oficejo

Noto 2 La atestoj estas registritaj per la n.ro 13695 kaj n.ro13742 respektive la 31an de aŭgusto 2003 kaj la 19an de junio 2004 en la registro de la Itala Instituto de Esperanto.

PROVINCIA DE AGRIGENTO



Agrigento



Canicattì - Kanikattì



Menfi



Porto Empedocle - Porto Empedocle



Sciacca - Šaka



Ribera




Calamonaci - Kalamonači

AGRIGENTO

Dank'al la agado de d.ro Francisko D'Alessandro, en 1957 oni konstituis Provizoran Komitaton por disvastigi Esperanton.

Sidejo de la grupo:

- Esperanta Grupo "Konkordo", strato Callicratide n.ro 69, ĉe Ciotta - Ĉotta.



Poŝtkarto de la grupo

CANICATTI

Avenia pastro doktoro Kaloĝero (avenuo Reĝino Margareta, 75); Delegito U.E.C.I. 1960.

MENFI

La Urba Administrado, prezidita de Urbestro inĝ. Jozefo Bilello Palagonia (Sankta Margherita de Belice, 22 septembro 1899 - Palermo, 7 novembro 1980), ano de la I.E.F. kaj Delegito U.E.A. en Menfi, decidis titoli straton al Esperanto. La nova strato estos titolita "Avenuo Esperanto". Oni devas tiun sukceson dank'al la senĉesa propaganda agado kaj interesiĝo de adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino el Raguzo.

Z.E.O.

"Avenuo Esperanto": decido n.ro 11 de la 5a de junio 1962. Inaŭguro: 1962. Ĝi estas la eks strato Z 12, kiu, de strato Gianturco, finiĝas, Norde, ĉe la Ŝtata Strato n.ro 115.



Menfi: avenuo Esperanto

PORTO EMPEDOCLE

Z.E.O.


"Promenejo Esperanto": inaŭguro la 21an de aprilo 1963. La titolo estis decidita, laŭ la peto de Urbestro d.ro Jozefo Sinesio (Porto Empedocle, 18 majo 1921 – Palermo, 14 februaro 2002), en la kadro de la manifestacioj por celebri la centjaran datrevenon de la fondo de Porto Empedocle. La inaŭguro okazis la 21an de aprilo 1963 en la ĉeesto de multenombra publiko, de lokaj aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de la siciliaj grupoj esperantistaj, kiuj venis el ĉiuj lokoj de la insulo. La Urbestro, antaŭ ol depreni la verdan flagon de la strattabulo "Promenejo Esperanto", memorigis ke Porto Empedocle naskiĝis antaŭ cent jarojn kiel fiŝista vilaĝo kaj nun ĝi estas unu el la plej gravaj industriaj kaj komercaj centroj en Sicilio. La Urbestro, plie, substrekis ke la nomo "Esperanto" donita al promenejo de CAOS¹ havas signifon ĉar tiu strato estas la unua peco de granda arterio, kiu kunligos Porto Empedocle kaj la plej gravaj industriaj kaj minaj centroj, kaj ĝi estas por Porto Empedocle la strato de la espero.

Al la Urbestro respondis s.ro Antono Ciotta, pioniro de Esperanto en Agrigento kaj en Porto Empedocle kaj reprezentanto de la I.E.F..

Poste esperantistoj iris al la tombo kaj al la naskiĝa domo de Luizo Pirandello (Girgenti, Agrigento, 28 junio 1867 – Romo, 10 decembro 1936). Prof. Karmelo De Leo en lia parolado diris ke Luizo Pirandello nun apartenas al la tuta mondo ĉar lia arto estas universala tiel, kiel la Zamenhofa Lingvo. La arto de Pirandello kaj Esperanto naskiĝis ambaŭ dum malfacilaj periodoj; nun ili ne havas patrujon, sed ili apartenas al la tuta mondo.

Ĉeestis prof. Johano Bruno kun la grupo de Katanio, prof. Franko Tulone kun la grupo de Sciacca, d.ro Rozario Abate kun la grupo de Palermo kaj multaj esperantistoj el kiuj Alfredo Perricone Pirandello², familiano de la verkisto.

Ĝi estas flanko de strato Granciara.



Porto Empedocle: strato Esperanto

Noto 1 CAOS: kvartalo de Agrigento kie naskiĝis Luizo Pirandello.

Noto 2 Nevo sur la ina flanko de Luizo Pirandello. Unue konata nur en Sicilio, li akiris renomon kiel brila prozisto je nacia nivelo. En 1974 li havis la unuan premion en la konkurso "Luciano Cattorini" pro la originala prozo en Esperanto per la verko *La mistera kastelo de Baronino Risi*. La konkurso estis anoncita de la Literatura Klubo "La Patrolo".



↑ ↑ ↑ ↑ ↑
1 2 3 4 5

Promenejo Esperanto: kelkaj partoprenantoj en la inaŭguro.
1. d.ro Jozefo Sinesio, 2. prof. Karmelo De Leo, 3. d.ro Rozario Abate,
4. prof. Johano Bruno, 5. prof. Franko Tulone
(Foto el: L'Esperanto n. 81 nova serio, majo - junio 1963, paĝo 52)

SCIACCA

Ankaŭ Sciacca havis sian pioniron kun prof. Jozefo Chiappisi. Li havis du celojn en lia vivo: la familion kaj la lernejon. Li eklernis Esperanton ekde la komencoj de la jaro 1918 kaj ĉiam li klopodis por la esperanta ideo. En 1957 li faris lian unuan Esperanto-kurson kaj tuj post, kune kun prof. Franko Tulone kaj prof. ino Franciska Venezia, li fondis la lokan grupon kaj estis prezidanto. La 25an de oktobro 1958, pro sanaj problemoj, li lasis la oficon al prof. Franko Tulone kaj oni nomumis lin Honora Prezidanto de la grupo. Li forpasis en lia naskiĝa urbo la 28an de decembro 1959, 57jara.

En la monato de novembro 1958 la grupo organizis Interprovincan Kunvenon, en kiu partoprenis esperantistoj el Palermo, Trapani kaj Raguzo kun la celo pristudi la ilojn por pli intensa propagando en la Okcidenta Sicilio.

La 14an de decembro 1958, en la Salonego de Termoj Seluntine, esperantistoj kunvenis por rememori la Majstron. Prof. Franko Tulone faris prelegon koncerne al li.

La 18an de septembro 1960, okaze de la ĝenerala kunveno kaj prezidita de la Regiona Delegito por Sicilio, adv. Boscarino, oni decidis unuanime titoli la grupon laŭ la nomo de prof. Jozefo Chiappisi. Poste oni elektis la novan Estraron: prez. prof. Franko Tulone, vic-prez. d.ro Francisko Antogna, kas. d.ro Vincenzo Lupo, sekr. s.ro Mikelo Di Giovanna, konsilianoj d.rino Maria Cassar, d.rino Maria Roza Cucchiara, s.ro Filipo Chiappisi, revizoroj prof. Salvatore Ficani, d.ro Nikolao Lombardo, d.ro Primo Veneroso.

Adv. Valentino Sclafani disponigis sian oficejon, kie ĉiusabate la grupo kunvenas por la perfektiga Esperanto-kurso.

En 1961 d.ro Vincenzo Lupo, en la Karmine-a Salonego, faris prelegon pri: "Esperanto, unu lingvo, unu ideo, unu movado".

La 3an de septembro 1961, prezidita de la Regiona Delegito por Sicilio, adv. Boscarino, okazis la jarkunveno de la grupo "Jozefo Chiappisi". Oni elektis: prez. prof. kav. Franko Tulone, vic-prez. d.ro Francisko Antogna, kas. d.rino Maria Kassar, sekr. s.ro Anselmo Diliberto, konsilianoj fraŭlino Maria Roza Cucchiara, d.ro Vincenzo Lupo, d.ro Filipo Chiappisi, prez. de la revizora kolegio prof. Nikolao Lombardo, sindikoj s.ro Mikelo Di Giovanna kaj d.ro Salvatore Ficani.

La 14an de decembro 1963, okaze de la jarkunveno, oni elektis: prez. kav. Franko Tulone, vic-prez. d.ro Francisko Antogna, sekr-kas. d.ro Anselmo Diliberto, turismo d.rino Maria Roza Cucchiara, organizado d.ro Vincenzo Lupo, propagando instr. Franka Maniscalco, kulturaj aferoj d.rino Maria Recca, revizoroj prof. Salvatore Ficani, instr. Alfieri kaj instr. Navarra.

La 20an kaj la 21an de majo 1967, por celebri la 10an datrevenon de la grupo "Jozefo Chiappisi", ĉeestis 113 esperantistoj el Palermo, Trapani, Agrigento, Katanio, Sciacca, Menfi, Torino kaj Napolo. Esperantistoj kunvenis sabaton en la karakteriza ejo ĉe la maro "La Foggia" (La Foĝja), ornamita per siciliaj folkloraj motivoj kaj per esperantaj tolostrioj kaj flagetoj; en la fono granda verda drapo, la esperanta koloro.

Dimanĉon matene, en la Preĝejo Kolegio de Redemptoraj Patroj, pastro Matteo Scaldi - Skaliĉi celebris la Sanktan Meson en Esperanto.

Sekvis regalado en la Komunumo de Sciacca, kie urbestro adv. Julio Savona bonvenigis nome de la urbo. Kav. Franko Tulone, dankinte, donis parolrajton al geom. Jozefo Grattapaglia el Torino, reprezentanto de la I.E.F..

Posttagneze okazis kunveno de ĉiuj esperantistaj estraranoj kaj fine komenciĝis dancoj, dum kiuj oni elektis "Ino Esperanto"-n. Estis elektita fraŭlino Ada Pisani el Castelvetrano, sekvita de fraŭlinoj Valeria Sicomo kaj Maria Pia Di Fresco, ambaŭ de la grupo de Palermo.



Adv. Julio Savona kaj prof. Franko Tulone
(Foto el: L'Esperanto n.ro 113 - 114, majo - junio 1967, paĝo 58)



↑
Ada Pisani kun grupo da geesperantistoj
(Foto el: L'Esperanto n.ro 113 - 114, majo - junio 1967, paĝo 65)

La grupa aktiveco, precipe la instruo de la Internacia Lingvo, estis eldonita en ĵurnaloj "La Sicilia", "Telestar", "Giornale di Sicilia" (Ĵurnalo de Sicilia) kaj en la semajna "L'Amico del popolo" (La Amiko de la Popolo). Havis grandan resonon la starigo de "Ĵurnala premio". La premio, kiu konsistis el italaj liroj 50.000, estis aljŭgita al ĵurnalisto de la provinco Agrigento, kiu, ne post la 21an de decembro 1967, skribu kaj eldonu en la siciliaj ĵurnaloj la plej bona artikolo pri "La frateco inter popoloj". La premia ceremonio okazis dum la 10a datreveno de la grupfondo "Jozefo Chiappisi". La 5an de septembro 1967, en la sidejo de la Biblioteko Guardino, okazis la jarkunveno de la grupo. Oni elektis: prez. kav. prof. Franko Tulone, vic-prez. pastro Matteo Scalici, sekr.-kas. s.ro Anselmo Diliberto, konsilianoj d.ro Vincenzo Lupo, s.ro Mikelo Bono, f.ino Franka Maniscalco kaj f.ino Mirejla Montalbano, prezidanto financaj kontrolistoj d.ro Nikolao Lombardo. Ĉi lasta kaj prof. Franko Tulone estas esperantistoj ekde la fondo de la grupo "Jozefo Chiappisi" kaj ili daŭrigas labori por la Movado.



La memoriga poŝtkarto

La 9an de marto 1969, en la ĉeesto de Sekretario de la Interregiona Konsultiĝa Komitato "Sicilio - Kalabrio", d.ro Rozario Abate, estis decidita la naskiĝo de du konstruakooeroj respektive titolitaj "Esperanto" kaj "Attilio Vaona". Tiu iniciato, kune kun tiu establita en Palermo, celis konstrui modernajn loĝejojn por esperantistoj precipe en urboj kie okazis la tertremo de la 15a de januaro 1968.

En 1971 la Itala Esperanto-Instituto elektis "Instruaj Membroj" Salvatore Ficani kaj Franciska Maniscalco kaj "Ordinara Membro" Anselmo Diliberto.

La 20an de februaro 1976 forpasis pastro Matteo Scalici³. Instruisto pri Esperanto de la Katedro de Sciacca, li restarigis kaj startigis Skoltismo en Sciacca. La forpaso de pastro Scalici estis raportita en la revuo "Esperienze e Progetti" (Spertoj kaj Planoj) de la Centro Studoj kaj Skoltaj Spertoj "Baden-Powell", n.ro 10, 1976, paĝo 264: "Malgraŭ la kuracadoj faritaj kaj la amo sentita al li en la tutajn liajn lastajn momentojn, pastro Matteo Scalici redemptorano reiris al la Patra Domo la 20an de februaro 1976, Li restarigis kaj startigis Skoltismon en Sciacca, sed ĉiuj gejunuloj de la urbo estis apude de li kaj havis multon de li, kiu lasas senhavan malfacile estingebbla".

De la 1a de aŭgusto ĝis la 31a de oktobro 1977, prof. Franko Tulone donis esperantajn lecionojn en la privata radiostacio "Monte Kronio" de Sciacca. La dissendoj, ĉiulunde de la 15.20 ĝis la 16.00, estis donita laŭ la nova kurso *Jen nia mondo*. Post la fino de ĉiu dissendo, aŭskultantoj povis telefoni al la radiostacio por fari demandojn. Dum tiu aktiveco prof. Franko Tulone estis helpita de prof.ino Dina Segreto kaj d.rino Silvana Porrello.

En januaro 1978 komenciĝis la dua kurso, ĉiam laŭ *Jen nia mondo* kaj la gramatiko de Viktorio Dall'Acqua *Esperanto, revolucio de la vorto*.

Krom en Sciacca, dissendojn estis aŭskultitaj en multaj urboj el kiuj Castelvetro, Mazara de la Valo, Montevago kaj Pantelleria.

La 4an de februaro 1994, pro la plimalboniĝo de pulma malsano havita jarojn antaŭe, forpasis en Romo Franciska Venezia. Naskita en Sciacca la 3an de septembro 1924, ŝi estis tre aktiva en la grupo de ŝia naskiĝa urbo kaj ŝi daŭrigis ŝian aktivecon por Esperanto ankaŭ post la transloĝiĝo al ĉefurbo, antaŭe en la roma grupo esperantista kaj poste en tiu katolika (U.E.C.I.), kie ŝi estis ankaŭ Konsilantino sur nacia nivelo. Dum la lastaj jaroj ŝi kontribuis por organizi U.E.C.I.- Kongresojn, kie ŝi prizorgis pri la financa parto.



Franciska Venezia


Vincenzo Lupo (1930 - Sciacca, 30 januaro 1974), Konsiliano de la grupo "Jozefo Chiappisi" kaj Ordinara Membro de la Itala Esperanto-Instituto. De 1957 li estis ĉiam aktiva por propagandi Esperanton en Sciacca.

En Sciacca multe propagandis ankaŭ prof. Santangelo.

Noto 3 Pastro Matteo Scalici (1929 - Sciacca, 20 februaro 1976), redemptora misiisto, pastro rektoro dum la jaroj '70 de la Kolegia Preĝejo kaj dum multaj jaroj skoltanimanto de Sciacca. Pastro Scalici restarigis kaj revivigis skoltismo en Sciacca kaj dum pli ol dek jaroj li estis animzorganto de la junaj skoltoj ĝis lia forpaso. La 11an de decembro 2006, okaze de la trideka datreveno de la forpaso de pastro Scalici, en la Kolegia Preĝejo, oni celebris Sanktan Meson organizita de eksskolta grupo. La Skolta Grupo Sciacca 1 estas titolata "Pastro Matteo Scalici".

Sidejo de la grupo:

- Esperantista-Grupo, strato Perollo n.ro 84: 1957;
- Esperantista-Grupo "Jozefo Chiappisi", ĉe prof. Franko Tulone, strato Frangipane n.ro 6: 1960, 1961, 1962;
- Esperantista-Grupo "Jozefo Chiappisi", ĉe prof. Franco Tulone, strato Frangipane n.ro 8: 1964, 1965, 1966;
- Esperantista-Grupo "Jozefo Chiappisi", Korso Vittorio Emanuele n.ro 129: 1967, 1970, 1971;
- Esperantista-Grupo "Jozefo Chiappisi", strato Frangipane n.ro 8: 1974;
- Skolta Esperantista Ligo, strato Frangipane n.ro 8.



La poŝtkarto de la skoltoj

Kursoj:

- 1961 2agrada kurso. La Komisiono estis konsistigita el: d.ro Vincenzo Porrello (Direktoro de la 1a Lerneja Distrikto), prof. Franko Tulone (Estro de la Esperanto-Katedro), d.ro Nikolao Lombardo (Sindikaj Prezidanto de la grupo "Jozefo Chiappisi") kaj s.ro Anselmo Diliberto (sekretario-kasisto de la grupo). Distingiĝis: pastro Kaloĝero Augello, d.rino Maria Recca, d.rino Anna Roza Cucchiara, f.ino Maria Roza Sscaglione, inst.ino Franka Maniscalco;
- 1962 Elementa Lernejo "T. Fazello" (prof. Franko Tulone, d.ro Vincenzo Lupo);
- 1963 Arta Ŝtata Lernejo (placo Mariano Rossi), 1a kaj 2a grado (prof. Franko Tulone kaj prof. Vincenzo Lupo). En la 2a grado sukcesis en ekzamenoj f.inoj Katerina Camera kaj Filomena Montalbano;
- 1965 Skoltaj Asocio, 1a grado;
- 1965 Arta Ŝtata Lernejo, 3a grado (prof. Franko Tulone kaj prof. Vincenzo Lupo);
- 1965 Grupo ASCI kaj AGI (Kolegia Preĝejo), 1a grado (prof. Franko Tulone kaj Mirejla Montalbano);
- 1966 Biblioteko Guardino (Korso Viktorio Emanuelo n.ro 129, apud la Kazerno de Karabenistoj), 3a grado (prof. Franko Tulone, pastro Matteo Scalici, d.ro Vincenzo Lupo);
- 1966 Popola Universitato (Korso Viktorio Emanuelo n.ro 129).




La afiŝo de la kurso en la Biblioteko Guardino (1966)



La ekzamena komisiono
De maldekstre: s.ro Anselmo Diliberto, d.ro Vincenzo Porrello,
prof. Franko Tulone (Foto el: L'Esperanto n.ro 78 nova serio,
novembro – decembro 1962, paĝo 119)

Z.E.O.

”Strato Esperanto”: decido n.ro 28 de la 16 de septembro 1964. Inaŭguro la 28an de junio 1964. La strato estis inaŭgurita okaze de la 5a Sicilia Esperanto-Kunveno (27 – 29 junio 1964) kiel raportita en “L’Esperanto” n.ro 87 majo – junio 1964, paĝo 56, sed la dato estas posta al tiu de la decido, Eble oni ĝin decidis titoli kaj, atendante la decidon, oni kaptis la okazon de la Kunveno por la inaŭguro. Ĝi estas en la kvartalo Stazzone kaj ĝi anstataŭas la eks straton Stazzone. Laŭ peco ĝi estas paralela kun la fervoja linio kaj kun Insulo Ferdinanda.



Sciacca: strato Esperanto

RIBERA

Z.E.O.

“Placo Ludoviko Lazaro Zamenhof”: decido n.ro 182 de la 4a de septembro 1967. La peto por titoligi straton aŭ placon al L.L. Zamenhof estis farita la 1an de marto 1965 de la Italaj Esperantistoj Federacio - Komitato de Sciacca.

Ĝi estas la placo limigita de la stratoj Pozzillo, Alloro, Saponeria kaj Diana.




Ribera: placo L. L. Zamenhof

CALAMONACI

Z.E.O.

“Strato Esperanto”. Ĝi estas flankaj strato, kiu kunligas straton Aleksandro Manzoni kun aleo Eŭropo.



Calamonaci: strato Esperanto

PROVINCIA DE TRAPANI



Trapani



Salemi



Favignana - Favinjana



Mazara del Vallo – Mazara de la Valo

TRAPANI

La unuaj esperantaj sciigoj ekaperis en la loka gazetaro ekde la jaro 1955, sed en la kulturaj kluboj oni priparolis pri la Internacia Lingvo jam de antaŭe dank'al adv. Leonardo Napoli kaj kav. Nikolaeto Parisi, jam volapükistoj, kiuj instigis grupeton da studentoj por disvastigi Esperanton ankaŭ en ĉi tiu urbo.

Trapani, la plej ekstrema sicilia urbo, havis ne unu sed tutan familion, kiu tre klopodis por disvastigi Esperanton, Parisi: kav. Nikolaeto (forpasita la 16an de februaro 1956), la fratino prof.ino Maria Aŭrora (forpasita en 1980) kaj gefiloj prof. Nunzjo Johano, prof. Vito, prof.ino Annina kaj Maria Roza¹.

La plej aktiva estis Nunzjo Johano, Doktoro pri Sociologiaj Sciencoj, Docento pri Grafologio kaj fakulo pri Grafolog-Kriminalologio de tribunalo². Instruisto en la Ŝtata Profesia Komerca Lernejo kaj korespondanto de gravaj ĵurnaloj el kiuj "La Gazzetta del Popolo" (La Popola Gazeto) el Torino, li gajnis la ĵurnalistan premion de la hispana revuo "Verdad" pritraktinte la temon: "La frateca problemo".


Kiel fakulo pri interlingva sociologio, li klopodis pri la problemo de la internacia lingvo subtenante Esperanton³.

Prof. Nunzjo Parisi estis nomumita de la I.E.F.-Regiona Delegito, adv. Jozefo Stanislaŭ Boscarino, reprezentanto en Trapani de la Sicilia Delegacio kaj en 1959 li surprenis la oficon de U.E.A.-Delegito. Tio estas la komenco de intensa disvastiga aktiveco de Esperanto per serio da prelegoj, kiuj havis reeĥon en gazetaro. Kaj kune kun la frato Vito, Instruisto pri Stenografio, li faris intensan disvastigan propagandon por Esperanto gvidinte kursojn kaj prelegojn ankaŭ en la najbaraj urboj ekzemple Erice, Marsala, Mazara, Pantelleria kaj disdonante informan materialon⁴.

Prof. Nunzjo Parisi, ankoraŭ universitatano, akiris la Instruistan Diplomon en Firenze, en la ekzamensesio de la 30a Nacia Kongreso (19 - 24 septembro 1959) kaj tiele estis starigita la Katedro de Trapani de la Itala Esperanto-Instituto. Dank'al lia laboro, en 1960 naskiĝis la Esperantista Grupo de Trapani konsistita plej parte el junuloj. La 30an de aprilo 1961 oni titolis la grupon laŭ la nomo de Cordero di Montezemolo⁵, la unua en Italio tiel titolita.

El la Trapani-a esperantistaj estroj pli aktivaj, krom familianojn Parisi, oni memoras adv.on Leonardo Napoli, prof.inon Brigita Corso kaj Johano-n Raffaele.

Oni starigas, do, Esperanto-Centron⁶, instigita de adv. Leonardo Napoli, de studento Nunzjo Parisi kaj aliaj junuloj. La Esperanto-Centro, kiu enhavis la Esperanto-Katedron kaj la Esperantista-Grupon de Trapani, estis valida esperantista ĉeesto en la urbo.



Leterkapo de la katedro

Nota 1 Maria Roza Parisi esti elektita "Ino Esperanto" en la 4a Sicilia Esperanto-Kunveno, kiu okazis en Sciacca (5 - 7 majo 1962).

Nota 2 Registrata de la jaro 1963 en la listo teknikaj juraj Konsilistoj, li estis petita por delikataj civilaj kaj kriminalaj procesoj meritinte, pro la longa kaj engaĝita aktiveco kiel jura sperteco, du honorajojn de la Ordeno pro Merito de la Itala Respubliko kiel Oficiro kaj Komandoro.

Nota 3 Prof. Nunzjo Parisi estis aŭtoro de Esperanta gramatiko por la unuaj kaj duagradaĵoj kursoj, farita laŭkajere en la sesdekaj jaroj (*Historiaj, lingvaj, literaturaj kaj informaj sciigoj pri Esperanto*, eldonita de la Esperanto-Katedro de Trapani).

Nota 4 Por la instruado prof. Parisi esti helpita de prof.ino Brigita Corso kaj de la fratino Annina, ankaŭ ŝi diplomita instruistino pri Esperanto. Adv. Napoli, dojeno de la Trapani-aj esperantistoj, krom doni lian altvaloran moralan subtenon, kunlaboris pri la instruado sin dediĉante precipe al la ideologiaj rilatoj de la Internacia Lingvo.

Nota 5 **Karlo Cordero di Montezemolo** (Mondovì, Cuneo, 7 aŭgusto 1858 - Caletta de Castiglione, 2 aŭgusto 1943), markizo, Generalo de la rezervo. En 1925, okaze de la 10a Nacia Kongreso de Bari (13 - 15 septembro), estis elektis Prezidanto de la I.E.F., ofico, kiun li estris longtempe. Ĉiam en 1925 li fondis la Esperantista-Grupon de Livorno.

Nota 6 La Esperanto-Centro de Trapani, starigita en 1955, nun estas ĉe la Mediteranea Grafologia Intersistema Asocio (A.G.I.M.). En 2005 estis celebrata la 50a datreveno de la starigo de la Centro kaj en tiu okazo oni titolis la ĝin laŭ la nomo de Danielo Marignoni. Memore al la manifestiĝo oni stampis medalon.

Danielo Marignoni (Crema, 1 januaro 1846 - tie, 28 januaro 1910) estis la unua kaj longtempe la sola itala esperantisto. Doktoro pri Juro, eksvolapükisto, li verkis kaj eldonis la unuan Esperanto-gramatikon itallingve en 1890.

La Esperanto-Centro faris en la provinco multe da kursoj, manifestacioj kaj renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj. El la aktivecoj: la kunlaborado kun la Sicilia Delegacio kaj partoprenoj en regionaj kaj naciaj kunvenoj; la kunlaborado okaze de la 29a Nacia Esperanto-Kongreso (Palermo, 23 - 27 aŭgusto 1958), kiu havis postkongreson en Erice per publika afiŝo en Esperanto dank'al la Urbestro, prof. Antonino De Stefano, kaj per prelego de prof. Giorgio Canuto, Rektoro de la Universitato de Parma, en la ĉeesto de aŭtoritatuloj; la ekspozicio de la libro kaj de la gazetaro esperantista en la sidejoj de la Popola Universitato (1959, 1960, 1969); ludoj kaj kantoj en Esperanto fare de junulinoj de la Instituto "Sankta Koro" okaze de la inaŭguro kaj malfermo de kursoj gviditaj en tiu Instituto en la ĉeesto de aŭtoritatoj (Episkopo kaj Provinca Studestro el aliaj); la propono titoligi straton al Esperanto farita al la Komunumo de Trapani (Aprilo 1959)⁷.

La aktiveco de la Katedro de Trapani meritas specialan mencion. La Provinca Studestro, prof. Giuseppe Purpi, jam antaŭe manifestis lian simpatian por la Movado, per disvastigo de la ĉiujara cirkulero por malfermi kursojn en lernejoj de lia jurisdikcio, ne hezitante starigi, ekde la jaro 1962 kaj dum kelkaj jaroj, ŝtatajn aŭ regionajn kursojn de "Popollernejo tipo Ĉ", kun Esperanto-instruado, kun ŝtatsalariata instruisto kaj kun kvalifo de kariero⁸. Oni opinias ke ĝi estis unu el la malmultaj ekzemploj en Italio.

La 22an de aprilo 1960 oni donis arĝentan medalon "Zamenhofiana" al prof. Giuseppe Purpi por liaj meritoj en la kampo de la disvastigo de Esperantismo en Trapani. La ceremonio okazis en la Salonego de la Instituto "Sankta Koro" en la ĉeesto de la lokaj aŭtoritatoj. Oni fermis la manifestacion per prelego de prof. Parisi pri la celoj de Esperanto.

Por la lernojaro 1965 - 1966, prof. Giuseppe Purpi ne limigis sin disvastigi la kutiman cirkuleron, kun rapida mencio pri la kursoj, ankaŭ sekvante la dispoziciojn Segni, sed, per du liaj postaj skribaĵoj, li volis informi la lerneajn masojn pri la programoj de la Trapani-a Katedro.



De maldekstre: Adv. Leonardo Napoli, prof. Jozefo Purpi, prof. Lello Rossi, adv. Vincenzo Occhipinti, prof. Luciano Sesta, d.ro Mikelo De Vincenzi

Per cirkulero de la 6a de novembro 1965, post noto pri la sukcesoj de Esperanto, kaj la prezentado de la leĝpropono n.ro 1816, li informis la estrojn de la Ŝtataj Institutoj de ĉiu ordo kaj grado, ke la loka Katedro gvidos multajn kursojn pri Internacia Lingvo, la unua el ili ĉe la Popola Universitato⁹, dividita en du sekcioj: unu por lernantoj, la alia por instruistoj. Per posta informa komuniko, Studestro precizigis en specifaj paragrafoj, pri kio rilatis al lernantoj kaj al instruistoj, ankaŭ laŭ la vidpunkto de kariero, memorigante ke, zorge de la Katedro, estos specialaj sesioj de Esperanto-ekzamenoj.

La efiko de la skizitaj cirkuleroj estis tia, ke ĉirkaŭ tri mil da informpetoj alvenis al la Estraro de la Katedro de Trapani.

Noto 7 En aŭgusto 2001, okaze de miaj somerferioj en mia naskiĝa urbo, dum la serĉadoj en la Biblioteko Fardelliana, en la "Giornale di Sicilia" (Jurnalo de Sicilia) de la 4a de aprilo 1959 (n.ro 81, paĝo 5) mi legis leteron de la Grupo Esperantista adresita al la Urbestro de Trapani. La 12an de septembro 2001, post kiam mi revenis Udinon, mi prizorgis sendi mian peton. Ne havinte ian respondon, la 5an de julio 2002, ĉiam okaze de miaj somerferioj, mi parolis kun la respondeculo, s.ro Aldo Virzi, kiu diris al mi ke la peto estas en arkivo, kune kun aliaj, kun propra ordnumero.

Noto 8 La instruistino pri tiuj kursoj estis Annina Parisi, kiu, krom la pago, ĝuis pri la atribuo de poentaro kaj la taksado de la servo por la kariero.

Noto 9 Jam dezirita dum la jaroj 1946 - 1947, la Popola Universitato, starigita en 1957 de grupeto da Trapani-anaj intelektuloj, el kiuj lernejestro Luciano Sesta, adv. Leonardo Napoli kaj adv. Bartolomeo Savona, subtenis kaj plifortigis la aktivecon de la Esperanto-Centro de Trapani por la disvastigo de la Internacia Lingvo per kursoj, renkontiĝoj kaj aktivecoj diversaj.

Prof. Luciano Sesta estis Urbestro de Trapani de la 26a de februaro ĝis la 4a de septembro 1947 kaj de la 5a de aŭgusto 1953 ĝis la 11a de marto 1955.

Pri la kursoj, estis jam okazantaj, krom tiu en la Popola Universitato, unuagradan ĉe la Ŝtata Profesia Komerca Lernejo, en kiu partoprenis la skribanto¹⁰, kaj triagradan kun sep partoprenantoj. Estis en la preparo alia je unuagrada en Trapani, kaj unu ankaŭ en Marsala, kie etendiĝas la aktiveco de la Trapani-a Katedro.

La tuta aktiveco koncentriĝis sur prof. Nunzio Parisi, kiu, krom gvidi ĉiujn kursojn, pasigis lian tempon per prelegoj kaj disdonante informan materialon.

ISTITUTO ITALIANO DI ESPERANTO - CATEDRA DI TRAPANI
DIREZIONE: PIAZZA S. PIETRO, 2 - TRAPANI

N. 7/E
(da rilare sempre)

1^o
GRADO
NORMALE

CERTIFICATO D'ISCRIZIONE PER CORSO DI STUDIO

Il sig. *Martino Piscicchio*
è regolarmente iscritto ed ammesso alla frequenza di un Corso di lingua internazionale Esperanto di grado normale, a norma dei programmi e degli ordinamenti del Superiore Istituto Italiano di Esperanto.

Data d'inizio del Corso *14.07.1965* Sede didattica *Trapani*

Questo certificato deve essere conservato per tutta la durata del Corso e deve essere esibito a richiesta e in sede d'esami.

IL DIRIGENTE DELLA CATEDRA
Nunzio Parisi
[Signature]

Giorali di lezione: L.M.V. - M.G.S. ore:

AVVERTENZE - Gli Studenti possono liberamente consultare il materiale della «Biblioteca di Esperanto» e della «Biblioteca di Esperanto». Per informazioni didattiche gli interessati possono rivolgersi all'Insegnante o agli Assistenti del Corso entro l'orario di ricevimento. L'Ufficio Direzione rimane aperto tutti i giorni nei festivi dalle ore 11 alle ore 12,30. Richiedendo informazioni per corrispondenza, allegare sempre il francobollo per la risposta. Per informazioni, spedite libri, ecc. rivolgersi: «Cattedra di Esperanto», Piazza S. Pietro, 2 - Trapani - Superiore Istituto.

I Sign. Studenti sono tenuti all'osservanza delle norme regolamentari della Cattedra e del Superiore Istituto.

RAI - Radio Roma Come tutte Stazioni Radio d'Europa, d'America, ecc. anche Radio-Roma (per l'Italia) trasmette programmi vari in Esperanto; queste trasmissioni si tengono periodicamente, nei seguenti giorni: Ogni Martedì, Mercoledì, Venerdì, alle ore 18,58 su onde lunghe: m. 30,90; oppure m. 41,24 e 50,34.

Corso di studio normale per il diploma di primo grado di Esperanto

PROGRAMMA DI STUDIO - Lo Studente dovrà studiare e conoscere tutte le lezioni del libro di testo, (compresa l'introduzione). Per le notizie storico-informative, dovrà studiare tutti gli appunti dettati dall'Insegnante e le conversazioni e discussioni tenutesi durante il Corso. Ai «non frequentanti-corrispondenti» si consiglia di consultare: a) l'ora - una - Zamenhof iniziatore dell'Esperanto, (edito da «Edizioni Paideia» di Atene, Nuova) oppure la pubblicazione di segno e paese. Notizie storiche, linguistiche, letterarie e informative sull'Esperanto, (edita dalla Cattedra Trapanese di Esperanto) ed altri scritti e articoli dello stesso Autore. Esercizi in dettato, lettura, traduzione e conversazione elementare.

PROGRAMMA D'ESAME:
Scritto: a) Traduzione di un breve dettaglio di prosa esperanto (si classifica anche il dettato) e versione in esperanto di un analogo testo italiano (2 ore di tempo); b) Composizione di una lettera in esperanto su tema di argomento familiare (1 ora di tempo).
Orale: a) Lettura e traduzione di facile prosa; b) Dimostrazione della conoscenza della grammatica (quella contenuta nel libro di testo) e delle notizie generali sull'Esperanto e sulle istituzioni esperantiste ecc. c) Conversazione elementare in Esperanto.

La data degli esami verrà comunicata direttamente agli interessati.

La aliĝo en la kurso de la skribanto

En 1967 prof. Nunzio Parisi starigis la Italan Sociologian Instituton por la Internacia Lingvo (I.S.I.L.I.), surprizinte la direkcion. Tiu Instituto havis mallongan vivon. Tamen, ĝi havis ian konsenton. En marto 1968 la VIIIa Komisiono Instruado de la Ĉambro de la Deputitoj aprobis, leĝfera komisiono, la leĝprojekton n.ro 1816 "Instruado de la internacia lingvo Esperanto kaj de la rilata literaturo en lernejoj" por instrui Esperanton en lernejoj. La leĝprojekton, ne povante esti aprobita en Senato pro la fermo de la Parlamento por la voĉdonadoj, estis repropozita per la nova projekto n.ro 1481. Rilate al tiu cirkostanco prof. Parisi, kiel Estro de la I.S.I.L.I., havis promesojn kaj konsiderojn¹¹.

En 1968 prof. Nunzio Parisi estis ordenita per la esperanta honorigo Granda Oficiro "Universala Ordeno de Antares", kavalira asocio agnoskita la 28an de februaro 1946 de la Ĉefstabejo Alianca Milita Regado Zono de Triesto¹².

Nota 10 Oni donis lecionojn ĉiusabate en lernoĉambro de la Klasika Liceo "Leonardo Ximenes", en Korso Vittorio Emanuele.

Nota 11 La Nacia Sekretario de la K.D. (Kristana Demokratio), hon. Flaminio Piccoli, la 12an de junio 1969 tiele skribas al prof. Parisi: "...Mi vin certigas, ankaŭ per la engaĝiĝo montrita dum la antaŭa parlamenta periodo, ke nia Partio sekvas ĉi tiun apartan kulturalan manifestacion plejzorge atento kaj kun tre granda intereso..."; kaj la Respondeculo de la Lerneja Oficejo de I.S.P. (Itala Socialista Partio), la 19an majo 1969: "...mi deziras vin certigi, ke, komprenante la utilecon de la internacia lingvo, ni atente ekzamenos la problemon de la Esperanto-instruo en la duagradaj lernejoj..." (Fonto: prof. Nunzio Parisi).

Nota 12 Temas pri la Universala Akademio de la Regado Kosmo-Astrofizia pri Psikaj kaj Spiritaj Sciencoj (U.A.R.K.A.) starigita de Renato Damiani el Triesto la 18an de februaro 1946. "La Akademio sin proponas evoluigi la studadon pri tiuj branĉoj tiel gravaj kaj malmulte konataj kaj ŝatataj el la plimulto, kiuj kune konstituas la okultan sciencon" (Art. 3 de la Statuto). El la diversaj sciencoj estis grafologio. La Akademio enhavis ankaŭ la Universalan Ordenon de Antares, kavalira asocio kies atesto estis skribita Esperante. La disdono de la atestoj estis aŭtorizita de la Alianca Milita Regado per dekreto A.M.G.-T.T.46 de la 28a de februaro 1946. Per letero AHQ/FTT/97/5/11 de la 27a de januaro 1948 la Zona Komisararo, Sub-Kol. R.A.A.H. Gardner rajtigis la Renato-n Damiani utiligi la malnovajn atestojn de la Ordeno ne post la 15an de februaro 1948, atendante ke oni presu la novajn. La emblemo adoptita de la Ordeno de Antares enhavas la verdan stelon, kiu prezentas la duan lingvon por ĉiuj: Esperanto (El "Archeografo Triestino" (Triesta Arkeografo), Serio IV 2001, Vol. LXI - CIX de la Kolekto).

Pri la biografio de Renato Damiani vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Bibliion Eldonoj srl, Milano, 2008.

En 1969, en Vilao Olmo, sidejo de la 40a Nacia Esperanto-Kongreso de Como (13 - 18 septembro), prof. Nunzio Parisi faris interesan raporton pri: "Novaj sociologiaj determinismoj por Esperanto en Italio", kiu estis tre ŝatata.

En 1970, pro aldonaj profesiaj sindevidoj, prof. Nunzio Parisi ĉesigis aktivecon en la aktiva Esperantismo. Post tiu decido, la Trapani-a Esperantismo havis abruptan halton ankaŭ pro malfacilaĵoj de la Popola Universitato de Trapani.

Malgraŭ tio, Esperanto ankoraŭ vivas en Trapani. En 2000, fakte, la filino de prof. Nunzio Parisi, Giovanna, instruistino kaj universitatano, aliĝintino al la esperantista junularo, akiris la ateston de la formada kurso por instrui la Internacian Lingvon starigita de la Fakultato pri Beletroj de la Universitato de Torino, kune kun la Nacia Asocio Instruistoj Fremdaj Lingvoj - Sekcio Esperanto (A.N.I.L.S.). Plie, la Mediteranea Grafologia Interistema Asocio (A.G.I.M.), kies Prezidanto estas prof. Nunzio Parisi, uzis ankaŭ Esperanton kiel komunika lingvo en la internaciaj rilatoj. La A.G.I.M. havas sidejon en Erice, konata kiel la "Urbo de la Scienco".

Dum la periodo 12a - 21a januaro 2011, en la Galerio de Palaco Vicaria (eks Prizono), okazis la ekspozicio "Esperanto, internacia lingvo por la paco rekomendita de UNESKO". En la ekspozicio, krom eldonaĵojn, oni ekspoziciis epokajn afiŝojn pri Esperantaj kursoj, filatelaĵojn kaj larĝan kolektaĵon de insignoj kaj medaloj, dum en la kunvena salono, tuj apuda al salonoj de la ekspozicio, estis projekciitaj DVD kaj videoj, ankaŭ en la salonoj de la ekspozicio pere de komputoro.


Ĉeestis en la inaŭguro diversaj elstaruloj pri kulturo kaj skabeno pri Ekonomiaj Politiko de Mazara de la Valo Francisko Ditta, kiel reprezentanto de la Urbestro. La ekspozicio havis la patronecon de la Urbestro kaj de la Klubo UNESKO de Trapani.






Paneloj de la ekspozicio

En 2009, laŭ la peto de prof. Nunzjo Parisi, la skribanto donis sian disonon por instrui en la Esperanto-kursoj enmetitaj en la programojn de la Popola Universitato de Trapani kaj Erice (UPTR.E). La 16an de oktobro 2009 oni donis al li la diplomon kiel aliĝinto en la Listo de Instruistoj de la Universitato, en la Esperanto-Fako.



La atesto de la Universitato donita al Martinez



La afiŝo por la aliĝo en la kursoj

Sidejo de la grupo:

Esperantista-Grupo de Trapani "Cordero di Montezemolo", Placo Sakta Pietro n.ro 2: 1961, 1962, 1983.

Kursoj:

- 1960 Dominikana Instituto "Sankta Koro" (strato Todaro n.ro 7), organizita de la Provinca Studestrejo (prof.ino Annina Parisi);
- 1960 Teknika Komerca Lernejo "S. Kalvino" (prof. Nunzio Parisi). Prezidanto de la ekzamena Komisiono lernejestro prof. Luciano Sesta;
- 1960 Rifuĝo de la Dia Providenco (prof. Nunzio Parisi);
- 1961 Popola Universitato de Trapani kaj Marsala. Prezidanto de la ekzamena Komisiono prof. Gioacchino Aldo Ruggieri, prezidanto de la Popola Universitato;
- 1961 IIIa Lerneja Distrikto de Trapani (Annina Parisi);
- 1961 Mezgrada Lernejo "Katalano". Prezidanto de la ekzamena Komisiono prof. Nicola Corso.

Per apliko de la Cirkulero de Ministerio pri Instruado n.ro 12411 de la 21a de februaro 1952¹³:

- 1963 Lernejo pri la Komerca Preparo;
- 1964 Teknika Instituto por Librotenistoj;
- 1965 Ŝtata Profesia Komerca Lernejo;
- 1965 Religia Instituto de la Kronita.

SALEMI


Ankaŭ ĉi tiu urbo, naskiĝurbo de fratoj La Colla, fare de d.ro Salvatore Correnti, oni interesiĝis ĉiam pli pri Esperantismo. En 1952 oni havis multajn izolitajn aliĝojn kaj eklaboris kaj por gvidi kurson kaj por fondi Esperanto-Grupon.

FAVIGNANA

Z.E.O.


"Strato Esperanto": decido n.ro 88 de la 10a de decembro 1969. La peto por titoligi straton aŭ placon al Esperanto estis farita la 31an de julio 1969 de la Instituto de la Itala Lingvo en Milano. Ĝi estas flanka strato, kiu de Strato Luizo Capuana finiĝas ĉe Strato Marsala.

"Feriadomo Esperanto": ĝi estas ene privata rezidkomplekso, eltirita en la loko de la malnova tof-minejo nomita "Esperanto". La minejo, nun dekutimiĝita, estis el blanka tofo, tipa de la insulo, kaj ĝin nomis tiele, ĉar apude la strato.



Favignana: Strato Esperanto kaj Feriadomo Esperanto

Noto 13 La Cirkulero (Ministro Segni), sendita al Lernejestroj, specifikis: "Ĉi ĉi tiu Ministerio, komprenita de la utileco kaj intereso, kiuj povos deveni pro la kono kaj disvastigo de Esperanto, opinias ke oni devas subteni la lernadon en tiuj lokoj, almenaŭ, kie jam estas taŭgaj individuoj por doni tiun lernadon. Tial por faciligi la konon de tiu helpa lingvo, ĉi tiu Ministerio havas nenion kontraŭ tio kaj oni devas kuraĝigi iniciatojn por antaŭenpuŝi la studadon pri Esperanto, per la disponigo ankaŭ de lernoĉambroj por gvidi kursojn...".



Favignana: Strato Esperanto



Favignana: feriadoomo Esperanto

MAZARA DE LA VALO

Kursoj


Ili estas gviditaj ĉe la sidejo de la Centro por Esperanto kaj Interkulturo (Palaco de la Leĝeco, strato Giotto n.ro 23, 91026 Mazara del Vallo – Trapani).

Z.E.O.

La “Steleo de la Paco” ne estas Z.E.O. sed la skribanto volis ĝin enmeti pro la frazo de Prem Rawat skribita Esperante.



Martinez antaŭ la Steleo de la Paco



Paco originas en la koro de ĉiuj homoj.
Prem Rawat¹⁴

Mazara del Vallo, 27 maggio 2011



Mazara de la Valo: Centro por Esperanto kaj Interkulturo

Nota 14 Prem Rawat (Haridwar, 10 decembro 1957), konata ankaŭ laŭ la honor-titolo Maharaji. Li estas oratoro tre konata je internacia nivelo, kiu instruas praktikan metodon por malkovri la fonton de paco, feliĉo kaj bonfarto, kiu troviĝas ene ĉiu el ni. Li vojaĝas konstante tra la mondo, parolante en urboj de la tutaj kvin kontinentoj.

MAPO KUN LA INDIKO DE LA Z.E.O.-j



- 1 - Motta D'Affermo (ME): Vojeto Esperanto
- 2 - Acì Catena (CT): Strato Esperanto
- 3 - Catania: Esperanto-Strato
- 4 - Scicli (RG): Strato Esperanto
- 5 - Raguso: Strato Esperanto
- 6 - Porto Empedocle (AG): Promenejo Esperanto
- 7 - Calamonaci (AG): Strato Esperanto
- 8 - Ribera (AG): Placo L.L. Zamenhof
- 9 - Sciacca (AG): Strato Esperanto
- 10 - Menfi (AG): Avenuo Esperanto
- 11 - Mazara del Vallo (TP): Steleo de la paco kaj Centro por Esperanto kaj Interkulturo
- 12 - Favignana (TP): Strato Esperanto kaj Feridomo Esperanto
- 13 - Palermo: Strato Esperanto
- 14 - Castroreale (ME)

Z.E.O. - Zamenhof Esperanto Objektoj. Temas pri listo de aĵoj (monumentoj, memortabeloj, ejoj, stratoj, avenuoj, placoj, k.t.p.) dediĉitaj en la tuta mondo al Zamenhof aŭ al Esperanto.

SCIIGOJ EL:

- G.B. Briano, *esperantista vivo de Ĝenovo, Ligurio e Lumiĝana de 1900 ĝis 1978*, Liguria, Eldonoj Sabatelli;
- Elio Miglorini, *Pioniroj de Esperanto en Italio*, Roma, 1982;
- Pietro Rizzo, *Sedek jaroj*, Pisa, 1979;
- *Enciklopedio de Esperanto*, represo de la unua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1986;
- Esperantaj Sciigoj: n.ro 1/1908, n.ro 4/1909;
- *L'Esperanto* (I.E.F): jaroj 1913, 1914, 1915, 1916, 1920, 1921, 1922, 1925, 1926, 1929, 1932, 1951, 1956, 1957, 1958, 1959, 1960, 1961, 1962, 1964, 1965, 1966, 1967, 1969, 1972, 1975, 1978, 1980, 1981, 1983, 1984, 1985, 1986, 1987, 2001;
- *Esperanto* (U.E.A.): jaroj 1926, 1930, 1932, 1935, 1957, 1958, 1965, 1966, 1973, 1985;
- *La Internacia Fervojisto*: n.ro 1/1968;
- *Internacia Informilo* de la Itala Esperanto-Federacio: jaroj 1961, 1967;
- *Esperantista Societaro* - Kajero tria (marto 1907) dua eldono, Esperantista Centra Oficejo - Paris;
- *Katolika Sento*: n.ro 12/1971, 12/1972.



Pentraĵo de Striani (1969).
Donacita de s.ro Vito La Colla al la skribanto dum la somero 2000

NOMLISTO
(Vidu la italan parton)



Jakobeto Martinez naskiĝinta en Trapani la 7an de januaro 1949, eklernis Esperanton kiam, en la jaro 1965, prof. Nunzjo Parisi, lia instruisto pri Taipado ĉe la Profesia Instituto kaj Estro de la Esperanta Katedro, gvidis unagradan kurson nur informacele ĉe la Klasika Liceo "Leonardo Ximenes" de Trapani.

En Udino ekde la jaro 1969 kiel Artileria Suboficiro, li reprenis la 9an de novembro 1981 la studadon de la Internacia Lingvo partoprenante en la 2agrada kurso ĉe la Udine'a grupo Nova Espero Friuli, ĵus fondita kaj tuj li integriĝis en la interna vivo de la sama grupo, supreninte yaskon kiel kasisto ka sekretario, partoprenante en la aktivecoj kja gvidante kursojn.

Memorante siajn originojn, li klopodis pri la kompilado de skriboj pri Trapani kaj Sicilio, analoge al tiuj pri Udino kaj Friulo. Ŝatanto pri la internacia lingvo Esperanto, en 1992 li sukcesis en la 3agrada ekzameno por instrui Esperanton kaj en 1996, okaze de la kunveno en Feraro (65^a Itala Esperanto-Kongreso, 24 - 30 aŭgusto), oni nomumis lin "Ordinara Membro" de la Itala Esperanto-Instituto. De la jaro 2001 li estas Estro de la Udine'a Esperanto-Katedro.

Krom esti en korespondado kun multe da eksterlandaj geesperantistoj, li klopodis pri la serĉado de la italaj Z.E.O.-j favore de s.ro Raymondo Borè de Chambéry.

Plie li klopodis por ordgi kaj inventari la esperantan bibliotecon, kiu estis en la Paulet-a kelo (ĉirkaŭ 3.500 volumoj el ĉirkaŭ 500 verkoj), kaj ordigi la korespondaĵon de kav. Paolet.

Liaj artikolojn estas eldonitaj sur la revuo "Ĉirkoli Aziendali" - Firmaj Kluboj de la Fervojsista Postlaboro (D.L.F.) de Udino (nun "Cronaca e Cultura" - Kronako kaj Kulturo), Revuo de la Asocio D.L.F. de Udino.

Memorante siajn originojn, li klopodis pri la kompilado de skriboj pri Trapani kaj Sicilio, analoge al tiuj pri Udino kaj Friulo.

Li kompilis:


- *Biografiaj sciigoj pri Stefano kaj Nikolao La Kolla - Sciigoj pri la Grupo Siĉilja Esperanto-Klubo "Stefano La Kolla"* (1987);

- *Pastro Jakobo Biankini kaj Esperanto kune kun prof. Johano Strasiotto* (2005);

- *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, kune kun la T.E.A. (2008).

Plie li kompilis: *Esperantismo en Friulo* (ne eldonita).

En la libro *Cent Udine'anoj rakontas 3* de Mario Blasoni (La Nuova Base Eldonejo, Udino, 2007, paĝoj 61 – 63) estas raportita la artikolo aperita sur "Messaggero Veneto" de la 11a de julio 2005.



La dediĉo de s.ro Raymond Boré

Noto 1 Mario Blasoni (n. Udine, 26 junio 1935), ĵurnalisto. Li estis redaktoro ĉe "Messaggero Veneto" de la jaro 1959 ĝis 1994, ĉefkronikisto dum 25 jaroj. Li registris en liaj artikoloj ĉiujn ĉefajn friulajn okazaĵojn dum 35 jaroj. Premio Friul Aquila d'oro 1986 (Friula Ora Aglo) (agnosko al friulanoj originaj kaj adoptaj, kiuj per ilia entreprenita, aŭ arta, aŭ kultura, aŭ socia aktiveco donis prestiĝon al Friulo en la mondo). La patro, Armando, refondis la Udine-an Esperantista-Grupon dum la kvindekaj jaroj.